

Beletra Edeno

neregula beletra revuo

n-ro 1 (februaro 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Vejdo, Yin Jiaxin, Sun Dachen, Pipi, Yang Long, Jianye Wang, Minosun, Liu Hongyuan, Yanke, Yi Qiao, Hong Jia, Viktoro Li, Zhang Wei, Xin Yue, Wei Da, Guo Ji, Mao Zifu
AI-ilustris John Huang.

Debutaj vortoj

Finfine nia *Beletra Edeno* debutis je la sojlo de la jaro 2024. Tio certe estas grava evento por mi kaj miaj samideanoj, kiuj kontribuis kaj donis valorajn proponojn pri la redaktado de BE. Mi sincere adresas dankon al ili.

Ĉe la komenco de redaktado mi serĉis surrete informojn pri la iamaj kaj nunaj Esperantaj revuoj kaj ties redaktoroj, precipe pri beletraj revuoj. Mi trovis, ke ili estis kaj estas famaj esperantistoj, kiaj Szilágyi, Kalocsay, Auld, Camacho k.a. Kiam mi trafis tiujn nomojn, mi tuj falis en dubojn. Ĉu mi kapablus redakti beletran revuon kiel tiuj famuloj? Ĉu mi estas tro ambicia arogi al mi famon de talentulo? Sed konsiderante mian multjaran sperton en redaktado de *Penseo*, mi sentis, ke memfidemo eksvarmas en mian koron. Kvankam *Penseo* ne estas grandformata revuo, ĝi postulas samajn redaktajn teknikojn kiel aliaj famaj Esperantaj revuoj. La nura diferenco estas ke ili posedas skipon de redaktoroj kaj multe da aŭtoroj, dum mankas al ni tiuj avantaĝoj. Tamen ni povos disvolvi nian potencialon por havigi al ni propran skipon kaj inviti aŭtorojn. Nuntempe, provizore, ni kuraĝigas nin mem elhaki la vojon kaj forbalai ĉiujn barojn sur la vojo. Ni ekis kaj ni fine sukcesas.

Beletra Edeno premieras kun iom pli ol 130 paĝoj, espereble ĝis 140 paĝoj en venontaj numeroj. La spaco jam sufiĉas enteni pli aŭ malpli longajn verkojn de dekelkaj aŭtoroj. Iom post iom kolektiĝos ĉi tie aŭtoroj pere de nia penego varbi el diversaj landoj. Kaj en tiu ĉi numero de BE videblas diversaj ĝenroj de literaturo, kiuj atingas la minimuman normon de beletra literaturo. Eble iuj asertas, ke BE ne daŭros longe pro manko de kontribuoj. Kiom “longe”? Cent jarojn? Mi vere ne certas pri ĝia longviveco. Mi nur esperas, ke ĝi sane kresku kaj bone servu al la Esperanta popolo. Longviveco ne gravas, sed efika ekzistado.

Mi deziras, ke nia BE pli longe vivu sub subteno de niaj legantoj kaj aŭtoroj!

Vejo

01-II-2024

Enhavo

Debutaj vortoj	1
Originala prozo	
Yin Jiaxin: Hejmeniri.....	4
Yin Jiaxin: Aeratako.....	11
Pipi: Kvieta riverbordo.....	13
Sun Dachen: mikronovelo Pasanto en nokto.....	20
Tradukita prozo	
Yisu: Lasu min eniri.....	21
Geling Yan: La lasta tago de Molly.....	34
Luxun: Saĝulo, malsaĝulo kaj lakeo.....	51
Luxun: Neĝo.....	52
Xu Disheng: Ĉe la ponteto.....	54
Xu Disheng: Printempo regas la sovaĝejon.....	55
Xu Disheng: Nur admire... ..	56
Anonima: Mistera puto.....	60
Chiung Yao: En profunda korto.....	69
Originala poezio	
Eto: Malsaĝa Avo formovis montojn.....	79
Eto: La luno en aŭtenmeza nokto.....	80
Eto: Odo al aŭtunaj koloroj.....	81
Eto: Vintraj hajkoj.....	83
Yi Qiao: Flugiloj de amo.....	84
Yi Qiao: Kruta monto.....	84
Yi Qiao: Mia abio.....	85
Yi Qiao: Infaneco en memoro.....	86

Tradukita poezio

Shu Ting: Dediĉe al kverko.....	87
Shu Ting: Kiam preteriras vi fenestron mian.....	88
Shu Ting: Ah, patrino.....	89
Shu Ting: Muntoĉeno.....	90
Shu Ting: Memento.....	91
He Jingzhi: Kanto pri la montoj kaj riveroj de Guilin.....	92
Qu Yuan: Ĉagreniĝo post disiĝo.....	95

Dramo

Zhang Wei: Revo ĉasata de esperantisto.....	108
---	-----

Eseo kaj artikolo

Xin Yue: Novluna skolo en la ĉina moderna poezio.....	110
Wei Da: Variantoj en tradukado de ĉinaj antikvaj poemoj.....	116
Guo Ji: Pearl S. Buck: usona verkistino inklinema al ĉinoj.....	123

Recenzo

Mao Zifu: Koloraj humuroj kaj kaŭstikaj satiroj.....	131
--	-----



Yin Jiaxin



Hejmeniri

1

La patrino telefonis al ŝi, ke baldaŭ urbo Udano estos atakata de neĝoŝtormo kaj ŝi devas tuj hejmeniri. Ŝi rigardis tra la fenestro. Kvankam estis la kvina kaj duono posttagmeze, tamen ekstere eknigris. La ĉielo pli kaj pli peze ŝarĝiĝis de plumbaj nuboj.

Elirinte el la pordego de sia kompanio, ŝi ektermis tutkorpe pro blovo de akra ventego. Kuntirinte la mantelon, ŝi paŝis al la parkumejo. Ekpluvetis subtile dum kelkaj neĝflokaj ekdancis en la aero. Ĝi estis la unua neĝo de la jaro 2018. La stratlampo ankoraŭ ne lumis, do ĉio ĉirkaŭe montriĝis nebula. Enironte sian aŭton, ŝi atentis ke ne proksime troviĝas eta silueto, kiu estas moviĝanta al ŝi.

Kiam ĉe ŝi la silueto haltis, ŝi vidis ke tiu estas knabineto kun ruĝa ronda vizaĝo, longa taŭzita hararo kaj densa nazmuko pendanta sur la lipo. La infano surhavis malpurajn vatitajn veston kaj pantalonon, kiuj estis tiel lozaj, ke ŝi aspektis kiel palac-lanterno.

Per frostfendetita mano levinte du monbiletojn al ŝi, la infano ploreme diris: “Onklino, saluton! Jen du juanoj. Mi donas al vi.”

“Onklino ne bezonas vian monon. Kion vi deziras?” demandis ŝi scivole.

“Vi eskortu min hejmen, ĉu bone?” petis la infano.

“Kial vi ne restas kune kun viaj gepatroj?”

“Panjo, mia panjo, kun mia frato en sia sino, malaperis. Ŝi forĵetis min.”

Larmoj ekruĝis sur la infanaj vangoj. “Panjo forĵetis min!”

“Ne tion diru! Ĉu eblas ke panjo forĵetas sian infanon?”

La infano klinis la kapon al la brusto.

“Ne ĉagreniĝu. Onklino nepre helpos vin.” Konsolante la infanon, ŝi malfermis la aŭtopordon.

Jam ĉesis pluveto, sed neĝo pli kaj pli furiozis, tiel ke la tero fariĝis blanka. Akra ventego ankoraŭ blovdadis.

Per buŝpapero deviŝinte la nazmukon kaj larmojn por la infano, ŝi startigis la aŭton kaj ĝian klimatizilon. Ŝi demandis: “Kie estas via hejmo?”

“En granda bazaro,” respondis la infano.

“Kio estas la nomo de la granda bazaro?”

“Mi ne scias. Mia paĉjo vendas legomojn. Ĉiumatene, tie estas multaj, multaj kamionoj, kun legomoj sur ili.”

“Ĉu estas Hagu-Grocejo?” Ŝi pensis, ke se ĉiumatene troviĝas multaj kamionoj ŝarĝitaj de legomoj, tie devas esti la grocejo ĉe la antaŭurbo.

2

“Tin, tin, tin...” Ŝia poŝtelefono sonis.

Denove estis la patrino: “Mia kara, ĉu vi jam ekiris?”

“Jam, panjo.”

“Bone. Atentu, nun neĝado fariĝis fortega kaj la vojo estas glitiga. Stiru malrapide, mi ne parolu plu, ne ĝenu vin.”

“Panjo. Mi ĵus renkontis vojperdintan infanon. Antaŭ ĉio mi devas ŝin eskorti al ŝia hejmo. Eble mi atingos hejmen iomete malfrue. Vi vespermanĝu kune kun paĉjo, ne atendu min.”

Neĝo jam iĝis neĝoŝtormo. Vere, estis malfacile por iu ajn veturilo moviĝi sur la vojo. En la aero kirliĝis kaj dancadis papili-similaj neĝflokaj. Surtere pli kaj pli dike amasiĝis neĝo. Survoje rampis zigzage veturiloj. Hazarde vidiĝis koliziintaj veturiloj ĉe la vojorando. Ŝi ekstreĉiĝis kaj la infano restis kvieta.

Por mildigi la streĉitecon, ŝi ekbabilis kun la infano: “Etulino, kio estas via nomo?”

“Mia nomo estas Eta Dikulino.”

“Kiomjara vi estas?”

“Mi, mi, kvin- preskaŭ sesjara.” respondis la knabineto, pensinte iomete.

“Do, ĉiutage vi vizitas infanĝardenon, ĉu?”

“Malofto vizitas. Mi havas malsanon, je la cerbo,” la infano montris sian kapon per fingro kaj daŭrigis: “Mi ĉiujare vizitas hospitalon, kelkfoje. Panjo diris, ke la familio, jam konsumis multe, multe da mono, por mia malsano; la familio ne plu havas monon, por min kuraci. Ŝi ne ŝatas min. Mian fraton ŝi ŝatas.”

“Kiomjara estas via frato?”

“Preskaŭ unujara. Panjo kaj paĉjo ŝatis min antaŭe.”

Ekster la aŭto daŭris la neĝoŝtormo, kaj rulpremite de veturiloj la neĝo surtere tuj frostiĝis. Veturiloj glitis kiel sur sapo. Tenante la stirilon firme, ŝi pli malrapidis.

Je la sepa horo, ili atingis la grocejon, sed la infano diris ke ĝi ne estas la granda bazo, kie ŝia familio estas!

“Ho, ve!” ŝi suspiris deprimate. Ŝi ekmemoris ke kvankam Udano ne estas granda, tamen troviĝas du legomgrocejoj.

“Do, via hejmo estas en Maŭĝan-distrikto, ĉu?” ŝi demandis la infanon.

“Mi ne scias.” Perpleksa rigardo montriĝis en la okuloj de la infano.

“Por iri al via hejmo, oni devas trapasi longan longan ponton, ĉu?”

La infano kapjesis palpebrumante. Ŝi turnis la aŭton al Maŭĝan-distrikto.

La furioza vetero ĉesigis la servadon de ĉiuj publikbusoj kaj surstrate malmultis veturiloj, plejmulte jam ekipitaj per radoĉenoj. Ŝi apenaŭ povis sin orienti. Ŝia aŭto antaŭeniris kiel ebrulo jen glitante jen zigzagante. Post kelka tempo, ŝi sentis sin elŝvitanta sur la polmoj, frunto kaj dorso. Nerimarkite, sidante en la seĝo, la infano endormiĝis kun la nazmuko fluanta en la buŝon kaj daŭre eliĝanta ĉe la buŝangulo.

3

Finfine, la neĝoŝtormo ĉesis kaj ambaŭflanke de la vojo la neĝotavolo densiĝis ĝisgenue. La iluminita stajponto aperis fronte de ŝi. Sed inter ŝi kaj la ponto kuŝis longa solida deklivo, tra kiu ŝi ne lertis aŭtadi en tia vetero kia la nuna. Ŝi descendis atente kaj malrapide. Ĉe la fino de la deklivo, subite, oni ne sciis kial, la aŭto glite alkuris antaŭen, pli kaj pli rapide, kvazaŭ sovaĝa ĉevalo galopanta. Ŝi, kun la kapo malplena, apenaŭ kapablis regi la aŭton. Tre baldaŭ la aŭto alproksimiĝis al kamiono, kiu sin ŝanceladis kun bruego. Por eviti kolizion, ŝi dekstere turnis la stirilon tiel energie, ke la aŭto impetis sur la trotuaron kaj kun “krak” rompis la balustradon de la ponto, ĝi paneis en la rompita breĉo. Ŝia kranio batis la fenestron tiel peze ke ŝi svenis. La infano vekigis pro skuego kaj ekploregis, tirante ŝin je la brako kaj el la tuta gorgo kriante: “Onklino, vekigu! Onklino, vekigu...”

Post pluraj minutoj, ŝi rekonsciiĝis.

La infano ne plu ploradis kaj demandis ŝin: “Onklino, ĉu la aŭto difektiĝis? Ni ne povos hejmeniri, ĉu?”

“Ne gravas, Eta Dikulino, estu trankvila. Onklino havos rimedon.”

Efektive, deprimate ŝi mem ne sciis kion fari. La kranio multe doloris al ŝi. Palpinte la kapon, ŝi tuŝis etan hematomon. Ŝi provis malfermi la pordon, sed vane, pro frostiĝo. Ŝi elprenis la poŝtelefonon por alvoki helpon. Bedaŭrinde, ĝia baterio elĉerpiĝis. Ŝi afliktiĝis, tiel ke ŝi preskaŭ larmis.

Kun sia dekstra frontrado pendanta en la aero kaj sia karoserio droninta en la dika neĝo, la aŭto sidis sur la difektita pontorando. Ĝi eble en la riveron falos en iu ajn momento.

Ekhaltis du preterpasantaj aŭtoj, el kiuj eliĝis kelkaj homoj. Vidinte ke troviĝas homoj en la akcidentaŭto, ili provis malfermi la pordon, sed ne sukcesis. Do, ili urĝe blokis la radojn per pecoj de la rompita balustrado, dume ili

poŝtelefonis al 110 kaj 120, kaj sekve ekbruligis ion ĉe la aŭtpordo por degeligi la glacieron.

Post momento, sinsekve 120-ambulanco kaj 110-policaŭto atingis la lokon, kiam la pordo de la akcidentaŭto malfermiĝis kaj eliĝis ŝi kun unu mano masaĝanta sian kranion kaj la alia tiranta la infanon. Por sekureco, la policanoj postulis ke la savintoj forlasu la scenejon. Asertinte, ke ŝi ricevis neniun vundon krom la eta hematomo, ankaŭ forveturis la ambulanco.

Laŭ la ordono de la policanoj, ŝi kaj la infano atendis en la policaŭto por ŝirmi sin kontraŭ malvarmego. Sed la timigita infano ne volis enaŭtiĝi, dirante: “Policano kaptas malbonulojn, mi ne estas malbonulo!”

Aŭdinte ŝian vorton kaj rigardante ŝian de nazmuko makulitan vizaĝon, ŝi eksentis la infanon kaj ridinda kaj kompatinda. Karesante la infanon je la kapo, ŝi konsolis: “Jen estas trafikpolicanoj. Ili helpas nin, ne kaptos vin. Vi estas bona infano, neniun policano kaptos vin.”

Tra la fenestro ŝi vidis, ke malgraŭ la malvarmego la du policanoj daŭrigis sian laboron: la maljuna fotadis tie kaj ĉi tie je la akcidentejo, dum la juna direktadis la trafikon. En ŝiaj okuloj la alta junulo, rekte starante sur la frostigita neĝogrundo, montriĝis vere impona.

Kiam alvenis tir-traktoro kune kun pluraj urĝriparistoj, la du policanoj ĝuste finis sian laboron kaj revenis al sia aŭto. La maljuna sidigis sur la ŝofora seĝo kaj la juna sur la apuda seĝo. La junulo sin turnis al ŝi, dirante: “Pardonon! Vi devas atendi plu momenton. Bonvolu montri al mi vian kondukpermeson.”

Ŝi la dokumenton elprenis kaj donis al la junulo, kies vizaĝon ŝi tiumomente vidis klare. Li aspektis vere okulfrapa.

“Ne ĉagreniĝu,” diris la junulo, registrante ŝian informon: “Morgaŭ, ĉu matene aŭ posttagmeze, laŭ via bontrovo, iru al la Tria Filio de Udana Trafikpolica Brigado, ĉe la alia ekstremo de la ponto, por elpreni vian aŭton kaj la raporton pri la akcidento.”

“Sinjoro, ĉu mi povus uzi vian poŝtelefonon? La mia elĉerpiĝis.” Ŝi petis honteme.

“Por raporti al la asekurkompanio?” demandis li.

“Tio ne urĝas. Mi deziras telefoni al mia panjo.”

Ricevinte lian poŝtelefonon, ŝi ekklavis. Subite ŝi ĉesis, demandante: “Kioma horo nun?”

“Duono post la naŭa.” respondis la maljuna policano.

“Ve, lasu! Mi prefere faras voĉmesaĝon.”

“Kial ne interparoli rekte?” demandis la junulo.

“Kutime mia paĉjo enlitiĝas je la naŭa, lia koro malsanas. Mi timas, ke la

telefonsonoro eblus lin vekoj surprizi.”

“Kia subtila fraŭlino!” laŭdis la maljuna policano.

Ŝi poŝtelefonis: “Panjo, mia telefono jam ne havas elektron. Mi timas ke vi maltrankviliĝas pro mi, do mi ĵus prunteprenis telefonon. Ĉe mi ĉio iras bone. Aranĝinte la infanon mi tuj hejmeniros, nur iomete malfrue. Paĉjo jam endormiĝis, ĉu? Ne atendu min, Panjo. Nun vi enlitiĝu. Ĝis, Panjo!”

“Kion signifas via ‘aranĝinte la infanon?’” demandis la juna policano suspekteme.

Ŝi detale diris pri la afero inter si kaj la infano.

“Ha, estas tiel! Nun vi ne kapablas daŭrigi la eskortadon. Ni devas transigi vin ambaŭ al policostacio, kaj tieaj policanoj traktos vian aferon.”

4

En la policostacio du policaninoj akceptis ilin.

“Fraŭlino, dankon pro via helpo al la infano! Nun vi povas hejmeniri. Ni tuj eskortos la infanon al la grocejo. Bonvolu kredi ke ni nepre trovos ŝiajn gepatrojn.”

“Kompreneble mi kredu policanon! Antaŭdankon al vi!”

Subite, en la kapon venis al ŝi tio, ke ŝi kaj la infano ankoraŭ ne vespermanĝis. Ŝi havis neniun apetiton, sed ŝi intencis aĉeti manĝaĵon por la infano.

“En tiel frosta vetero kaj je tiel malfrua horo, kie vi povas aĉeti manĝaĵon?”

Policanino elprenis iom da frandaĵo. Klininte la kapon super la frandaĵo, la infano manĝegis kiel lupido.

“Eta Dikulino, onklino hejmeniros. Ĝis revido!” ŝi adiaŭis la infanon.

Englutinte la plenbuŝon da manĝaĵo, levinte la kapon kaj rigardante ŝin per la konfuzaj okuloj, la infano demandis: “onklino ne volis min eskorti plu, ĉu?”

“Policaninoj-onkloroj eskortos vin, ili havas aŭton. Eta Dikulino estas bona infano, obeema infano. Sekvu la policaninojn-onklorojn, ĉu bone?”

“Bone.” La infano elpoŝigis la du monbiletojn kaj donis al ŝi, dirante: “Onklino, mi donas la monon al vi, mi dankas vin.”

Ŝi forpuŝis la monon, dirante: “Dankema vi estas! Enpoŝigu la monon, Onklino ne bezonas. Se vi deziras fari ion por danko, do, memoru la aferon okazintan ĉi-vespere. Sufiĉe!”

“Bone. Onklino, mi volas kanti por vi.”

“Bonege!”

La ĉeestantoj ekaplaŭdis kaj la infano kantis jene:

“Serĉu, serĉu,

Saluton!
Bonvenon!
Vi estas
mia amiko.”

5

Kutime ŝi alvokis taksion per la poŝtelefono, sed nuntempe ŝia telefono ne funkciis. Ŝi devis per mansvingado haltigis taksion ĉe la stratrando. La blanka strato malplenis kaj neniu iranto vidiĝis. De tempo al tempo preterrampis veturilo kvazaŭ heliko. Hazarde alveturis taksio, sed ĉiam okupita.

Ventego kontinue blovdadis. Neatendite ekneĝis denove. Sobiĝis neĝoflokoj luliĝante kvazaŭ leĝera virino. Ŝi sentis solecon ankore kaj malvarmon surkorpe. Ŝi rememoris ĉi-vesperajn okazaĵojn: la infano, la neĝoŝtormo, la kolizio, la policanoj, la poŝtelefono ...

“Ve, Ĉielo!” ŝi ekmiris: “Per la poŝtelefono sen elektro, kiel mi pagos por taksio?”

Kutime ŝi pagis per sia poŝtelefono, neniam portante kun si monbileton. Konsiderinte tion, ŝi konsterniĝis, kiam blua aŭto malrapide glitis al ŝi. La stiristo estis junulo en vesto el lanugo. Mallevinte la fenestron, li al ŝi vokis: “Ha lo, belulino! Eniru!”

Ŝi ĝojis rekoni en li la junan policanon.

“Ho, estas vi?” demandis ŝi surprize, enaŭtiĝinte.

“Fakte mia deĵoro finiĝis je la sesa. En tia vetero sendube multas akcidentoj, do mi memvole longigis la deĵoron.”

“Bona junulo, vere!”

“Jen iom da frandaĵo.” al ŝi enmaniginte pakajon, li diris: “Mi pensas ke vi certe malsatas.”

La pakajon ŝi metis apuden, dirante: “Dankon! Mi ne sentas malsaton nuntempe.”

“Mi eskortos vin hejmen, ĉu bone?”

“Ne ĝenu vin. Mi povas trafi taksion.”

“Ĉi-momente trafi taksion? Ha ha, ne eblas!” kun certeco li diris: “Lasu! Trafu mian aŭton. Ĝuste, estas oportune por mi.”

“Oportune?” ŝi ridetante demandis: “Ĉu vi scias kie mi loĝas, se vi diris ‘oportune’?”

“Kie?”

“Lahe-vilaĝo.”

“Ne gravas. Ne malproksime de mia domo.” Li mensogis bonintence.

“Nu, mi ne kredas.”

“Belulino! Mi petas, ke vi donu al mi ŝancon eskorti junulinon, kiu estas tenera, bela kaj ĉarma. Ĉu bone?”

Fininte la parolon, li ŝtele direktis la okulojn al ŝi, kiu ruĝiĝis kun rideto ludanta ĉe la buŝangulo.

Survoje, ili babiladis pri sia okupo, interesiĝo, hobbio kaj tiel plu. Li sentis sin plezura elkore kaj ŝi varma tutkorpe. Ne rimarkinte ili proksimiĝis al Lahevilaĝo.

“Mi memoras ke troviĝas ponteto inter la ŝoseo kaj la vilaĝo. Se la ĝisgenua neĝo ne forŝoveligiĝis, mia aŭto ne kapablas trapasi la ponton.” diris li maltrankvile.

“Ne gravas. Mi piediros hejmen, mia domo estas ĝuste apud la ponto.”

“Mi piede akompanos vin ĝis via domo.”

Ŝi nenion diris. Rideto refoje ekludis ĉe ŝia buŝangulo.

Kiam lia aŭto atingis la ponton, mirigite ili malkovris, ke sur la ponto situas senneĝa vojo sufiĉe larĝa por unu aŭto, kaj malgraŭ la flirtantaj neĝoflokoj du homoj estas ankoraŭ balaantaj la vojonojn. Ŝi tuj en ili rekonis siajn gepatrojn. Haste elauĝitiĝinte, ŝi alkuris kaj emocie kriis: “Panjo! Paĉjo!”

Ŝi sin jetis en la sinon de la patrino. Larmoj torentis el ŝiaj okuloj.



Aeratako

de Yin Jiaxin

Malamikaj aviadiloj frekventis nian urbeton en la jaro kiam mi estis dek-jara. Super la urbeto ofte sonoris urĝaj alarmoj pri aeratako, iam eĉ en unu tago kelkfoje. Baldaŭ post eksonoro, bombaviadiloj hurle alvenis unu post alia. Distanca de la urbeto je du kilometroj estis gandega kaverno, kiun oni uzis kiel ŝirmejon. Do, ĉiufoje kiam la terurigaj alarmoj eksonoris, oni kun preparitaj manĝaĵoj kaj akvo tuj impetis ekster la urbeton al la kaverno.

Iun malfrumatenon de la somero, abrupte eksonoris orelpikaj alarmoj pri aeratako. La gepatroj haste forkuris portante miajn gefratojn en siaj brakoj, dum ilin sekvis mi, kaptinte la korbon kiu entenas manĝaĵojn kaj akvon. Sur la ŝoseo panike svarmis urbetanoj: iuj tirantaj aŭ portantaj infanojn, iuj rajdantaj biciklon aŭ triciklon kun siaj familianoj, iuj eĉ pelantaj siajn brutojn. Oni streĉite galopis antaŭen per ĉiuj siaj fortoj. Mi ne povis kuratingi la gepatrojn, kiuj jam malaperis en la homfluon.

Post nelonge aŭdiĝis malklare bruoj de aviadiloj kaj tuj poste klare tiuj de eksplodoj. Oni konsternite diskuris kun akraj plorkrioj kaj surprizvokoj.

Je la duona distanco, mi tre laciĝis, la koro batadis rapide kaj al mi ekdoloris la brusto. Survoje malmultiĝis homoj, plejparto de kiuj estas maljunaj aŭ kadukaj. En la ĉielo aviadiloj tondris, dume, jen tie kaj jen ĉi tie okazis bombado. La tero vibradis sub miaj piedoj kvazaŭ mi restus sur elasta lito. Subite, post mi alŝvebis bruo de infana plorego. Mi apenaŭ turnis la kapon por rigardi, kiam unu aviadilo muĝe preterflugis malalte super la kapo kaj bombo eksplodis ĉe mi. Mi skuigite falis surteren. Feliĉe mi ne vundiĝis, sed zumoj eĉe resonis en la oreloj. Ĝuste tiam min preterpasis triciklo kun du infanoj ploregantaj en la varujo. Ho ve, Ĉielo! La rajdanto ne havis la kapon, ĉe la kolo ŝprucis sango kiel fonto kaj liaj piedoj ankoraŭ pedaladis. Mi preskaŭ svenis de timo kaj esploris. Leviĝinte kaj preninte la korbon, mi flugrapidis antaŭen kvazaŭ la animo perdiĝus. Tamen, baldaŭ mi ne povis daŭrigi la kuradon, sentante la piedojn kaj la korbon ekstreme pezaj. Malgraŭ plena elĉerpiĝo mi pene gurdis movojn de la kruroj en la direkto al la kaverno.

Mi daŭre trenis la krurojn al la celloko, hazarde renkontante sangajn kadavrojn aŭ vunditojn surtere. Proksime de la aperturo de la kaverno, surdorse

kuŝis nuda viro, kies ambaŭ manoj protektas sangajn intestojn sur lia ventro, plengorĝe kriante: “Helpon! Helpon!” Je la vido de la sceno, miaj kruroj moliĝis kaj la korpo ektermis. Mi malforte falsidiĝis kaj sufokiĝis de plorego.

Du ambulancaj servistoj alkuris la scenejon kun blankardo. Ĝuste kiam ili ekmovis la viron, neatendite, la intestoj disglitis sur la teron. Mirigite sin levis la viro, kies ridoj miksiĝis kun larmoj. Li laŭte kriadis: “Hejmeniru tagmanĝi! Hejmeniru tagmanĝi...” Li foriris pli kaj pli foren, ridante, saltante, svingante la manojn kaj ripetante “Hejmeniru tagmanĝi! Hejmeniru tagmanĝi...” Eble li jam freneziĝis.

Tiuokaze la du ambulancaj servistoj portis min per la blankardo al la kaverno. Ĉe la aperturo interpuŝe amasiĝis homoj, kiuj maltrankvile observadis la eksteron por serĉi kaj atendi siajn familianojn. Mia patro renkontis min tie. Vidinte la patron, mi plorvokis: “Paĉjo! Panjo...”

“Mi estas ĉi tie. Via panjo ene flegas viajn gefratojn.” Li larmante premis min al sia sino kaj demandis: “Kiel vi fartas, mia filo? Ĉu vi vundiĝis?”

Mi plore skuis la kapon.

Suspektante li denove demandis: “Kial la korba kovrituko dense makuliĝis de sango?”

La patro malkovris la tukon. Ho ve, Ĉielo! En la korbo troviĝis homkapo kies okuloj estas malfermitaj.



Pipi



KVIETA RIVERBORDO

Frumatene, tuj kiam la lampiroj elŝaltis siajn vostlampojn, matenruĝo leviĝis. Ĉio vekigis de sia dormo. Vekiĝis homoj, bestoj, montoj, arbaroj, riveroj, insektoj ...

Vekiĝis ankaŭ la du birdoj, kiuj kovas ovojn nestante en la arbetaro ĉe la rando de la kanejo tuj apud la rivereto. Ili frotis la lacajn okulojn, larĝe oscedis, kun disfalditaj flugiloj, al la suno leviĝanta oriente, kaj vigle kaj ĝissate spiris la freŝan aeron.

Nova tago komenciĝis. La ĉielo estis serena, la suno estis fajroruĝa, la vivo restis bela, kaj ili sin trovis tre feliĉaj kaj gajaj.

Post la matenmanĝo, la birdino diris al la virbirdo:

"Laŭ miaj kalkulo kaj antaŭsento, post kvin tagoj niaj kvar idoj estos elkovitaj. Hodiaŭ matene estas via vico garde stari. Estu multe pli singarda dum la gardostarado, se io venos, tuj donu al mi alarmon per trifoja fajfado."

"Bone, estu trankvila!" la virbirdo ĝoje kapjesis kaj tuj flugis sur la altan kaj grandan arbon ne malproksime de la arbetaro por la gardostarado.

Tiaj ili ĉiam estis: alterne kovantaj ovojn kaj gardostarantaj. Ili havis bonan kaj klaran labordividon, nome ke kiam unu el ili kovis ovojn en la nesto, la alia staris garde sur la arbo.

Ĉe la rivereto estis tute pace kaj trankvile.

Kelkan momenton poste unu viro estis iranta laŭlonge de la bordo de la rivero direkte al la arbetaro.



La virbildo sur la arbo vidis de malproksime la viron kaj tuj fajfis tri fojojn al la birdino. Ĉe tio, la birdino tuj fariĝis nervoza kaj singarda kaj estis preta forlasi la neston en iu ajn momento.

La viro aliris al la arbetaro pli kaj pli proksime.

La birdino jam de fore aŭdis la paŝbruon pli kaj pli proksimiĝantan. Ĝi aplombe eliris el la nesto kaj tra la arbetaro eniris inter la herbojn apudajn.

Apenaŭ la viro preterpasis la herbojn, kie la birdino kaŝiĝas, abrupte la birdino kun granda bruo batante per siaj flugiloj flugis el inter la herboj en la aeron. Tio ŝetis la viron en panikon. Kun timokrio la terurita viro saltis posten unu paŝon. La birdino flugpendis en la aero antaŭ la viro nur momenton, kaj poste faligis sin peze kiel ŝtono sur la teron kelkajn paŝojn for de li, senĉese frapante per la flugiloj la teron kaj kun raŭka ĉirpo, tutkorpe konvulsiis, kaj dolore tordis sin, kvazaŭ baraktante en agonio. Ĉe tio, la viro volis senprokraste hasti antaŭen, supozante, ke ĝi estas grave vundita kaj faras la lastan spiron.

Sed ĝuste en la momento, kiam la viro estis preta fari unu paŝon antaŭen por kapti ĝin, kontraŭ ĉia atendo la birdino tuj leviĝis de la tero, pafiĝis en la aeron, kun frapo de la flugiloj kaj kun la rapideco de fulmo flugis for.

La viro ŝtoniĝis de mirego. Li buŝaperte staris senmovva surloke, kaj longe okulsekvis la birdinon ĝis ĝi perdiĝis en la vasta kaj densa kanaro.

La viro estis tute konfuzita de la neatendita sceno. Post longa momento li rekonsciĝis el stuporo kaj timo, foriris konsternita.

La virbildo sur la arbo klare vidis ĉion okazintan sube kaj subridis je la malsaĝeco de la viro.

La birdino haltis kaj ripozis sur la supro de la arbo meze de la kanejo. Post kiam la viro malaperis el la vido en la nebulan malproksimecon, ĝi ankaŭ ridis, dirante al si en la menso: "Kia malsaĝulo! Tio estas nur mia artifiko. Mi ne atendis, ke li vere estis trompita de mi!"

Post momento, la birdino reflugis, eniris en la arbetaron, sidiĝis en la nesto kaj kovis la ovojn kun trankvila koro. Baldaŭ ondo da dormemo atakis ĝin.

Ĉe la arbetaro denove restariĝis kvieto, krom ke gargare gluglis la rojo karambolanta kun ŝtonoj dum sia fluado, kaj gaje murmuretis la folioj milde karesataj kaj kisataj de la matena brizo.

Vidante, ke la birdino restis kvieta en la arbetaro, la virbildo ŝtele flugis aliloken por ludi kun aliaj birdoj. Al ĝi malplaĉis longe restadi sur la arbo. Kiam ajn prezentiĝis okazo, ĝi dizertis de la posteno sen ke la birdino tion sciis. Momenton poste, alvenis alia viro.

La paŝoj aŭdiĝis pli kaj pli klare. La birdino ne sciis, ĉu tio estas en sonĝo aŭ en duondormo, kiam ĝi aŭdis la paŝbruon. Kvazaŭ subite pikita de kudrilo, ĝi

tuj malfermis siajn dormemajn okulojn kaj streĉis la orelojn. Ĝi jam aŭdis la paŝbruojn pli kaj pli klariĝantan. Ĝi akre riproĉis en si la virbirdon: "La danĝero jam aperis. Kiel vi ankoraŭ ne donis al mi alarmon? Kio vin okupas nun? Ĉu vi distriĝas aŭ ...?"

La viro jam troviĝis antaŭ la arbetaro. Ĝuste en tiu ĉi kriza momento la birdino, ne hezitante plu, tuj rekte sagis el la arbetaro eksteren kaj ludis ĉe la viro la saman malnovan artifikon, kian ĝi jam ludis ĉe la antaŭa viro. Sed la viro estis saĝa kaj riĉa je scio kaj sperto. Li sentis nek timon, nek surpriziĝon, ĉar li bone sciis, ke tio estas la artificio de la birdino por forlogi lin for de ĝia loĝejo.

Post kiam la birdino forflugis, la viro direktis siajn paŝojn al la arbetaro, klininte sin, permane ambaŭflanken dispuŝis la branĉetojn plenajn de dornoj. Li disradiis ĝojon kiam li trovis sur la tero neston kun kvar ovojn en ĝi. Li al ili faris nenion kaj kuris hejmen en rekorda tempo.

Nelonge post la foriro de la viro, la virbirdo, tre laca kaj elturmentita de la amuziĝo, reen flugis sur la arbon. Ĝi sciis nenion pri la okazintaĵo. Baldaŭ ĝi dormemiĝis. Pro timo, ke la birdino vidos ĝin dizerti, ĝi kaŝis sin inter densajn foliojn, kaj enfalis en profundan dormon, kun kapo kaŝita sub la flugilo.

La viro faris por la birdo kaptilon el ĉevalharoj, kaj poste tuj revenis al la arbetaro kun ĝi en la maldekstra mano kaj kun birdkaĝo en la dekstra. Koincide tiam la birdino ne estis en la nesto kaj la virbirdo ankoraŭ estis ĝuanta tre dolĉan sonĝon kaj sciis nenion pri la alveno de la viro. La viro rapide metis la kaptilon ĉe la neston, poste fulme foriris, kaŝis sin post arbo en iom granda distanco kaj gvatokule atendis la birdinon reflugi kaj eniri la arbetaron.

Post nelonge la birdino, serĉinte por si nutraĵon, reflugis sur la arbon, sur kiu la virbirdo devus garde stari. Ĝi estis tre furioza kaj volis ordigi al la virbirdo la kapon pro tio, ke ĝi ĵus ne donis fajfadon, sed ĝi ne trovis la virbirdon kaŝiĝantan kaj profunde dormantan inter densaj folioj. Poste ĝi flugis de la arbo en la arbetaron. Ĝi ne rimarkis la kaptilon metitan de la viro. En la ĉirkaŭaĵo regis paca silento kaj ĉe la nesto ĉio estis en ordo kaj restis kiel antaŭe. La birdino sidiĝis sur la ovojn en la nesto, kaj baldaŭ la dormo ankaŭ eklulis ĝin.

Vidante, ke la birdino reiris en la arbetaron, la viro disradiis ridetojn, frotante al si la manojn pro ĝojo kaj murmuretante al si mem: "Hahaha! Vi baldaŭ apartenos al mi!"

Pasis longa tempo. Konstatinte, ke la birdino jam estis enirinta tra la kaptilo la neston, kun la kaĝo li alpaŝis al la arbetaro per paŝoj delikataj kiel tiuj de kato. La virbirdo ankoraŭ troviĝis en la ŝtona dormo kun kapo kaŝita sub la flugilo kaj ne donis alarmon.

Kun kurbigita dorso, la viro leĝerpaŝe estis alpremiĝanta al la arbetaro paŝo post paŝo. La birdino en somnolo nenion perceptis. Kiam la viro estis jam en la distanco de malpli ol du paŝoj de la arbetaro, li senatente surpaŝis velkintan branĉeton kuŝantan surtere. La abrupta kristala krako de rompita branĉeto vekis el la somnolo la birdinon, kiu, terure timigita kaj surprizita, sen perdi momenton disvolvis la flugilojn kaj intencis elflugi el la arbetaro, sed malsukcesis pro tio, ke ĝiaj flugiloj alkröĉiĝis al la ĉevalharoj. Ĝi superforte frapadis per la flugiloj kaj pene baraktis por sin liberigi.

Je tio, la viro senprokraste ĵetis sin antaŭen kun malfermitaj brakoj kaj kaptis ĝin sen granda peno.

Ondo da histeriaj korŝirantaj akraj krioj de la birdino traŝiris la aeron, frakasis la trankvilon de la riverborda mateno kaj ankaŭ elŝiris la virbirdon el la morta dormo. Jam estis tro malfrue, kiam ĝi volis fajfi. Ĝi pentis, ke ĝi ne devis dormi tiel morte. Ĝia koro disŝiriĝis ĉe la vido, ke ĝia amata edzino falis en la manojn de la viro. Memriproĉo kaj rimorso pikis ĝin. Ĝiaj okuloj ĵetis fulmon. Ĝi tre volis, riskante sian vivon, ĵeti sin suben kaj repreni la birdinon el la manoj de la viro, sed ĝi rezignis la ideon ĉe la penso, ke la ovoj bezonas esti kovataj kaj flegataj. Por la nekovitaj idoj ĝi estis devigata sufoki siajn koleron kaj doloron en la koro, kun larmoj en la okuloj.

La viro senhaste enkaĝigis la birdinon, kaj poste riparis la difektitan kaptilon kaj fiksas ĉe la neston. Li bone sciis ke estas alia birdo, kiun li ankaŭ forte deziris enmanigi.

Tra la larmoj la virbirdo vidis ĉion faritan de la viro kaj ekkomprenis la insidan intencon de la viro.

Plena de ĝojo, la viro iris hejmen kun la bela birdino. Survoje la birdino nekomprene demandis al la viro:

"Sinjoro, mi jam estas en viaj manoj, kompreneble estas tute neeble por mi eskapi el via mankavo, sed io konfuzas min, kiel vi travidis mian artifikon kaj kiel vi sciis, ke en la arbetaro estas nesto?"

La viro respondis kun gaja grimaco:

"Mi volas sciigi al vi du aferojn. La unua estas: ne pensu, ke ĉiuj estas stultaj kaj povas esti tiel facile trompitaj de vi. La dua estas: vi ne devis elflugi el la arbetaro kiam vi aŭdis miajn paŝojn. Por diri al vi la veron, se ne pro tio, ke vi elflugis el ĝi kaj ŝajnis vin morta, mi tute ne sciis, ke en la arbetaro nestas birdo kovanta ovojn."

Aŭdinte tion, la birdino tre pentis pri sia ago, sed estis jam tro malfrue.

Post la reveno hejmen, la viro donis al la birdino manĝaĵon, sed tiu ĉi rifuzis manĝi, eĉ ne ĵetis al ĝi unu rigardon, dirante: "Mi preferas morti de malsato ol manĝi vian manĝaĵon."

Kolerigita, la viro forĵetis disten la manĝaĵon, dirante en si: "Mi estas certa, ke vi malsatos. Mi atendas, ke vi petos de mi kompaton kaj manĝaĵon!"

La birdino banis sin en siaj larmoj la tutan tempon pro pensado pri siaj karaj ovoĵ kaj edzo. Ĝi penis kalkuli en si, kiel ĝi povus elturniĝi el la embarasa situacio.

Longan momenton poste, kiam la virbirdo vidis ke la viro jam foriris, ĝi flugis de la arbo en la arbetaron. Kun forte batanta koro kaj kun granda singardemo ĝi evitante la kaptilon enŝoviĝis en la neston kaj daŭre kovis la ovojn kun streĉitaj oreloj kaj okuloj.

En la tagmezo de la sama tago, tuj post la tagmanĝo, la avidema viro refoje reiris por kapti la virbirdon. Sed li ne sciis ke la virbirdo estas mirinde saĝa kaj prudenta.

Kiam la virbirdo de malproksime aŭdis la paŝojn pli kaj pli proksimiĝantaj al la arbetaro, ĝi ne disfaldis la flugilojn kaj tre singarde, nerimarkite elglitis tra la kaptilo el la nesto, kaj malaperis en la kanaron.

Estis nenio en la nesto krom kvar ovoĵ, kaj la kaptilo restis tute sendifekta sur sia loko same kiel antaŭe.

La viro revenis hejmen, deprimita kaj trista, kun malplenaj manoj.

Tuj post la foriro de la viro, la virbirdo tra la kaptilo tre singarde reglitis en la neston kaj kovis la ovojn.

Frumatene en la sekvanta tago, la viro ankoraŭfoje iris tien por kapti la virbirdon, kiu, aŭdinte la kresĉendan paŝbruon, tuj senbrue forŝteliĝis.

La viro nenion trovis, kaj hejmeniris, ree kun kapo penda kaj kun nazo longa.

Ĉe la aŭroro de la tria tago, li denove iris tien provi la fortunon, sed nenion li rikoltis same kiel en la antaŭaj du fojoj.

La sopirego al la edzo kaj la baldaŭ elkovotaj idoj kaj soifo kaj malsato ekstreme turmentis kaj konsumis la birdinon. Ĝi malvigliĝis, malgrasiĝis, malfortiĝis, preskaŭ kolapsis, kaj la tutan tagon najlis sian rankoran kaj sombran rigardon ekster la kaĝon, rigide, senhelpe, dolore kaj malespere.

Vidinte ke la viro hejmen venis kun malplenaj manoj kaj kun malsarena mieno en sinsekvaj tri fojoj, la birdino havis la senton, ke la virbirdo kaj la ovoĵ estas sekuraj. Ĉe tio, ĝia sanganta koro konsoliĝis kaj ĝiaj zorgoj malpeziĝis, kvazaŭ peza ŝtono defalis de ĝia koro. En la sama momento brila ideo krepuskiĝis en ĝia kapo.

Ĝi alvokis al si la viron, almozuline petante:

"Sinjoro, jam de pluraj tagoj mi nenion manĝis, nun mi preskaŭ malsatmortos. Rapide donu al mi manĝaĵon, mi estas terure malsata!"

Aŭdinte tion, la viro tuj demandis kun longigita vizaĝo:

"Bone! Sed antaŭ ĉio permesu al mi meti demandon al vi: kial mi iris tien tri fojojn kaj ne vidis la alian birdon? Diru al mi kie ĝi estas?"

La birdino tuj komprenis, ke la viro celis eltordi el ĝi la informojn pri la virbirdo. Pripensinte iom da momento, ĝi respondis:

"Mi ne diru tion al vi, antaŭ ol mi kvietigos mian malsatan stomakon, kiu murmuris pro malpleno."

Sen alia rimedo, la viro obeeme alportis manĝaĵon al la birdino. Tiu manĝegis. Sate manĝinte kaj trinkinte, la birdino diris kun serena mieno:

"Sinjoro, multe pli bele kaj komforte estas ĉi tie, ol en la arbitaro, anstataŭ foriri mi decidis resti ĉe vi por eterne. Mi tre esperas, ke vi laŭeble baldaŭ kaptu la virbirdon, hejmen alportu ĝin kaj la neston kun la ovojn, kaj metu ilin kune kun mi en la kaĝon, ĉar mi estas tre solece izolita kaj mizera kaj tre sopiras al ili. Mi ne povas malhavi ilin. Sen ili ĉe mi, mi nek ĝojas nek povas vivi bone. Se mi mortos de melankolio, vi havos nenion!"

Sur la trista vizaĝo de la viro tuj aŭroris rideto. Post mallonga konsidero, li sondtone demandis kun rideto ĉirkaŭ la buŝo:

"Birdo, mi eĉ ne scias kie estas la virbirdo, kiamaniere mi kaptos ĝin?"

La birdino respondis:

"Supozeble vi ne scias, ke la virbirdo ne reiros en la neston se ĝi ne vidos min! Plej bone estas, ke vi malfermu la kaĝon kaj ellasu min, por ke mi reiru kaj kunestadu kun ĝi. Mi garantias al vi, ke vi povos ne sole kapti nin ambaŭ per unu fojo, sed ankaŭ ricevi kvar idojn en la proksima estonteco, kondiĉe ke mi restos kun la virbirdo!"

Je tio, la viro tuj alprenis seriozan mienon. Kuntirante la nazon, li diris inter la dentoj:

"Vi, ruza kaj artifikema birdo ĉiam majstranta pri eltrovaĵoj, denove intencas ludi ĉe mi malpurajn artifikojn? Ĉu vi celas forsavi vin? Mi ne kredas viajn vortojn, ankaŭ mi ne lasos min trompi de vi! Ĉesu kun via ruzaĵo!"

La birdino serioztone diris:

"Vi ne bezonas havi skrupulon. Tio, kion mi diris al vi, estas vere el mia bonfaremo kaj tute celas vian bonon. Mi intencas nek artifiĉi, nek trompi vin. Mi havas idojn ankoraŭ ne elkovitajn, mi ilin tre amas kaj estas kovanta, kiel mi povas forsavi min sen zorgo pri ili? Bonvolu forpeli ĉiujn dubojn!"

La viro estis avidulo. Granda avideco ekregis lin. Sur lia vizaĝo baraktis dubo kaj hezito. Jen gratante sin post la orelo, jen frotante al si la frunton, li maĉis

kaj remaĉis la vortojn de la birdino, sentante, ke ili ŝajnis tute kredeblaj. Pesinte la gajnojn kaj la perdojn, fine li cedis al la propono de la birdino.

"Bone! Mi konsentas forliberigi vin!" la viro deĵetis de si la seriozecon kaj diris kun malica rideto. "Sed se vi aŭdacas trompi min, mi iros disrompi viajn ovojn kaj malkonstrui vian neston!"

"Komprenite! Faru, kion vi volas!"

Fine la buŝa interkonsento estis tiel farita post longaj marĉandoj.

Antaŭ la forflugo, la birdino foj-refoje avertis al la viro:

"Kara sinjoro, nepre memoru: vi iru kapti nin ne pli frue, ol post du tagoj, alie, vi nenion akiros. Adiaŭ!"

Ĉe la lastaj vortoj, la birdino forflugis kiel sago direkte al la riverbordo.

La viro ne sciis, ke la ovoj krevos kaj la idoj elkoviĝos post du tagoj.

Frumatene post du tagoj, la viro leviĝis tuj kiam la koko kokerikis la unuan fojon. Turmentata de longa atendo, sed ebria pro dezirego, la viro kun malplena kaĝo sagis tien por kapti unufoje la du birdojn, plena de espero kaj ekscito. Sed je lia desappointiĝo la du birdoj estis for kaj en la nesto nur postrestis rompita pecoj de ŝeloj. La kaptilo restis tute netuŝita kaj sendifekta sur la loko same kiel antaŭe.

Antaŭ kelke da horoj la ovoj jam krevis, kaj la birdidoj elŝeliĝis, sin forsavis, kaŝiĝis inter herboj.

La viro ĉirkaŭkirliĝante apud la arbetaro kaj ĉirkaŭrigardante traserĉis la du birdojn en ĉiuj anguloj dum longa momento, sed li nenion trovis.

Frapante al si la kapon, la viro subite ekkonsciis, ke li estis trompita de la birdino. Li falsidiĝis senluziŝinta teren. Senlima pento forte ronĝis lin. Kun larĝe malfermitaj okuloj, li turnis la rigardon, jen de la malplena nesto al la malplena kaĝo, jen de la malplena kaĝo al la malplena nesto, kaj poste li eksplodis en ploron, senĉese batante permanplate la teron.

Tamen la du birdoj sur la arbo en ne granddistanca loko tre klare kaj melodie fajfis, ĝoje kaj gaje dancis svingante sin tien kaj reen.

Kaplevinte, je la ekvido de tiu sceno, la viro, obsedata de pento, freneze ŝiris al si la harojn, batadis al si la bruston, tordis al si la manojn, kaj svenis de kolero. Depost tiam, anstataŭ en la arbetaro la du birdoj konstruis sian neston inter la branĉoj de alta arbo aŭ en la krevajoj de la roko aŭ en la kaŝejo de la rokkrutaĵo. For de ajna danĝero kaj minaco, ili vivis vivon liberan kaj senzorgan, ĝojan kaj plezurajn, kiel ĉe la brusto de Dio.

Sun Dachen



Pasanto en nokto

(mikronovelo)

Aŭtuna nokto, 2030. La vilaĝo dronas en dormo. Kun pakaĵoj li frapas je la pordo de sia hejmo.

“Kiu frapas?” aŭdiĝis la voĉo de lia edzino

“Via edzo.”

Malfermiĝas la pordo, kaj tuj ilin kaptas surpriziĝo .

“Antaŭ 16 jaroj vi mortis en la kraŝo de MH370, ĉu ne?” ŝi demandas post longa tempo.

“Jes, sed nun mi staras ĉe vi! ”

“Ĉu vere? Vi ne mortis?”

“Vere!”

“Tamen... nia amo... jam mortis...” ŝi murmuris balbuteme. ...

En la nokto, hundoj vidas la pasanton.



Yisu (1946-)



Lasu min eniri

elĉinigis Yang Long

**Yisu (jisu): ĉindevena fekunda verkistino, nun loĝanta en Kanado*

Polica inspektistino Perlo Fang kunvenis kun siaj subuloj.

“Tiu ĉi kazo rilatas al mortigo pro venĝemo inter sekretaj bandoj. Ĝi kaŭzas maltrankvilecon ĉe urbanoj. Estas necese solvi la kazon kiel eble plej baldaŭ.”

Frapinte je la pordo, la sekretario subite eniris kaj flustris kelkajn vortojn en ŝian oreilon.

Ŝi montris iom surprizitan mienon kaj diris al siaj kolegoj: “Pardonon. Mi devas forresti dum dek minutoj.”

Ŝi forlasis la kunvenejon kaj rapideme eniris la oficejon. Apenaŭ ŝi eniris, jam aŭdiĝis: “Perlo, ĉu vi fartas bone?”

Ŝin kaptis surprizo kaj ĝojo. “Kia vento alportis vin ĉi tien, majstro Yang? La alveno de vi gravulo donas al nia oficejo gloran brilon!”

La nomata majstro, kiu estis mezaĝulo kun paro da brilaj okuloj, eksplodis per ridego.

Li diris: “Perlo, via kapablo jam superas la mian. Kia modesteco!”

Fang alportis kafon. “Vi jam tro flatis min. Por kia afero vi turnas vin al mi, majstro Yang? Ĉu mi povas fari ion por vi?”

Majstro Yang diris: “Mi volas revenigi vin al la sekcio pri murdaj kazoj por solvi kriman kazon.”

Fang levis alten unu brovon.

“Vespere de la lasta merkredo la filino de parlamentano Zhou Guangxing estis murdita. Ĉu vi scias pri tio?”

“Mi legis pri tio en ĵurnalo.”

“Ĝis nun la kazo troviĝas en gordia nodo. Zhou sin turnis al la buroestro por plendi. La estro alvokis min kaj ordonis al mi bone trakti ĝin.”



Perlo duonvoĉe diris: “Ĉiutage ni traktas kelkajn kazojn de murdado. Ni egale penas ilin solvi.”

“La estro sankciis, ke vi laboru en mia sekcio dum unu semajno.”

“Mi estas enketanta kazon de murdo inter sekretaj bandoj.”

La majstro ekridetis. “Portempe flankenmetu ĝin.”

Perlo ne povis doni decan respondon.

“Perlo, vi estas mia plej bona lernanto. Mi anticipas, ke vi povos solvi la kazon en sepdek du horoj.”

Li metis stakon da dokumentoj sur la tablon, kio signifis premon sur ŝi.

“Mi volas reiri al la ĉefsido. Mian traktadon bezonas la kazo pri ĉeno da knabinaj perdiĝoj en la distrikto Daqing.”

Perlo akompanis sian majstron al la pordo.

Turninte sian kapon, li demandis: “Ĉu vi havas koramikon?”

Ŝi lin enpuŝis en lifton.

Reirinte en la kunvenejon, ŝi diskutis kun siaj kolegoj, kiel enketi la kazon. Poste ŝi diris al sia asistantino Wang Mei: “Prenu mian respondecon. Bone faru meritojn por promociiĝo. Mi estas transpostenigota por solvi kazon de murdo.”

“Ĉu tiu kazo pri la filino de parlamentano Zhou?”

“Ha, kiel sagaca vi estas!”

“Inspektistino Fang, kunportu min.”

“Ne, ĉi tie mankas manoj.”

“Vi des pli bezonas min,” la asistantino persistis.

“Ni devas solvi la kazon en sepdek du horoj.”

“Tio ne estas malfacila por ni,” certis Wang Mei.

“Bone, sekvu min.”

Ili sidiĝis en la oficejo kaj disfaldis la dokumentojn sur la tablo.

Post legado Wang Mei stuporiĝis. “Kiel feroce murdinto!”

Perlo Fang sin tenis senparola.

Tiuj estis konfidencaj dokumentoj.

Zhou Ziyu, deknaŭjara junulino, estis murdita en sia hejmo. La murdilo estis golf-klabo, kiu rompiĝis pro troa forto de la murdinto. Tamen li ne kontentiĝis pri tio. Li enŝovis la rompitan klabon en ŝian kolon kaj volvis ŝiajn harojn ĉirkaŭ ŝia kolo. La kapo de la junulino aspektis kiel ĵetrompita torto, tro tragika por vidi.

“Kiu, kiu tiom ŝin malamas?”

Fang demetis la foton kaj asertis: “Ŝi estas murdita pro amo.”

“Sed vidu la dokumenton. Polico konsideras, ke oni enrudis la domon kaj faris rabadon, ĉar troviĝas perdoj de riĉaĵoj.”

“Ne, mi certas, ke ĝi estas la murdo pro amafero. Li certe enamiĝis kun ŝi tiom arde ĝis ekstremeco, ke li naskis tian profundan malamon.”

“Ni serĉu ŝian koramikon.”

“Jen estas ŝia foto antaŭ murdo.”

“Ha, kiel bela junulino.”

En la foto ŝi havis belan rideton, brilajn okulojn, blankajn dentojn kaj longajn harojn pendantajn ĝis la ŝultroj.

“Telefonu al la rezidejo de parlamentano Zhou. Ni iros al lia hejmo morgaŭ matene.”

Wang Mei jesis kaj foriris.

Perlo Fang eligis suspiron. Ĉiufoje kiam ŝi alfrontis tian murdon, ŝi ekhavis miksitajn sentojn.

Ŝi eltrovis kelkajn suspektindaĵojn en la kazo.

Iom poste Wang revenis. “Mi jam aranĝis la viziton je la oka de la morgaŭa mateno.”

“Tiel frue?”

“Parlamentano Zhou kaj lia edzino forlasos la hejmon. Kaj ili estos liberaj dum tiu tempdaŭro.”

“Ĉu ili ankoraŭ loĝas en tiu domo?”

“Ili planas translokiĝi alien por eviti la lokon, kie restas tragika vidaĵo por ili.”

Ili ambaŭ esploris la kazon ĝis la profunda nokto.

“Jen vidu, Wang Mei. La koramiko de Zhou Ziyu nomiĝas Bai Shaobin. Policanoj jam pridemandis lin kelkfoje, sed li havas pruvon de alibio. Tiuvespere li, kiel volontulo, lakis murojn en preĝejo. La pastro estas atestanto.”

“Ĉu aliaj en la domo aŭdis tion, kiam la junulino estis murdita de entrudinto?”

“Laŭ policaj registroj parlamentano Zhou kaj lia edzino feris aliloke kaj la servistino hazarde libertempis, tiel nur ŝi sola troviĝis en la domo.”

“Tiu golf-klabo, la murdilo, apartenas al parlamentano Zhou. La klab-sako estis metita ĉe la pordo kaj la murdinto eltiris klubon el ĝi kiel murdilon.”

“La alarmsonorilo estis malŝaltita, la pordego ne havis postesignojn de perforta malfermado per iloj, kaj en la domo troviĝis neniam piedsignoj aŭ fingropremaĵoj.”

“Estas ne mirinde, ke oni ne povas solvi la kazon, ĉar la sola suspektato havas la pruvon de alibio.”

“La krimo certe estas farita de ŝia konato.”

Wang Mei kaŝite ekoscedis.

“Tempas por ni fini la deĵoron.”

Frumatene ili ambaŭ iris kune al la familio Zhou.

SinJORINO Zhou persone malfermis la pordon por ili.

La trista patrino rigardis tiujn du junulinojn civile vestitajn en blankaj ĉemizo kaj kacia pantalono, kun neŝminkita vizaĝo kaj iom infanca mieno.

Je ekvido de tiuj junaj knabinoj ŝi subite sentis, ke estos nenia espero solvi la kazon, kaj nereteneble faligis malĝojajn larmojn.

Perlo Fang mallaŭte konsolis: “SinJORINO Zhou, bonvole fidu nin.”

SinJORINO Zhou nur kapjesis kaj kondukis ilin en la domon.

La domo aspektis lukse kaj impone. Ne ĉiuj parlamentanoj havis tian luksan rezidejon. Tamen sinjoro Zhou estis konstanta sukcesinto en komercado.

Polica inspektistino Fang kaj ŝia asistantino faris esploradon en la domo.

“Ĉu troviĝis ĉi tie la malgranda monŝranko, kiu jam perdiĝis?”

“Jes. Ĝi troviĝis sub la malsupra breto de la libroŝranko en la kabineto. Ĝi, kun pezo de cent funtoj, estis transportita la tuta.”

Se oni transportis tiel pezan objekton, oni devus forlasi siajn piedsignojn. Tamen la sekcio de pruvokolektado akiris nenion. Estis evidente, ke la krimulo jam purigis la lokon de murdado.

La krimulo bone konis la rezidejon de la familio Zhou kiel sian propran hejmon.

Tiam parlamentano Zhou eniris kaj laŭte kriis kun kolerego: “La krimulo certe estas Bai Shaobin. Kiu alia povus esti murdinto krom li? Kion vi policanoj faras, irante tien kaj alien?”

Sinjinoro Zhou lin fortiris.

Perlo Fang dronis en pensoj.

Post momento sinjinoro Zhou revenis kaj diris al la policanoj: “Ziyu kaj Bai Shaobin jam rompis la rilaton. Post someraj ferioj Ziyu estus vojaĝonta al Havardo por studado.”

Jen videblis la fuzeo al la murdado.

“Kia estas Bai Shaobin en kondutado?”

Kvankam premata de ekstrema sufero, sinjinoro Zhou sin tenis eleganta. “Mi ne volas klaĉi malantaŭ lia dorso. Vi pli bone mem faru enketon pri tio.”

Fang ekbalancis la kapon.

Tiumomente parlamentano Zhou sin ĵetis antaŭen kaj kriis: “Kiu povus esti la murdinto krom Bai Shaobin? Li kaptis la okazon de nia vojaĝo kaj entrudis nian domon por ĝeni nian filinon. Li eĉ aŭdacis peti de ŝi la manon! Li eĉ aroge deziris edziĝi al mia filino! Kiel bela revo...”

Denove lia edzino fortiris lin kun ruĝiĝinta vizaĝo.

Fang diris adiaŭ al ili.

Wang Mei diris kun amara rideto: “Ni rikoltis nenion.”

“Ni ĉiuj scias, kiu murdis ŝin, sed ni ne havas pruvojn.”

“Ni faru viziton al Bai Shaobin.”

En universitato Bai Shaobin estis fama luktisto, brava kaj fortika. Kiam polica inspektistino Fang venis al la universitato, li estis luktanta kun kunlernanto en la sportejo. Lia belaspekta staturo kaj muskolo plena korpo klarigis, kial li povis allogi multe da junulinoj.

La instruisto de korpa ekzercado defendeme diris: “Jam estas la kvara fojo por policanoj pridemandi lin. Mi vere ne komprenas, kial vi policanoj ĉiam alkroĉiĝas al li. Li estas bona studento, morale kaj akademie. Ĉu malriĉeco estas peko?”

“Ĉu lia familio estas malriĉa?” Fang demandis .

La instruisto aldonis: “Jes. Li loĝas en malalt-renta loĝejo. Liaj gepatroj estas blu-kolumaj laboristoj laborantaj sur konstruejo. Tamen li mem estas ambicia. Ĉiujare li akiras stipendion pro sia plej bona rekordo en la klaso. Polico traktas lin maljuste!”

Tiam venkinte la rivalon en la sportejo, Bai Shaobin aliris, deviŝante ŝviton.

“Ĉu via policana moŝto ankoraŭ havas demandon por mi?”

“Bonvole venu ĉi tien.”

Li diris: “Pri murdo de Ziyu mi sentas samajn ĉagrenon kaj indignon kiel ŝiaj gepatroj. Mi sopiras, ke vi policanoj solvu la kazon kiel eble plej baldaŭ.”

Fang rigardis lin senvorta.

“Mi amas Ziyu kaj ni jam gefianĉiĝis private. Kiam Ziyu atingus la aĝon de dudek unu jaroj, ni tuj geedziĝus.”

“Parlamentano Zhou oponas ĉi tiun aferon.”

“Li malestimas min, sed tempo pruvos mian koron. Li sciigos, ke mi estas entreprenemulo kaj elkore amas Ziyu. Li akceptos min.”

“Sed nun ĉio jam fariĝis pasintaĵo.”

Li turnis sian vizaĝon kaj faligis larmojn.

“La vesperon de lasta merkredo, t.e. la dekan ĝis dek duan de la dektria tago de tiu ĉi monato, kie vi troviĝis?”

Li levis la kapon. “Mi faris volontulan laboron en la preĝejo Mingxin.”

“Ĝis tiel malfruaj horoj?”

“Mi jam diris al vi policanoj, ke mi lakis murojn por la preĝejo. Mi ekis tiun laboron nur post kiam kredantoj forlasis. Mi laboris de la naŭa ĝis la tagiĝo sen forlasi la preĝejon. Vi povas pridemandi la pastron Petro.”

Fang ekbalancis la kapon.

Ŝi subite demandis: “Ĉu ŝi estas dorlotata filino?”

“Multaj junulinoj esperas cedemon de la koramiko,” Bai respondis.

“Oni diras, ke ŝi estus studonta en Havardo?”

“Post geedziĝo ŝi ankaŭ povus studi.”

“Geedziĝo koncernas du personojn. Neeblas geedziĝi por unu persono. Ĉu vi deziras geedziĝi nur viaflanke?”

Bai mallevi la kapon. “Nun Ziyu jam mortis. Eble vi pravas diri tion.”

Fang signis, ke la pridemando finiĝu.

Wang Mei diris: “Nenion ni akiris, ĉar li havas pruvojn.”

“Bai Shaobin estas tro profundmensa, tro nekonsternebla kaj tro nedubema.”

Wang ekridis. “Do, kion ni faru?”

“Ni malkaŝu liajn antecedentojn. Sendu kolegojn pridemandi liajn gepatrojn, kaj akiri de liaj kunlernantoj informojn pri lia kondutado. Ni vizitu pastron Petro.”

La pastro, jam mezaĝa, estis simple vestita, kun afabla mieno. Li vere ne estis tia persono, kian policanoj suspektis.

“Tiun vesperon Bai Shaolin okupiĝis pri lakado ĉi tie. Mi iradis tien kaj reen, kaj kelkfoje mi alportis kafon al li. Li neniam forlasis ĉi tien. Sur la muro pendas horloĝego kaj mi konsultis la tempon laŭ ĝi.”

“Ĉu vi ne forlasis dum la tutaj ok aŭ naŭ horoj?”

“Malantaŭ la preĝejo estas mia loĝejo. Mi ripozis tie nur kelkan tempon.”

“Kiel longe?”

“Tri dek minutojn. Mi certe endormiĝis. Kiam, vekiginte, mi preparis la morgaŭan predikon, mi vidis lin ankoraŭ en laborado.”

“Kioma horo tiam?”

“La dekunuan horon nokte.”

Jen fera pruvo de alibio.

“Ĉu ni povus pririgardi vian dormoĉambron?”

“Bonvolu iri laŭ ĉi tiu flanko.”

Lia loĝejo konsistis el unu ĉambro kaj unu haletto, treege simpla kaj senornama. Iu vokis elekstere kaj la pastro eliris.

“Kiel simpla kaj mizera vivo!”

“La pastro sin tenas en simpla vivo. Jen vidu. Li havas nek privatan komputilon nek telefonilon. Malnovaj mebloj estas alies donacoj kaj la televidilo vera malnovaĵo. Li vere meritas nian respekton.”

Perlo Fang ĉirkaŭrigardis. “Ne troviĝas pendhorloĝo.”

Wang Mei tuj levis la kapon. “La pastro konsultas tempon laŭ la horloĝo ekster sia loĝejo.”

“Tio signifas, ke li tute ne certis, ĉu li dormis duonhoron aŭ unu horon. Bai Shaobin povis plifruigi aŭ malfruigi la tempon de la horloĝo.”

“Kiom da tempo oni bezonas iri kaj reiri de ĉi tie al la rezidejo de la familio Zhou? Tuj sendu iun por akiri la informon pri la trafika stato de la lasta merkredo.”

“Ni reiru al la policejo unue.”

Vidinte ilin, la kolegoj aliris renkonte fari raporton: “La gepatroj de Bai scias nenion pri tio, kion ilia filo faris ekstere. Li ne estas la filo sindonema al

siaj gepatroj, kaj li malofte hejmeniras. Liaj najbaroj diras, ke li estas saĝa kaj kompetenta, sed li ĉiam volas grimpi supren por promociiĝo ĝis la ekstremeco de perdiĝo de humaneco, kaj ke li tute ne salutas siajn najbarojn nek donas respektaman rigardon al ili, aspektante fieracĉe.”

“Li vere estas tute alia ol kian ni vidas,” diras Wang Mei.

“Kiam li studis en universitato, li havis koramikinon, kies familio vivas pli aŭ malpli bone kaj kies patro estas estro de mezlernejo. Sed kiam li konatiĝis kun Zhou Ziyu, li tuj fremdiĝis de la antaŭa koramikino, tiel ke ŝi deprimiĝis la tutan jaron kaj regresis en studado.”

“Venigu ŝin por pridemandado.”

Alia kolego raportis: “La trafikita buroo informis, ke lastmerkrede estis glata la trafiko al la strato Hongmian pere de la strato Hongdu. Oni bezonis nur unu horon, maksimume unu horon kaj dek minutojn por ir-reiro de la strato Hongdu al la strato Hongmian.”

Polica inspektistino ekleviis la kapon. “Do, li devis stiri aŭtomobilon.”

Wang Mei tuj iris akiri informon, kaj post malpli ol kvaronhoro ŝi raportis: “Li havas motorbiciklon kun licencplato MB70784.”

“Tamen motorbiciklo ne povas transporti monŝrankon. Sendu serĉi tiun malgrandtipan monŝrankon en herboj ĉirkaŭ la domo. Mi kredas, ke ĝi estas forjetita nemalproksime.”

“Tuj sendu serĉi ĝin.”

Tiam alvenis Yu Jinyun, la antaŭa koramikino de Bai Shaobin.

Fang ŝin salutis.

Fraŭlino Yu, kun blanka haŭto, aspektis milde kaj bele. Sed kiam oni menciis Bai Shaobin, ŝi montris sin ĉagrena.

“Fraŭlino Yu, kia li estas?”

“Saĝa, sagaca, ambicia kaj diligenta.”

“Ĉu li malhavas mankojn?”

“Li malamas sian devenon. Nur kiam li volas veki kompaton ĉe oni, li mencias siajn malriĉajn gepatrojn. Li tro penas grimpi supren por promociiĝo ĝis tia grado, ke mi eĉ sentis timon kelkfoje.”

“Ĉiurimede?”

“Povas diri tiamaniere. Ĉar li forlasis min por ĉasi Zhou Ziyu, mi ne diras bonajn vortojn por li.”

“Ĉu li amas Zhou?”

“Li amas ŝian familian riĉecon. Li iam diris al mi: “Zhou Ziyu havas ĉion, kion oni volas!” Ekde tiu tago li trompe montras sin afabla kaj komplete obeema al ŝi.”

“Sed finfine Zhou decidis forlasi lin, ĉu ne?”

Fraŭlino Yu diris objektive: “Mi ne scias, kio okazis poste, ĉar mi kaj li ne plu renkontiĝis.”

Kiel longe ili intime rilatis inter si?”

“Li rompis kun mi pli ol unu jaron.”

“Dankon, fraŭlino Yu.”

Tuj post ŝia foriro, policano raportis: “La monŝranko jam estas trovita.”

Fang ekbalancis la kapon.

Kun dikfingro levita, Wang Mei diris: “Vi ja estas magia inspektistino.”

Kompreneble Fang ekridetis je tiuj flataj vortoj.

Montrante la foton ĉeloke faritan, la policano raportis: “Ĝi estas enterigita en la fosajo sub la vojeto irita de neniuj, ĉirkaŭ kvindek metrojn proksime al la domo de la familio Zhou.”

“Ĉu troviĝas radspuro de motorbiciklo sur la tero ĉirkaŭe?”

“Kiel mirakle vi antaŭvidas, inspektistino Fang! Feliĉe ne pluvis dum ĉi tiuj tagoj. La sekcio de pruvokolektado asertas, ke tiuj spuroj de la pneuoj apartenas al la sama speco de la motorbiciklo de Bai Shaobin.”

Wang Mei urĝe diris: “Mi iru peti la ordonon de traserĉado.”

Aŭdinte, ke la polico jam trovis novajn indikaĵojn, geedzoj Zhou tuj rapidis hejmen. Tiam ili jam ŝanĝis sian sintenon al Perlo Fang.

Policano trovis en la ĉambro de Bai Shaobin taglibron apartenantan al Zhou Ziyu.

“Mi decidis rompi kun Shaobin.”

“Li ĉiam senĉese mencias geedziĝon. Mi apenaŭ atingis la aĝon de dek naŭ jaroj. Ĉu geedziĝo estas tre frua por mi? Miaj gepatroj diras prave, ke plibone estas por mi daŭrigi studadon. Mi rifuzis lian peton.”

“Li subite fariĝas kruda kaj malĝentila. Ĉiutage li atendas min ĉe la lerneja pordo kaj ne volas rompi kun mi.”

“Mi sentas iom da timo kaj mi ne kuraĝas diri tion al miaj gepatroj. Li diris, ke li ne forlasas min.”

Wang Mei demetis la taglibron.

“Ĝi ankaŭ estas pruvo.”

Tamen inspektistino Fang diris: “Ni devas trovi atestanton al lia kazo.”

Wang Mei diris: “Do, ni pridemandu pastron Petro ankoraŭfoje.”

Post salutado Fang mallaŭte demandis al la pastro: “Ĉu vi havas kutimon dormeti?”

Li respondis: “Ankaŭ mi trovas tion stranga. Tiun nokton mi subite sentis dormemon.”

Fang ekridetis. “Vi diris, ke vi faris kafon por Bai Shaobin. Ĉu vi trinkis kafon?”

“Jes, Shaobin alportis tujmanĝan kafpulvoron kaj donacis al mi.”

“Post trinkado de kafo vi iris al loĝejo dormi, ĉu ne?”

“Mi spektis televidan programon de novaĵoj kaj post momento mi endormiĝis. Kiam mi vekigis, la programo de novaĵoj jam finiĝis. Mi malŝaltis la televidilon kaj irinte al la halo, mi vidis Shaobin ankoraŭ en laborado.”

“Vi havas nek brakhorloĝon nek alarmhorloĝon, pastro.”

La pastro ekridetis. “Ne deziro, ne bezono.”

Reirinte al la policejo, Fang diris: “Estas evidente, ke oni enmetis dormigilon en kafon. Pastro Petro dormis almenaŭ du horojn.”

“Proksime al tagiĝo, kiam la pastro ripozis, Bai Shaobin malfruigis la tempon de la horloĝo kaj foriris.”

“Ĉu tiel simple?”

“Por mistifiki la puraniman pastron sufiĉas nur la plej simpla rimedo.”

“Kiel longe li konatiĝis kun la pastro?”

“Nur unu aŭ du monatojn. Li estas tre laborema kaj tiuj en la preĝejo konsideras lin bona junulo.”

“En certa senco li vere estas diligenta kaj progresema.”

Wang Mei protestis: “Progresema dependas de lia klopodado, sed ne de alies rilatoj.”

Fang diris: “Kafo estas jam eltrinkita kaj la glasoj pure lavitaj. El tio ni ne kolektis pruvojn.”

“Nek piedspuro nek fingropremaĵoj restas ĉe la krima loko. Kia ruzemulo!”

Rideto ludis sur la vizaĝo de Fang. “Ne forgesu lian motorbiciklon.”

Wang Mei eklevis la kapon.

“Lia motorbiciklo jam estas trenita al la sekcio de pruvokolektado, tiel ke oni povas ekzameni, ĉu la koto sur ĝi estas identa kun tiu sur la vojeto, kie li forjetis la monŝrankon.”

“Sed tiuj ĉiuj pruvoj estas nur nominalaj. Ajna defendanta advokato povas senkulpiĝi lin kontraŭ ili.”

“Jes,” Fang diris, “necesas por ni teni lian motivon.”

“Venigu lin al la policejo por pridemandado.”

Fang diris: “Malaltigu la temperaturon de la klimatizilo kaj urĝu lin trinki teon de tempo al tempo.”

Tiumomente la kolego el la sekcio de pruvokolektado alvenis kun raporto: “La pneŭ-spuro de la motorbiciklo kaj kota sampla estas identaj kun tiuj ĉe la krima loko. La posedanto de la motorbiciklo vere aperis ĉe la krima loko.”

Fang sin tenis silenta.

Ŝi sola reiris al la oficejo, enpensigante.

Iom poste ŝia asistantino frapis je la pordo. “S-ro Bai jam estas invitita ĉi tien.”

Fang eniris la ĉambron por pridemandado. Ĉiŝoj ŝi trovis, ke Bai Shaobin montras maltrankvilecon unuafoje.

Sidiĝinte kontraŭ li, ŝi mallaŭte diris: “Se iu volas venki sin mem, tio ne estas facila. Mi komprenas, kio pezas sur lia koro.”

Bai diskrete diris: “Mi jam malkaŝis ĉion, kion mi scias.”

Tamen Fang diris laŭ alia temo: “De infaneco mi elkreskis en la vilaĝo de malalt-rentaj domoj. Mia patro estis ordinara komizo. Kiel nova enmigrinto kaj pro malalta klereco li ne povis havigi al si pli bonan okupon. Ni familianoj devis fari ŝparadon en ĉiuj aferoj, sed ni nek aĉetis kredite nek prunteprenis. Malgraŭ tio ni estis ankoraŭ malestimataj de aliaj.”

Bai subite eklevis la kapon kaj videble li komprenis tian mizeran vivon.

“Ĉu vi havas la saman senton? Kiel ajn bone ni faras, iu ĉirkaŭ ni ĉiam esprimas, ke li havas altan devenon kaj bonan familian fonon, kaj pro tio li estas pli supera al ni.”

Bai ektusis. “Nuntempe oni egale konkuras unu kun la alia. Heroo ne konas la familian devenon.”

Fang fikse rigardis lin. “Ĉu jes? Vi havas elstaran atingon en studado, sed parlamentano Zhou ne volas, ke lia filino rilatu kun vi.”

Post momento da silento Bai diris: “Li havas antaŭjuĝon.”

“Li konsideras, ke vi neniam revus venki vian humilan devenon.”

“Li eraras.”

“Li sendus sian filinon al Usono por plua studado, sed vi povas fari nenion pri tio. Ĉu vi kapablas iri al Usono ĉasi ŝin? Ne, vi ne povas.”

Bai diris kontraŭvole: “Mi havas povon aĉeti flugbileton.”

Li trinkis multe da akvo, sed li ankoraŭ sentis soifon. Fang senĉese verŝis teakvon por li.

Fine li diris: “Mi volas iri al klozeto.”

Fang respondis: “Momenton. Mi ankoraŭ ne finparolas.”

Bai vole nevole sidiĝis denove.

“Mi aŭdis, ke vi estis blinde obeema al Ziyu. Ĉiutage post lecionoj vi akompanis ŝin lerni du horojn en biblioteko, kaj pro tio ŝi faris grandan progreson en studado kaj sukcesis pasi la ekzamenon de fama universitato. Vi indus je granda merito.”

Liaj okuloj montris tristecon.

“Sed,” Fang eligis suspiron, “vi ne havas ŝancon eniri tian internacian superan altlernejon.”

Li sin tenis senparola, kun firme pugnigitaj manoj.

“Estas Zhou Ziyu, kiu utiligis vin. Vi skribis la lecionojn por ŝi ĝis la profunda nokto, kaj akompanis ŝin tien kaj ĉi tien, kiel servosoldato, sed ŝi decidis forlasi vin kaj vojaĝi al Usono. Ŝi kaj ŝia patro primokis vin...”

Bai abrupte stariĝis.

“Vi esperas, ke la pordo de la familio Zhou malfermiĝu por vi. Vi atendis ekster la pordo kaj zorgeme oferis viajn servojn, ĉar vi konsideris, ke via sorto pliboniĝus. Dum la tempo de pli ol unu jaro via deziro eniri la pordon pli kaj pli intensiĝis. Sed dum nur unu nokto via espero pereigis, vi perdis ĉion kaj vi devis entrepreni de la komenco.”

El lia gorĝo eliĝis klak-sonoj.

Fakte la plej granda bato al li ne estis perdi Ziyu, sed la pordo, ĉu? Malantaŭ la pordo troviĝas lukseco kaj riĉeco, tiel proksime kaj ankaŭ malproksime. Vi povas aŭdi muzikon kaj spekti la pejzaĝon ene. Vi nur esperas, ke Ziyu povu kunporti vin tra la pordo, sed ŝi ne plenumis la promeson.

Bai subite diris: “Kiam mi konatiĝis kun ŝi, ŝi nur staris sur la nivelo C en studado, tial la instruisto, kiu helpis ŝin plibonigi, povis fari nenion pri ŝi. Ĉiutage mi helpis ŝin ordigi notojn, lecionojn kaj raportojn. Post unu jaro ŝi jam atingis la nivelon A.”

Fang ridete diris: “Ŝi vere ne devus piedbati vin for.”

Liaj okuloj malseketiĝis. “Kial ŝi ne lasis min eniri la pordon?”

Fang lin rigardis. “Ĉar vi ankoraŭ ne estas sufiĉe bona.”

Bai petis: “Mi volas iri al klozeto.”

“Sidiĝu. Mi tuj finparolos. Lastmerkrede kiam vi informiĝis, ke ŝiaj gepatroj forvojaĝis kaj la servistino feris, vi, post bona elektado de la temp-atestanto, vin turnis al ŝi ĉe ŝia hejmo. Ĉe la pordo vi surportis gantojn kaj ŝukovrilojn. Apenaŭ ŝi malfermis la pordon, vi komencis ŝin ĝeni. Sed ŝi rifuzis vin. Pro timo ŝi volis repuŝi vin per la golf-klabo sinapoganta ĉe la pord-angulo, sed vi forkaptis ĝin kaj uzis ĝin kiel krimilon.”

Fab-grandaj ŝvitgutoj falruliĝis de la frunto de Bai Shaobin.

Bluaj vejnoj riveligiĝis sur lia frunto. “Ŝi kriis al mi ‘For!’ kaj prenis min kiel hundon.”

“Kiom da batoj vi donis al ŝia kapo?”

Bai respondis: “Mi ne scias. Mi trafis ŝin nur per unu bato. Ŝia sango elŝpruciĝis. Sen ajna sono ŝi malpeze sidiĝis kun krucitaj kruroj rezignacie. Ŝi havis trankvilajn trajtojn, kvazaŭ sciante, ke ŝi devas pagi, kion ŝi ŝuldis.”

“Kie troviĝas la sangmakulita vesto, kiun vi surhavis tiam?”

“Mi jam forbrulis. Mi jam respondis ĉiujn viajn demandojn. Ĉu mi povas iri al klozeto?”

Fang kapjesis. “Bonvole.”

La kriminala kazo estis solvita ĝuste en sepdek du horoj, nek pli nek malpli.

La prokuroro perpleksiĝis. “Bai ĉiam ruzeme malkonfesis, kion li faris. Kial li subite konfesis sian krimon?”

“Ĉar li urĝe volis iri al klozeto.”

“Inspektistino Fang vere emas ŝerci.”

“Li fakte ne estas tiel firma kiel li mem konsideras. La premo de rimorso pri la krimo iompostiome pliiĝis kaj lin sidigis maltrankvile sur la pingloj. Finfine li faciligite elverŝis ĉion, kiel li faris en klozeto.”

La prokuroro ekskuis la kapon. “Ne, tiaj sangmalvarmaj krimuloj, kia li, ne sentas rimorson.”

Fang eklevis la kapon. “Do, mi devas diri, ke la leĝa reto povas kapti ĉion kriman.”

La prokuroro akceptis ŝian klarigon. “Prave kaj trafe vi diris.”

Post du tagoj parlamentano Zhou kaj lia edzino invitis polican inspektistinon Fang al sia hejmo por trinki teon kaj esprimi ilian dankemon.

SinJORINO Zhou diris: “Kvankam Ziyu neniam revenus, la krimulo jam estis arestita laŭ la leĝo. Ni sentas nin iom pli faciligitaj ol antaŭe.”

Fang restis senparola.

“Vi vere estas kapabla. Ni jam sendis leteron al la poliestro por peti, ke li laŭdu vin per rekompenco.”

Fang ne restis tie longe.

Ŝi ne ŝatis tian sintenadon de tiuj homoj, kiuj respektas la riĉajn kaj malestimas la malriĉajn.

Ŝi ankoraŭ memoris, ke, kiam ŝi revenis post penplena studado en fremlando per stipendio, iu demandis duonmoke kaj duonŝerce: “Ĉu la universitato, kie vi studis, estas diplomfabrikejo!” Se Perlo Fang hazarde havus klabon en la mano tiam, ŝi eble, pro kolerego, disbatis per la klabo tiun homon kaj lian buŝon en kaĉon.

Ŝi hasteme forlasis la rezidejon de la hipokrita sinjoro Zhou.

Geling Yan (1958-)



La lasta tago de Molly

elĉinigris Jianye Wang

Geling Yan estas ĉindevena usona verkistino!

Unu, du, tri... la similaj etaĝdometoj etendiĝas unu post la alia. Jen Molly loĝas en la dudekoka etaĝdometo, kaj malantaŭ ĝi troviĝas aliaj du dometoj, kie la vojo finiĝas. Ĉe la rando de la loĝkvartalo troviĝas vasta arbaro, nomata Kverka Parko. Je la unua ekvido oni ne povas trovi la signojn de homoj, sed oni diras, ke ene kolektiĝas diverspecaj homoj: murdintoj, stuprintoj, rabintoj, piknikantoj, ludantoj kaj amindumantoj. Tra la parko kuŝas vojeto nur por bicikloj, per kiu Zheng Daquan baldaŭ kontaktiĝos kun Molly.

Molly estas okdekjara. De ŝia sepdekoka jaro ŝi interparolas kun neniu. Per telefono ŝi interparolas kun aliaj nur po unu aŭ du fojoj en monato, ĉefe kun sia kuracisto. Kaj ĉiufoje sonas la samaj demandoj kaj respondoj:

“Ĉu vi sentas vin bona?”

“Jes, bona.”

“Nepre prenu medikamentojn je la definitiva horo. Mi jam sendis al vi la recepton.”

“Mi ĝin jam ricevis.”

“Ĉu estas malfacile aĉeti medikamentojn?”

“Ne malfacile.”

Ĉio en tiu ĉi lando estas oportuna, tiel ke ili povas ŝpari pli multe da vortoj. Dum unu monato ŝi eliras aĉeti nutraĵojn kaj medikamentojn unufoje. Se nur oni havas monon, nenecesas peni solvi la problemon per multaj vortoj.

Ŝia mono estas heredigita de ŝia edzo, inkluzive de la dometo kaj la aŭto. Se ŝi ne vivos tro longe, la mono estas sufiĉa por ŝiaj elspezoj. Krome ŝi havas kelkajn juvelojn kaj ŝi povos lombardi ilin por plenigi la diferencon pro freneza plialtiĝo de la prezoj. Unuvorte ŝi vivas same trankvile kiel ŝi kuŝas en tombo. Dum manĝado ŝi legas anoncojn pri televidaj programeroj, kaj spektas televidaĵojn, frandante dolĉaĵojn. Se ŝi ne povas endormiĝi sur la lito, tio ne gravas. Anstataŭe ŝi povas tra noktoj ĝuas la televidajn rekomendoj de varoj, kiaj konfekciaj vestoj, juveloj kaj metiartaĵoj. Kiam ŝi fine vidas tiujn artiklojn akceptitaj de klientoj, ŝi bedaŭre suspiras: “Ĉu vi povas kredi la var-rekomendistojn? Ba, vi estas trompita, malfeliĉulo!”

Matene, kiam ŝi spektas la televidajn novaĵojn je la deka, ŝi ekmemoras, ke ŝi ankoraŭ ne prenis medikamentojn por kuraci sian kormalsanon. Se ŝi ne prenis ilin, ŝi baldaŭ suferus la atakon de la malsano. Ŝi konsilas al si, ke ŝi ne prenu la pilolojn ĝis la fino de la programero. Tio neniam okazis, ĉar ŝi prenas medikamentojn dogme akurate. Hodiaŭ ŝi rompis la dogmon. Ŝi neniel konceptas, ke ĝi entenas iun sencon de fatalo.

Malsupre de la teretaĝo situas la loĝejo de Zheng Daquan. La ĉambro sin montras humida kaj sur la muroj pentriĝas humidaj spuroj. La edzino de Zheng detondis bildojn kun pejzaĝoj kaj portretoj el la malnovaj pendkalendaroj kaj gluis ilin sur la murojn, sed baldaŭ la vizaĝoj de la portretoj tordiĝis kaj volviĝis pro humideco. Zheng, kiu okupiĝas pri kolportado de varoj, surŝultrigis sakegon da broŝuroj pri produktoj frumatene kaj pretis eliri. Lia edzino, kun granda ventro de gravediĝo, akompanis lin al la pordo, dirante: “Ne portu tiom multe! Ĉu vi konsideras, ke oni volos legi ilin?”

Kun rideto li bekis kison sur ŝia velkinta kaj malgrasa vango.

En lumo ŝi vidis olemakulojn sur lia eŭropstila jako kaj la kabanano subŝtofon elmontrita pro frotado ĉe la kolumo—lia eŭropstila jako certe estis pli eluzita ol duamana varo. Dirinte nenion alian, ŝi nur demandis, ĉu li kunportas monon.

“Ĉu vi?” li demandis.

“Donu al mi pli da dolaroj. Mi timas, ke mi ne sufiĉe pagos, kiam mi aĉetos legomojn.”

Kun korpo oblikve subpremata de la sakego, li elprenis la solan bankbileton de dudek dolaroj, ŝirmante la aperturon de la monujo kontraŭ ŝia vido.

“Ĉu vi ne havas neniom da mono?”

“Jes, mi ankoraŭ havas.”

“Revenu pli frue. Ni havos raviolojn por vespermanĝo!” Ŝi penis, trans sia granda ventro de sep-monata gravediĝo, alpremis sian buŝon al la lia kaj ŝmace kisis lin.

Ili ambaŭ ĉiam tenis intiman rilaton.

Li jam sin trovis sur strato. Li pensis en si: malgraŭ ĉio mi devos elkolporti unu pecon kaj neniel lasos min bari de la pordklapo kaj elpuŝi eksteren antaŭ ol mi finos mian parolon; mi devas translokiĝi al deca loko antaŭ la akuŝado de mia edzino.

Kiam li startis la biciklon, li eksentis impulson de ĝojo, kvazaŭ li antaŭsentis, ke la maljunulino Molly atendas lin ĉe antaŭo.

Fakte Molly jam distriĝis de la televida programero. Ŝi pensis, ke hodiaŭ estas ŝia naskiĝdatreveno okdekjara. Je la aĝo de dudek jaroj ŝi edziniĝis al Luizo. Tiam li havis nigrajn harojn, tute malsame kiel ŝi kun orkoloraj haroj. Se li povus vivi ĝis nun, li certe havus la harojn de la arĝentgriza koloro sama kiel ŝi. Ŝi vojaĝis al Azio kune kun Luizo, kaj poste ŝi loĝis preskaŭ en ĉiuj lokoj de Usono. Pro tio ŝi ne havas amikojn kaj kutimiĝas konatiĝi kun neniuj. Alie kiam ŝi foriros post nelonga loĝado tie, ĉu gravas por ŝi memori aŭ forgesi ilin? Ŝi ne ŝatas kunporti kun si multe da rememoroj. Estas evidente, ke ŝi kaj

ili ne povus renkontiĝi, kial ŝi devus sin ĝeni per leteroj, telefonvokoj kaj ĉiujaraj kristnaskaj kartoj. Luizo diris: “Ĉu oni vere povas eviti la diablajn kristnaskajn kartojn?” Li aĉetis skatolon da kartoj kaj tajpis ilin pecon post peco per tajpmaŝino. Li tenis teruran eksplodeman temperamenton, kvazaŭ tiuj ricevantoj de la kartoj devigus lin fari tiun penlaboron, nek eviteblan nek forpuŝeblan. Ĉar ili scias, ke vi ankoraŭ vivas, ĉu ili neniel povas ne ricevi viajn kartojn senditajn de vi? Ĝis nun ŝi okaze ricevas la kartojn senditajn el Luizo. Li iam faris multajn kristnaskajn kartojn kun la anonco “Mi ankoraŭ vivas”, tiel ke, kvankam li mortis de dek jaroj, oni tute ne prenas lian morton kiel veran.

Molly iom malpliigis la sonvolumenon de la televidilo. Ŝi stariĝis por preni pilolojn, ĉar ŝi sentis la malsaton de la koro. Dum tiu tempdaŭro ŝi aŭdis el la televidilo, ke Nixon estas grave malsana. Ŝi stuporiĝis kaj denove forgesis pri siaj medikamentoj.

Malfermiĝis ĝiĉeto sur la pordo kaj aperis la vizaĝo de latindevena virino.

“Kiun vi volas?” la virino demandis.

Kun rideto Zheng Daquan heziteme diris: “Mi liveras varojn.”

“Metu varojn ĉe la pordo. Vi povas foriri,” diris la virino.

Zheng iris al alia temo: “Jen la afero estas... pri la nova produkto de nia kompanio...”

Ŝi kontraŭdiris: “Mi havas nek tempon nek monon.”

“Tio ĝuste konvenas al vi! Nova kliento povas ĝui la rabaton de tridek procentoj, kaj krome pagi popece dum unu jaro...” li kapis la ŝancon por diri pli multe da vortoj.

Bum! la virino fermis la ĝiĉeton.

Vole nevole li denove premis la sonorilon.

Kiam la ĝiĉeto malfermiĝis, la virino avertis: “Se vi premus la sonorilon ankoraŭfoje, mi vokos policanon.”

“Pardonon, pardonon!”

“Vi jam premis la sonorilon trifoje!”

“Dufoje!...”

“Trifoje!”

Li tuj agis: “Do bone, trifoje.” Li povis fari nenion alian ol cedi al ŝi. Li mallevis la kapon kaj elprenis el la sakego unu broĉuron pri la produkto. Kiam li eklevis la kapon, la giĉeto jam refermiĝis. El interne aŭdiĝis la parolo cele al li: “La nunaj kolportistoj estas tiom agresivaj, kiel bandistoj!” Li volus levi brikon kaj frapi la pordon per ĝi. Ekpensante pri sia edzino, li rezignis la ideon. Kun kolerego li ekpensis pri sia kara edzino kun flaveta mieno, kiu atendas lin hejme, kaj li nur parolis al si: “Lasu do.” Li enŝovis la broŝuron tra la fendo de la pordo. Post nelonga irado li turnis la kapon kaj trovis la broŝuron elŝovita. Li haltis kaj solene starigis sian mezfingron kontraŭ la firme ferma pordo.

Kiam li, kun starigita mezfingro, diris en la koro “Fik al vi, fik al vi!”, Molly estis serĉanta la boteleton de medikamento en la ĉambro. Ŝi ĉiam metas ĝin en fiksitan lokon, sed ŝi ofte malsukcesas trovi ĝin. Ĉifoj, malbone, ŝi serĉadas ĝin dum pli ol unu horo. Nature ŝi ne scias, ke Zheng prenas ŝin kiel la lastan celon de atako hodiaŭ.

Ĝis tagmeze li ne plenumis eĉ unu negocon. Li malsatis. Kiam li, kun la sakego sur la dorso, iris el la Kverka Parko al Molly, li sentis jen briliĝon jen malheliĝon de la suno.

Kiam Molly malfermis la pordon, ŝi vidis orientanon kun rektangula vizaĝo kaj delikata haŭto, kaj kun malgranda kapo kaj maldika korpo.

“Saluton!” Zheng trudis rideton kaj riverencis. Li tuj konstatis, ke la blankhaŭta maljunulino nutras inviton al li en la koro.

“Bonvolu diri al mi...?” Ŝi ekridetis, penante rememorante, kiameniere ŝi montris sian rideton antaŭ pli ol dek jaroj.

“Mi faras enketon...”

Molly ekbalancis la kapon, kredante lian eldiron.

“Ho, jen mia nomkarto.”

Ŝi etendis la mano por preni ĝin. Sur la karto estis presitaj tiaj vortoj, kiaj esplora centro pri spinaj nervoj. Tio indikis, ke tiu juna orientano kun delikataj trajtoj estas esploristo. Tamen ŝi konsideris, ke ŝi ne havas sufiĉe da motivo por interparoli kun li. Kaj ŝi ne povis memori, kio estas la vera kaŭzo por la interparolado inter homoj.

“Dankon, sed...” Ŝi komencis fermi la pordon.

“Ne fermu la pordon!” li petis.

“Mi tre bedaŭras...” Ŝia rideto ŝrumpiĝis.

“Bonvolu finaŭskulti miajn vortojn!” li kriis plengorĝe.

Timigite, ŝi fariĝis spiritmanka kaj montris sin obeema. Ŝi remalfermis la pordon ĝis la antaŭa larĝeco.

Ankaŭ li mem estis ŝokita de sia laŭta kriado. Sed li tuj riskis direkti sian rigardon al ŝi, la rigardon eĉ zorgoplenan kaj sindoneman. Dum longa tempo ŝi ne spertis tian rigardon, eĉ apenaŭ akceptante la mildecon kaj varmecon en tiu rigardo.

“Mi pensas, ke mi devas bone interparoli kun vi.” Li diris: “Ĉu mi povus eniri kaj alparoli pli detale?”

“Ne.” Ŝi rifuzis kategorie, kvankam ridetante.

“Nu, bone. Je la unua ekvido mi sentas, ke via dekstra ŝultro havas malkomforton, kiun via lito kaŭzas...” Li ekpredikis pri la rilatoj inter homaj spinnervoj kaj la lito. Hodiaŭ lia anglalingvo multe helpis al li. Kvankam lia lingvaĵo pleniĝis de gramatikaj eraroj, li eĉ parolis angle tre flue kaj kohere.

Ŝi tute ne sciis, ke li diras sensencaĵojn malgraŭ sia volo. Ŝi fariĝis atentema en aŭskultado, pensante, ke li eĉ certas pri la malsana doloro ĉe mia dekstra ŝultro.

Li tamen bridis sian parolfluan, sciante, ke liaj sensencaĵoj ŝin tuŝas. Se li parolis plu, li eble malkaŝis sian veran intencon. Se oni sin trovas en granda aĝo, la spino trafas ĝenaĵojn de malsano, kiuj influas la ŝultrojn en plejmultaj okazoj.

Unu homo havas du ŝultrojn. Se oni asertas, ke unu ŝultro suferas de malsano, li ja duone pravas.

“Vi tute pravas,” ŝi diris. “Sed mi ne aĉetos vian produkton.”

“Ĉu mi povus eniri trinki iom da akvo?” li demandis.

“Ne.”

“Mi morte soifas!”

Ŝi ridetis: “Tio ne estas mia kulpo. Nu, estas kafejo transe.”

Estas finite, li pensis, damninde, diable.

“Adiaŭ,” ŝi diris.

Vidante, ke ŝi vere volas forpuŝi lin per la pordoklapo, li forte etendis siajn du fingrojn antaŭen kaj ili ĝuste estis pinĉataj de la pordo. Li eligis tragikan ekkrion.

Menskonfuzite, ŝi tuj large malfermis la pordon. Pro dolorego li mane kovris la du fingrojn, kun tremetanta vizaĝo.

“Mi vere bedaŭras pri tio! Mi ne donis atenton al via mano...”

“Ne gravas. Ankaŭ mi ne donis atenton al ĝi!...” Li pensis en si, ke la memdetrua artifiko ne venas el la antaŭpreparita insido, sed el lia saĝo pro urĝeco.

Ŝi preskaŭ helpe subtenis lin eniri la ĉambbron. Ŝi vere timis, ke ŝi staros en proceso pro lia vundiĝo. Tiam li klare vidis la tutan Molly, kiu surhavis malpuran dormorobon kaj paro da ŝuoj kun tretpremitaj ŝuflankoj. La ĉambro estis malgranda, elspirante malbonodoron, tian solecan, deprimitan kaj enuigan malbonodoron. Ŝi invitis lin sidiĝi. Sed li ne sidigis sin, senĉese dirante dankon. Kion diable mi venas fari ĉi tien? Tion, kion mi povas kolporti al ŝi, estas nur cindrouro. Li demetis la sakegon da broŝuroj sur la sofona. Sur la purpurruĝa sofo la du matoj jam fariĝis glataj tabuloj pro ofta frotado de sidvangoj, kaj algluitaj per kelkaj arĝentgrizaj, araneaĵ-similaj kaj velkintaj haroj. Li decidis ne trinki la akvon, kiun ŝi prenis el la krano, kaj memori lavi siajn manojn, se li hazarde tuŝus la aĵojn en tiu ĉi ĉambro.

“Sidiĝu,” dirante, ŝi metis glason da akvo sur la tetableton antaŭ li, flankenpuŝinte diverspecajn paperpecojn, fakulturojn kaj reklamojn pri rabatoj. La diamanta ringo sur ŝia fingro jen kaj jen ekbrilis, kiel okulglobo de ŝtelisto.

Lia rigardo sekvis ĝin. Li pensis, ke ŝi ankoraŭ ne falis en la situacion de abisma malriĉeco, kaj ŝi nur sentas enuon de la vivo, sed ne volas daŭre vivi plu. Ŝi ne similas al lia edzino, kiu, kvankam vivante vigle, ne povas daŭrigi sian vivon de tempo al tempo.

Molly ne sciis, kiom da espero ŝia falsa diamanta ringo donis al li. Ŝi konfuzite babilis kun li pri futbala matĉo, tajfuno kaj grava malsano de Nixon. Ŝi eĉ subite konsciiĝis, ke tiuj vortoj akumulitaj dum multe da jaroj jam amasiĝas ĉe ŝia gorĝo.

Zheng ne aŭskultis, kion ŝi rakontis. Li okule ĉirkaŭprenis la dometon, kiu konsistis el du dormoĉambroj kaj sendube unu kelo. Se la edzino naskos bebon, tiu ĉi dometo ĝuste taŭgos por loĝado de liaj tri familianoj. Pensante, li eligis la demandon aŭtomate venantan al sia buŝo: “Ĉu vi loĝas ĉi tie sola?”

“Mia edzo ankoraŭ ne revenas el la laboro,” ŝi respondis.

“Ho, kie via edzino laboras?”

Ŝi laŭvole montris la direkton: “Ne malproksime, en la policejo ĉe la vojkruciĝo.”

“Ha, bonege,” ĉhante, li sufoke ridis en la koro. En tiom granda aĝo ŝia edzo povus esti la avo de tiuj policanoj.

Ŝi denove babilis pri Luizoz, kiu garzonis kun siaj trupoj en Filipinoj, kaj pri temploj en Bankoko. Sincere kapjesante, li riskis sidiĝi sur la mortintan kaj putriĝintan sofion.

Ŝi iom post iom vigliĝis kaj ŝia lango fariĝis pli lerta. Ŝi tiam ekkomprenis sin mem: ŝi enlasis ĉi tiun fremdulon por fari el li ujon, kiu povus akcepti tiujn vortojn fetore fermentitajn en ŝia ventro.

Li etendis sian korpon por serĉi ion en la sakego.

“Kion vi volas elpreni?” demandante, ŝi tuj etendis la manon kun diamanta ringo al la telefonilo, sur kiu estis ekipita per aŭtomata alarmigo al policianoj, kiuj tuj iros ĉi tien je ŝia ekfrapo al iu loko de la telefonaparato. Tiam ŝi klare vidis, ke li elprenis el la sakegon fajne presitan broŝuron pri rekomendo de produktoj. Ŝi eligis longan suspiron.

“Via dekstra ŝultra troviĝas en malbonega stato,” li diris per la basa tono simila al tiu de geomanciisto.

Subkonscie karesante sian dekstran ŝultron per la maldekstra mano, ŝi aŭskultis al li, kiel magia estas la lito sur la bela presaĵo. “Jen vidu ĉi tien. Ĝi estas masaĝilo. Kiam vi ekpremas ĉi tiun butonon, ĝi tuj moviĝos kaj donos masaĝon al via dorso! Ĉu vi scias, kiom da mono vi bezonas pagi por unu fojo da perhoma masaĝado?”

Kun rideto ŝi signis, ke ŝi ne volas sciigi.

“Kvindek ĝis sepdek dolarojn!” li altigis sian voĉon, kun agitemo kaj instigemo sur la vizaĝo. “Eĉ ĝis cent dolarojn por la plej multekosta masaĝado! Po cent dolaroj por unu horo! Pensu, se vi ekhavos tian liton, kiom da mono vi povos ŝpari ĉiutage? Se supozu, ke vi havos masaĝadon dufoje, kalkulu, kiom da mono vi povos ŝpari ĉiutage?”

Ŝi malvigle rigardis lin, ŝajne dirante, ke tio kostas tiom, kiom vi volas.

Elpreninte kalkulilon el sia sino, li senĉese premadis butonetojn sur ĝi kaj montris la rezulton al ŝi. “Vidu. Jen la sumo! Vi povos ŝpari tri mil dolarojn ĉiumonate!”

“Ho.”

“Tri mil dolarojn!”

“Tri mil dolarojn.”

Rigardante ŝin, li trovis, ke ŝi montras nenian ekdeziron. Tamen li ne volis rezigni, ĉar ili bezonos monon, tuj kiam lia edzino naskos infanon. Vi neniel retiriĝu, ĉar vi jam enstrudiĝis en la dometon. “Tri mil dolarojn!” Kun

emociplena sento li fiksas siajn okulojn al ŝi, atendante por ŝia pridemandado pri la prezo.

Molly tute ne volis demandi pri la prezo. Ŝi nur sentis sin bonŝanca, ke la fremdulo ne estas gangstero. Ĉu vi estas scienca esploristo? Vi vere estas kolportisto plena je buŝoj tra la tuta korpo.

“Ĉu vi jam aĉetis ĝin por via patrino?” ŝi demandis laŭvole.

“Mia patrino? Mia patrino sin trovas en Ĉinio, tre malproksime!” Li seke diris: “Mi ne renkontiĝas kun ŝi de sep jaroj.”

“Sep jaroj? Mia Dio!” Ŝi multe interesiĝis pri ĉi tiu temo: “Kiam mia filo vivis, li revenis vidi min unu fojon ĉiujare, kaj eĉ dufoje! ... Li mortis de cerba kancero. Li mortis je la sama aĝo kiel vi... Kiom da jaroj vi havas?”

“Tridek jarojn...”

“Kiel vi ambaŭ estus samaĝaj? Kiam li mortis, li apenaŭ atingis la aĝon de tridek jaroj!”

“Mi tre bedaŭras!...”

“Tio ne estas via kulpo.”

“Ĉu vi havas solan filon?”

“Nur lin. Ĉu vi kredas? Li jam mortis tridek jarojn! Tiel forpasis tridek jaroj...” Ŝi elstarigis tri fingrojn kaj blovis al ili, kvazaŭ dispelante buterfloron.

“Jes ja.” Li kovis aliajn aferojn en la koro.

Vidinte lin distriĝema, ŝi demandis: “Ĉu via patrino loĝas en Ŝanhajo?”

“Ne, en Pekino.”

“Sed mi ŝatas Ŝanhajon!” ŝi diris. Ŝi senkonscie rivelis sian antaŭan personecon: senscia kaj obstinema fraŭlino. “Kio pri Ŝanhajo? Ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas?”

Li konfuziĝis pri ŝia demando: “Kiel Ŝanhajo povus ne ekzisti?”

“Ekde kiam japanoj bombardis Ŝanhajon, mi aŭdis neniun informon pri Ŝanhajo. Mi iris al Ŝanhajo. La tuta Ŝanhajo estas simila al Broadway!”

“Jes, jes!” li diris laŭvole.

“Kie vi loĝis en Ŝanhajo?”

“Mi loĝis en Pekino.”

“Tamen mi ŝatas Ŝanhajon!” ŝi ekvingis la kapon. Antaŭ kvindek jaroj ŝia tia mieno estis tre alloga. “Ĉu vi kredas, ke mi ellernis frazon de Ŝanhaja dialekto?” Ŝi movis siajn lipojn, unue rondigis ilin kaj poste platigis ilin. Neeble. Ŝi montris siajn senmakulajn falsajn dentojn kaj ekridetis: “Pardonon! Certe mi ne povas ĝuste prononci...”

Zheng eksentis, ke liaj visceroj malorde moviĝas pro malsato kaj eligis malbelajn murmurojn. Li pensis, ke post kiam li sukcesos fari tiun ĉi negocon, li tuj iros manĝi burgeron je la prezo de naŭdek naŭ cendoj.

Molly ne perceptis, ke per siaj ridetoj kaj respondoj li faras preparojn por la venonta atako. Ŝi nur konsideris la ridetojn de la kolportisto tre afablaj kaj zorgoplenaj. Jam delonge neniu tia vizaĝo tiel proksimiĝis al ŝi kaj lasis ŝin babilaĉi ĝis kontenteco.

Dume li ŝvitis pro maltrankvileco, sed li neniel povis enmeti siajn vortojn en ŝian rakontadon. Ŝiaj vortoj, kvazaŭ vatoj ŝtopitaj en ŝia ventro, ŝpiniĝis fadene el ŝia buŝo ĉi-momente kaj tio daŭros senfine. Tiam lia edzino certe jen manlaboras jen pririgardas la ĉielon, sopirante al li ĉiusekunde. Kaj ŝia ventro je sep-monata gravediĝo pezas sur ŝiaj femuroj dum ŝi muntas pli ol cent plastajn ludilojn, ĝis ŝiaj kruroj ŝveliĝas kiel du kaŭĉukaj tubegoj. Li nepre volis, ke la fremdlanda maljunulino aĉetu unu liton, ĉar ŝi jam konsumis liajn kvar horojn!

Kiam Molly ĉesis sian babiladon por trovi decan vorton, Zheng tuj puŝis broŝuron antaŭ ŝin. “Jen vidu ĝin...” Tiu paĝo plenplenis je fotoj de diversaj personoj. “La lito jam kuracis la spin-malsanon de tiuj ĉi personoj!”

Ĵetinte ekrigardon al li, ŝi diris: “Ĉu jes?”

“Ekzemple ŝi tute ne povis stari sur siaj piedoj. Ekde kiam ŝi aĉetis la liton, miraklo okazis!...”

Molly vidis, ke li montras la foton de maljunulino, kiu, surhavante bikinon, staras kun tordita pugo sub palmarbo.

“Kiu ŝi estas?” ŝi abrupte demandis.

Zheng ŝtoniĝis: “Mi ne scias...”

“Ĉu vi konas ŝin?”

“Mi ne ŝin konas. Sed...”

“Kiel vi povus ŝin kredi, ĉar vi ne ŝin konas?” Ŝi diris severe kaj disputeme: “Ĉar vi ne ŝin konas, kiel vi povus scii, ke oni dungis ŝin por diri sensencaĵojn?”

Li pensis en si: Diable, tiu ĉi maljunulino ne aspektas tiel stulta kaj obeema kiel ŝi estas.

“Tio estas absolute vera, absolute!” li diris. Liaj okuloj fariĝis ferocaj.

Ŝi haste retiriĝis malantaŭen kaj apogis sin sur la sofon. “Nu bone,” ŝi diris malforte, “ni konsideru tion vera.”

“Vidu. Ĝi ankaŭ povas aŭtomate leviĝi kaj malleviĝi je ajna pozicio konvena al televidspektado, librolegado...”

“Mi neniam legas librojn,” ŝi interrompis.

“Do, legi gazetojn...”

“Jam delonge mi ankaŭ ne legas gazetojn!”

Kolero ardiĝis en li. Li malpacience kriis: “Kion vi legas?”

Surprizite ŝi balbutis: “Mi...mi nur legas fakturojn.”

“Nu bone, vi povas komforte kaj ĝueme legi viajn fakturojn!”

Ekrigardinte lin, ŝi retiriĝeme diris: “Bone.” Iam ŝia filo kriaĉadis kontraŭ ŝi kaj ŝi ne kuraĝis paroli, retenante sian koleron.

“La kompanio donas al vi nova kliento la rabaton de dudek kvin procentoj. Tamen mi povas doni al vi la rabaton de tridek procentoj.”

“Dankon...”

“Nedankinde. Tridek procentoj estas tre altaj!” Li denove alklakis la malgrandan kalkulilon: “Jen vidu...”

Ŝi vole nevole iris vidi ĝin, sed ŝi pensis, ke malgraŭ ĉio ŝi devas preni pilolojn, ĉar ŝia koro komencis sin ĝeni. Tamen ŝi ne povis foriri serĉi la botoleton de medikamento, lasante la kolportiston okupi la gastoĉambron. Se ŝi foriros, oni ne scias, kion li faracoŝ. Eĉ se ŝi havas medikamentojn en la mano, ŝi ne prenas ilin antaŭ la vizaĝo de fremdulo. En ŝia koncepto oni ne devas preni medikamentojn en publiko. Ĉar malsano estas privata afero, preni pilolojn en publiko similas kiel fosi orelon, purigi naztruojn kaj manikuri piedfingrojn publike. Ŝi apartenas al tiu kategorio de homoj, kiuj ne malamas la Viktorian vivmanieron, sed ŝi ne scias, ke la homoj kun tiu vivmaniero ĉiuj preskaŭ mortis kaj nur ŝi restas viva. Ŝi maltrankvile knedis siajn fingrojn, kiuj jam ekstrems.

Zheng sentis sin malsata preskaŭ ĝis paralizigo. Subite la televokilo ĉe lia zono sonoritis. Li tuj ĝin ekrigardis. Jen lia edzino lin vokis. Li movis sian korpon al la telefonilo je unu paŝo kaj demandis al Molly: “Ĉu mi povus uzi vian telefonilon?”

“Ne,” ŝi respondis.

“Mia edzino estas graveda jam sep monatojn. Mi timas...”

“Do vi tuj reiru hejmen.”

“Mi devas doni telefonvokon al ŝi por scii, ĉu nenio okazas al ŝi...”

“Se mi estus vi, mi hejmeniru nun.” Ŝi movis la telefonilon al la loko, kiun li ne povis atingi.

Li, grinciginte la dentojn, decidis ne telefoni. Li ne povis forlasi la maljunulinon ĉe la momento favora al si.

“Mi ĵus forgesis diri al vi,” li penis aldoni forton al sia voĉo: “Al maljunaj klientoj kia vi ni donas ekstran rabaton de kvin procentoj! Tiel vi povas ricevi rabaton de tridek kvin procentoj!”

Ŝi retiriĝis pli kaj pli malgrande en la sofo. Ŝi pensis, ke apenaŭ li foriros, ŝi englutos pilolojn.

“Nu,” li diris: “mi donu pli aliajn kvin procentojn kaj faru la rondan sumon de kvardek procentoj, ĉu bone?”

Ŝi pardonpete skuis la kapon. Sur ŝia vizaĝo aperis laceco pro mortanta baraktado, kaj tristeco naskita pro tia laceco. Li parolis en si: mi ne povas kompati ŝin, neniel! Per plia fortostreĉo mi povas konkeri ŝin komplete. La televokilo refoje sonoris, sed li ignoris ĝin, ĉar li ne volis distriĝi tuj antaŭ la sukceso.

“Tri mil ses cent dolaroj dekalkuas la rabaton de kvardek procentoj,” li rapide alkalkis sur la kalkulilo, “Tio faras du mil unu cent sesdek! Do mi nur postulas de vi du mil dolarojn!”

“Du mil,” ŝi eklevis la ŝultrojn. “Tio estas vere bona negoco.” Nenia sopiremo videblis sur ŝia vizaĝo.

“Pagu al mi du mil dolarojn, kaj la lito apartenos al vi!”

Ŝi sentis, kvazaŭ io peza subpremuis ŝian koron, kiu baraktis jen kaj jen. Ŝi streĉis la kolon por eligi anhelon.

Fikse rigardante ŝin, li konsideris, ke ŝia anhelado estas la manifesto de ŝia decido, kaj li devas fari pluan paŝon. Li elpoŝigis plumon, kajeron da fakturoj kaj atestilo por asekuro kaj riparado. Ĝuste en tiu momento li sentis atakon de vertiĝo kaj preskaŭ falis en ŝian sinon. Tre kruela afero estis ĵongli per lango por persvado. Fakte li kaj ŝi estis same kruelaj. Li mem konsciis, ke iom da saneca koloro restanta jam tute vaporiĝis kaj liaj dek fingroj fariĝis lividaj.

“Ne.” Ŝi diris: “Du mil? Ne.”

Li tre volus sin ĵeti por strangoli ŝin. Kun pala vizaĝo, li daŭrigis: “Do, kiom vi volas pagi?”

“Mi...”. Ŝi denove eklevi la ŝultrojn: “Elspezi du mil dolarojn por unu lito? Ne. Lasu frenezulon fari tion.”

“Mi povas plumalaltigi la prezon. Vi nur pagos je duono de la prezo!”

“Mia lito bone statas, ĉiam bone dum tridek jaroj.”

“Jam tridek jarojn! Ĉu vi ne ŝanĝis vian liton dum tridek jarojn!” li ekkriis. Efektive li trenis liton el la ŝoseo al la hejmo por si kaj lia edzino, almenaŭ antaŭ kvindek jaroj. En la lito ili ambaŭ vole nevole ruliĝas en la mezon kune. Kiam

ili seksumiĝas, la lito knaras pli laŭte ol ili. “La lito de tridek jaroj. Ne mirige, ke ĝi vundas vian spinoston!” Li kriadis senmotive kaj samtempe li preme apogis sin sur la brakon de la sofo, ne povante stariĝi.

“Kio okazas al vi?” ŝi demandis.

“Nenio...”

“Vi ne aspektas bone.”

“Mi estas... tre tre malsata...” Li obtuze direktis siajn okulojn al ŝi: “De mateno ĝis nun mi ne prenis plenuŝon da nutraĵo.”

“Sed mi ne preparos vespermanĝon por vi,” ŝi sincere rigardis lin per bonkoraj senhariĝintaj okuloj, “ĉar mi mem neniam prenas vespermanĝon.”

“Mi ne volas vian vespermanĝon.”

“Mi jam kutimiĝas al vivo sen vespermanĝo. Kelkfoje mi trinkas nur tason da lakto. Tamen mi bedaŭras, ke mi ne trinkos lakton hodiaŭ. Pardonon.”

Zheng peze kaj malrapide ekbalancis la kapon, esprimante, ke li komprenas ŝin. Li sentis, ke la surprizatako de malforteco estas pasonta.

“Kion vi opinias... se mi donas al vi la rabaton de sesdek procentoj?”

Molly sentis, ke ŝia koro iom post iom ĝenas ŝin, kaj ŝi devas tuj engluti la pilolojn.

“Mi jam diris, ke mi portempe ne bezonas la liton kolportitan de vi,” ŝi diris.

“Fakte, se mi donos al vi la rabaton de sesdek procentoj, mi ne povos profiti eĉ unu cendon!” dirante, li disetendis siajn manojn.

“Kiom estas la prezo je la rabato de sesdek procentoj?”

Zheng abrupte leviĝis kaj montris al ŝi la malgrandan kalkulilon: “Mil kaj kvar cent! Nur pagu mil kaj kvar cent, kaj vi ekhavos la liton!”

Molly fermis la okulojn. Zheng atendis, retenante la spiron. Kiam ŝi ekmalfermis la okulojn, li tuj demandis: “Ĉu pagi kontante aŭ per ĉeko?”

“Ĉu mi diris al vi, ke mi aĉetos ĝin?” ŝi diris, ne plu kun amika mieno.

“Ĉu mi misaŭskultis vin?”

“Tre probable.”

Ili ambaŭ terure turmentiĝis. Proksime al vesperiĝo, li jam ne povis memori, kiom da fojoj lia edzino televokadis lin.

“Aŭskultu bone: mi aldonu pli alian rabaton de dek procentoj... mil kaj kvardek!” Li alproksimigis sian vizaĝon al ŝi, por ke ŝi povu klare vidi la sincerecon kaj ferocecon sur lia vizaĝo sen lamplumo.

Sen okulvitroj ŝi povis vidi nenion. Ŝi ŝaltis la lampon kaj diris: “Mia ĉielo!”

“Ronda sumo de mil dolaroj!”

“Se vi volontus malpliigi ĝin ĝis ses cent, mi akceptos,” dirante, ŝi pensis, ke ŝi troviĝas en sekureco je tia prezo.

“Ses cent! Ĉu vi volas, ke mi malprofitu?” li kriis.

Ŝi ekridetis. Bone, vi rezignu vian deziron, tiel ke mi povos preni pilolojn trankvile. Apogante sin sur la sofa brako, kun duone stara pozo, ŝi faris elakompanan geston: “La pordo estas tie.”

Li stariĝis kaj ĵetis ekrigardon al la vivanta tombo. Pensante, ke malŝpariĝis ĉi tie sep horoj de la kremo de lia vivo, li subite fikse ŝin rigardis kaj diris malgaje kaj solene: “Bone... ses cent, konsentite.”

Ŝi tute stultiĝis.

“Ses cent! Ĉu vi aŭdis klare? Tio estas la prezo de vi mem decidita!” Li eĉ aŭdis sian krion.

Ŝi faris sekan engluton. Jam tute malheliĝis ekstere. Ŝi jam travidis lian aspiron strangoli ŝin. Dum tiuj sep horoj tia aspiro inundis la koron, la korpon kaj manojn de la orienta junulo. Ŝi komencis traserĉi malordajn paperpecojn sur la tetableto.

Li fikse ŝin rigardis. Ŝi rapidigis traserĉadon. Fine la kajero de ĉeko aperis. Ŝi ĵetis singardeman rigardon al li.

Li donis al ŝi la plumon. Li venkis. Li atingis sian celon. Kvankam li ne akiris grandan profiton, li fine sukcesis. Dum la momento, kiam li vidis la kadukan maljunulinon deŝiri folion de ĉeko, li penis deteni sian kompaton subite ŝprucantan.

Molly donis al li la ĉekon. Tiom malgranda paperpeco eĉ tremigis ŝin kiel cikadflugilojn en aŭtuna vento.

Zheng apenaŭ foriris, kiam Molly eksentis agonion. En la amaso da malordaj paperpecoj, kiujn ŝi ĵus serĉe turnis, ŝi trovis la boteleton de madikamento. Ŝi kaptis ĝin en la manon. Tuj kiam ŝi pretis malŝraŭbi la kovrilon de la boteleto, ŝi ekpensis pri pli grava afero. Ŝi altiris la telefonilon kaj premis la telefonnumeron de la banko. Ĉe la alia fino aŭdiĝis maŝina voĉo, kiu petis ŝin atendi. Ŝi tamen ne havis forton por atendi kaj kriis kontraŭ la ĝojplena voĉo de la maŝino ĉe la alia fino: “Nuligu... nuligu...” Ŝi volis peti al la banko nuligi la ĉekon, kiun ŝi ĵus subskribis, sed ŝi neniel povis kolekti suface da forto por finparoli la frazon. Ŝi kuŝiĝis sur la sofon.

Zheng fluge stiris la biciklon al sia hejmo. Ĉe la pordo li renkontis najbarinon, kiu ĝuste eliris el sia hejmo sur la dua etaĝo. “Kio ja okazis al vi vi?” Ŝi montris lin per pistolsimila montrofingro, dirante: “Estas malfrue. Mi ripetade vokis vin per televokilo, sed vi neniel respondis. Via edzino jam portiĝis al hospitalo!”

Lia buŝo kapabla konvinke babili tuj fariĝis ronda truo.

“Hemoragio! Antaŭtempa akuŝo! Jen vidu la teron!”

Sur la planko el lia subtera kelo videblis sangaj gutoj disverŝiĝitaj, ankoraŭ freŝaj kaj glimantaj en la lamplumo.



Luxun (1881-1936)



Saĝulo, malsaĝulo kaj lakeo

Elĉinigris Minosun

Lakeo nur serĉas homon por fari plendon. Nur por tio, kaj nur tiel. Iutage li renkontas saĝulon.

“Sinjoro!” Li triste diras, kun larmoj fadene defluantaj de la okulaj anguloj. “Kiel vi scias, la vivo de mi vivata simple ne estas de la homo. En unu tago al mi ne certas unu manĝo. Kaj tiu manĝo estas sole el sorga brano, kiun eĉ porko aŭ hundo ne tuŝas. Kaj estas nur malgranda bovlo da ĝi...”

“Tio vere kompatigas.” La saĝulo malĝojas.

“Ĉu jes!” Li ĝojas. “Kaj ne ekzistas al mi ripozo krom laboro, ĉu tage, ĉu nokte: frumatene mi portas akvon, vespere preparas manĝon; antaŭtagmeze servas por aĉeto, nokte farunon muelas; en la serena tago lavas vestojn, en la pluva tenas ombrelon por mia mastro; vintre flegas la kerosenan fornon, somere ventumas por la mastro. Kaj noktomeze mi devas, brezante tremelon, servi apud mia sinjoro, kiu sin amuzas en monludo, kaj mi ricevas neniom el la procentaĵo de la gajnita mono, sed, foje, vipojn.”

“Ho ve!” La okuloj de la saĝulo, kiu suspiras, preskaŭ malsekiĝas de larmoj.

“Sinjoro! La staton mi ne povas elteni plu. Mi devas elpensi ian elirejon, sed kian? ...”

“Mi pensas, via stato iam boniĝos...”

“Ĉu jes? Tiel estu! Sed mi jam konfidis al vi miajn ĉagrenojn kaj de vi ricevas la kompaton kaj konsolon. Nun mi sentas min multe kontenta. El tio mi vidas, ke la ĉiela moralo ne damniĝas...”

Sed, post kelkaj tagoj, li ofendiĝas denove kaj, same kiel antaŭe, serĉas homon por diri plendon.

“Sinjoro!” Larmante li diras, “kiel vi scias, mia kuŝejo pli sordidas eĉ ol la porkejo. Mia mastro, fakte, ne traktas min kiel homon: li kondukas al sia pekinhundo pli bone, eĉ dekmiloble, ol al mi...”

“Bastardo!” Tiu homo kriegas, kaj tio mirigas la plendanton. La homo estas

malsaĝulo.

“Sinjoro, mia loĝejo estas kaduka ĉambreto. Humida, malluma, kaj plena de litcimoj. Kiam mi kuŝas, ili min pikas senskrupule. La fetoro ondas en mian nazon, kaj en la kvar muroj ne garniĝas eĉ unu fenestreto...”

“Vi ne povis postuli al via mastro almeti unu?”

“Ĉu mi povus?...”

“Do, vi portu min al la loko!”

Sekvante la lakeon, la malsaĝulo venas ekster la dometon kaj komencas rompi la muron el tero.

“Sinjoro! Kion vi faras?” Li krias ege surprizite.

“Por vi mi faras truon en la muro.”

“Tio ne eblas! La mastro insultos!”

“Spite lin!” Li daŭrigas.

“Helpon! Rabisto detruas nian domon! Rapidu, alie truo aperos en la muro!...” Li plorkrias kaj ruliĝas sur la tero.

Aro da lakeoj venas, kaj forpelas la malsaĝulon.

Aŭdinte la kri-bruon, la mastro lante eliras lasta.

“Estis rabisto, kiu venis por disfrakasi nian domon. Mi, la unua, kriis, kaj ĉiuj kune lin forpelis.” Li diras respekte kaj triumfe.

“Bone vi faris.” La mastro tiel lin laŭdas.

En tiu tago venas multaj, ankaŭ la saĝulo, por esprimi simpation al la lakeo.

“Sinjoro! Ĉi-foje la mastro rekompencis min per laŭdoj, pro miaj meritoj. Iam vi diris, ke mi estos en bona stato. Vere vi havas antaŭvidon...” Li gaje diras, kvazaŭ kovrata per granda promeso.

“Ĉu tio ne estas...” La saĝulo, kvazaŭ anstataŭ li, gaje respondas.

Neĝo

La pluvo de varma sudo neniam transformiĝis en neĝoflokojn, kiuj estus glaciaj, duraj kaj brilaj. Multesciaj homoj sentas ĝin monotona, kaj ĉu ĝi mem ankaŭ trovas sin malfeliĉa? Sed la suda neĝo estas humida kaj ĉarma ĝis ekstrema grado. Ĝi estas la informo pri printempo ankoraŭ svage sin kaŝanta, kaj estas la haŭto de fortikega virgulino. En la neĝa dezerto manifestiĝas sangaruĝaj kamelifloroj, unupetalaj umefloroj verdhele blankaj, kaj malhele flavaj kimonantfloroj; kaj sub la neĝo ankoraŭ kreskas sovaĝaj herboj glacie verdaj. Vere mankas papilioj; ĉu abeloj venas kolekti la mielon de kamelifloroj kaj umefloroj, pri tio mi ne certas en mia memoro. Sed antaŭ mi kvazaŭ

videblus, ke vintraĵ floroj disfloras sur la neĝa sovaĝejo, kaj multaj abeloj flugas senhalte; kaj ankaŭ aŭdeblus, ke ili tumultas zumante.


Blovante la frostiĝintajn manetojn purpurajn kiel zingibro, sep aŭ ok infanoj kune modlas neĝan statuon de arahanto. Pro ilia malsukceso la patro de unu el ili venas helpi. La statuo jam altas pli multe ol la infanoj. Ĝi estas maso supre malgranda, malsupre granda, kaj tiel forme svaga, ke oni ne povas distingi, ĉu ĝi estas kukurbo aŭ arahanto. Sed ĝi, pure blanka, tre hela, kompaktiĝas per sia propra malsekeco kaj do treme brilas en la tuta korpo. La infanoj uzas longanojn kiel ĝiajn okulojn, kaj ŝtelas ruĝon el la tualetujo de iu patrino el ili, por ŝminki ĝiajn lipojn. Jen aperas vera arahanto. Nun ĝi sidas en la neĝo kun la okuloj brilaj kaj la lipoj ruĝaj.

En la sekvanta tago kelkaj infanoj ankoraŭ ĝin vizitas: kontraŭ ĝi ili klakfrapas la manojn, balancas la kapon, kaj gaje ridas. Sed en la fino ĝi sidas nur sola. En serena tago ĝia haŭto degelas, dum en la frosta nokto ĝi glaciigigas kaj fariĝas figuro maldiafana. Post kelkaj sinsekvaj sunbrilaj tagoj ĝi jam aliformiĝis en oni ne scias kion, kaj la ruĝo ankaŭ forpaliĝis komplete.

Kaj tamen la nordaj neĝoflokoj flirtintaj ĉiam aspektas kiel polvoj, sableroj, neniel kuniĝantaj. Ili disŝutiĝas sur tegmentojn, teron kaj velkintajn herbojn. La neĝo sur tegmentoj jam frue degelis kaŭze de la hejta varmo de homa domo. Ĉio alia, en serena vetero, post kiam subite alblovas turniĝanta vento, energie disflugas kaj ore brilas en la suna lumo, same kiel densa nebulo, kiu envolvas fajroflamon, kirliĝas kaj supren leviĝas, sin plenigas en la universo; kaj la universo siavice ruliĝas kaj scintilas ascendante.

Sur la senlima dezerto, sub la frosta ĉielo, tio, kio ruliĝas kaj ascendante scintilas, estas la spirito de la pluvo...

Jes, ĝi estas la soleca neĝo, mortinta pluvo, kaj pluva spirito.



Xu Dishan (1894-1941)



Ĉe la Ponteto

Elĉinigis Liu Hongyuan

Nia loĝejo troviĝas ĝuste apud la Persik-rivereto. Laŭlonge de ambaŭ bordoj videblas amaso da persik-arboj, kies fruktoj kaj folioj speguliĝas en la akvo, kaj tio des pli montriĝas la kvieteco kaj trankvileco sur la bordoj de la rivereto. Tute neatendite, tiuj, kiuj haste fuĝis, povas eĉ ĝui tian pitoreskan vidaĵon! Ĉiutage ni ludas en la arbaro, kaj kelkfoje lante paŝas trans la ponteto por serĉi la nove kreskantajn sukerkanojn en la ĝardeno de iu nia amiko.

Tiutage ni volis denove iri al la sukerkan-ĝardeno. Apenaŭ ni transpaŝis la ponteton, ni trovis A-Fang, posedanteton de la ĝardeno, sidanta sub la ponteto kun sombra mieno.

“Leviĝu, Fraĉjo A-Fang, kaj konduku nin en vian ĝardenon.” Li levis la kapon, ĵetis al ni rigardon, sed nenion diris.

Mia frato diris, “A-Fang, ĉu vi ne diris, ke vi forlavos ĉiajn viajn ĉagrenojn tuj kiam vi estas ĉe la akvo? Ĉu vi ne diris ankaŭ, ke vi estus kiel ĉe-akva libelo? Vidu do, kiel tiu libelo sur la plumeca amaranto povus kompari kun vi?”

“Nu, jes! Tamen la hodiaŭa tago estas por mi unuafoje ĉagrena.”

Ni ĉiuj iris malsupren al la bordo kaj staris ĉirkaŭ li por informiĝi pri tio. Li diris, “Hong’er ĵus falis en la akvon!” De antaŭ sia naskiĝo Hong’er jam fariĝis lia fianĉino kaj ili kune ludis preskaŭ ĉiutage. Aŭdinte kion li diris, ni ĉiuj estis mirigitaj. Fraĉjo diris, “Se tiel, ĉu vi povus eĉ plu sidi silente ĉi tie? Kial ne iun venigi senprokraste?”

“Sed mi timas, ke, se mi hejmeniros, ĉagrenoj tuj venos en la koron de mia panjo unu post alia, kiel persikoj kreskas sur la arbo. Mi preferas sola ĉagreniĝi ĉi tie, ol informi ŝin pri tio.”

Antaŭ ol mi finis miajn vortojn, fraĉjo jam sage kuris al la hejmo de Hong’er. Dum A-Fang kunŝovis la brovojn, mi senhelpe rigardis lin kaj nenion diris.

“Kiu falis en la akvon?”

Mi rekonis, ke tio estas la voĉo de Hong'er. Turniĝinte mi ekrigardis, ke vere venis fraĉjo kune kun Hong'er. Ŝi ridetante venis antaŭ Fraĉjon Fang, kiu ŝajne mirigite rigardis ŝin. Post longa silento li diris, "Ĉu ne plenumiĝus viaj vortoj? Ĵus mi rapidis al la bordo por rigardi mian figuron en la akvo. Mi metis Hong'er sur la arbo kaj, tute nerimarkite, la venteto svingis ĝin en la akvon. Tuj ĝi fordrivis laŭ la fluanta akvo. Kiam mi turniĝis por ĝin brakumi, ĝi jam forestis."

Nur tiam Hong'er eksciis, ke tio, kio falis en la akvon, estas nenio alia ol la de ŝi donacita pupo-knabineto. Ŝi iam diris al A-Fang, ke tiu pupo ankaŭ nomiĝas Hong'er. Se li perdus ĝin, li egale perdus ŝin. Estis ne mirinde, ke Fraĉjo Fang tiel singarde ĝin prizorgas.

Efektive, Fraĉjo Fang kredis, ke la vortoj de Hong'er devus esti absolute veraj, sed li estis en dubo pri la hodiaŭa okazaĵo. Li diris, "Ej, kion vi diris ne estas vera! Nur nun mi eklernis, ke perdi vian donacon ne signifus perdi vin, kaj ke, nur se vi vere perdiĝus, tio kalkuliĝus al perdo."

Mia frato diris al Hong'er, "Hazardaj vortoj estas ja konvinkaj. La firma konvinko al vi de Fraĉjo Fang estas senatende rompita de vi por la unua fojo!"

Hong'er tamen ne maltrankviliĝis kaj nur senzorge diris, "Konvinko estas nenio, nur la vero utilas! ... Nu, bone, pere de tio mi povis ekscii pri li. Do kial ni ne iru al la sukerkan-ĝardeno?"

Ni kune iris al la sukerkan-ĝardeno. Kaj Fraĉjo Fang englutis la ĵusan ĉagrenon kune kun la dolĉa suko.

Printempo Regas la Sovagejon

Printempo, kuŝanta en la sino de l' montaro, senvualiĝas eĉ pli malfrue. Tie ankoraŭ floras la ĉarmaj persikfloroj. Maldensaj nuboj vagas malurĝe de pinto al pinto de l' monto; jen kaj jen ili paŭzas momente, por kovri la sunon kaj kaŝi la florojn kaj herbojn for de la minaco de l' sunflamo per sia ombro.

Pteridoj kaj alispecaj pterisoj kreskas ĉie en la ombroj de rokoj kaj ambaŭflanke de la enmontaj riveretoj. La verda herbaro estas plibeligita de la etaj herbfloroj ruĝaj, flavaj, bluaj kaj purpuraj.

Alaŭdoj en la ĉielo kaj orioletoj en la arbaro, ambaŭ pepas siajn kantojn. La facila vento premas tiujn sonojn kune kaj dissendas ilin al diversaj estaĵoj, ĉu kun oreloj ĉu sen oreloj. Persikfloroj al ili aŭskultas tiel ensorĉite, ke ili ne povas sin deteni de larmoj, kiuj kondensiĝas sur la tero. Ankaŭ herbetoj

aŭskultas ravite kaj dancas akorde kun la ritmo de l' ventsono, jen kliniĝante, jen leviĝante, sed neniam haltante.

Aro da infanoj kolektas la falintajn petalojn de la persikfloroj sub la arboj. Kiam ili tion faras, Qing'er ekkrias, "He, Yongyong alvenis!" Ĉiuj infanoj ĉesas kaj rigardas al la fino de la persikarbaro. Kiel atendite, ankaŭ Yongyong tie kolektas la petalojn.

Qing'er diras, "Hodiaŭ ni provos la talenton de A-Tong. Se li sukcesos, ni surfadenigos la petalojn en ĉenon por lin ĉirkaŭi. Per tio ni nomu lin ĉef-frato, ĉu bone?"

Ĉiuj konsentas.

A-Tong iras al Yongyong, dirante, "Ni nun atendas vin!"

Ĉirkaŭante la kolon de Yongyong per sia liva mano, A-Tong diras dum irado, "Hodiaŭ oni preparos por vi doton kaj edzinigos vin al mi. Ĉu vi volonte fariĝas mia edzino?"

Yongyong jetas al A-Tong severan rigardon kaj, turniĝante, flankenpuŝas lin por ne lasi lian manon plu resti ĉirkaŭe sur ŝia kolo. La infanoj tiel ridas, ke ili apenaŭ povas plu elteni.

Ĉiuj infanoj plenforte krias, "Yongyong puŝis lin flanken, ni tion vidis! A-Tong venkas!"

Yongyong neniam faris rifuzon. Kiel A-Tong povas scii, ke ŝi certe puŝos lin nur se li tion diros? Ĉu liaj deziroj montriĝis nur pro tio, ke la pompo de l' printempo ondiĝas? Aŭ ĉu pro tio, ke tia devus esti la natureca deziro?

Vidu, la vagantaj nebuloj ankoraŭ flugas de tiu montpinto trans alian.

Aŭskultu, la ĉielo kaj la arbaro ambaŭ pleniĝas de la kantoj de alaŭdoj kaj oriojoj. Ene de la persikarbaro ĉirkaŭata de l' montoj, kiel tiuj petolemaj infanoj, tiel ankaŭ ĉiuj aliaj estaĵoj, estas anime ekstazaj de l' printempo.

Nur admire...

La fino de la vojo Edward tre alproksimiĝas al la vilaĝo, kie ĉie staras la viloj de riĉuloj. La malnova ŝtona domo ĉe la orienta parto de la vojo estas loĝejo de sinjorino Wu Suqing. La surlianaj floroj antaŭ la domo etendiĝas de la malalta muro ĝis supre de la ĉina sapio ĉe la vojrandoj kaj ankaŭ sur la plektobarilon de najbaroj, kaj ili pli bele ornamas la vojeton.

Balaaj-kolektisto, tirante la balaaj-ĉaron, venis antaŭ la domon. Apenaŭ li tintigis la pordosonorileton, elvenis mezaĝa servistino kun balaajujo da forjetaĵoj en la manoj.

Ricevinte la balaajujon, la kolektisto verŝis la forĵetaĵojn en la ĉaron kaj demandis, “Onĵo Ling, kial tiom da forĵetindaj paperoj vi havas hodiaŭ? Ĉu ankoraŭaj homoj alsendis ion al via fraŭlino?”

“Ne, ne vere. Tiuj paperoj estas simple letero alveninta ĉi-matene...” Retrorigardinte, ŝi daŭrigis, “Nia fraŭlino havas strangan humoron. Ŝajnas, ke tiu letero eble alportus ion malbonan rilate vivon.”

“Pro kio?” Li rigardis la forĵetindajn paperojn en la ĉaro kaj ilin movis per fingroj, dirante, “Estas nenio ĉi tie ene. Diru al mi kio do okazis?”

“Inter la amikoj de nia fraŭlino mi neniam renkontis iun, kiu estas pli afabla ol sinjoro Chen. Ĉu mi ne rakontis pri li antaŭe?”

“Jes, vi iam diris, ke liaj talento, vizaĝo kaj konduto — tiuj ĉiuj montriĝas malsame kiel ĉe ordinaraj homoj. Probable via fraŭlino admiras kaj ŝatas lin, sed li ne volantas, ĉu ne?”

“Kion vi diris? Estas ĝuste kontraŭa al tio, kion vi diris! Iun tagon alvenis letero de sinjoro Chen, kune kun tre granda diamanto. Antaŭ ol legi la leteron, ŝi ordonis forĵeti tiun aĵon el la fenestro...”

“Estus tre bedaŭrinde, ĉu ne?”

“Jes, certe bedaŭrinde. Kaj tiu diamanto ankoraŭ kuŝas hodiaŭ en la koto profunde de l’ lageto!”

“Vere, vere bedaŭrinde! Kial vi ne elakvigis ĝin?”

“Kia stultulo! Vi tro facile parolis! Kie en tiel granda lageto vi povus eltrovi la diamanton? Cetere, la fraŭlino intence ĝin ĵetis en la lageton. Kiu kuraĝe ŝin ofendos?”

“Nu, kio estas dirita en la letero?”

“Antaŭ ol legi, ŝi ĉifis la leteron kaj petis, ke mi ĝin forbruligu. Mi malfaldis la leteron kaj ĝin legis sen ŝia scio, sed bedaŭrinde mi povis nur parte kompreni la leteron, ĉar mi scias nur malmulte legi. La letero sentigis min tre maltrankvila por kelkaj tagoj...”

“Vi daŭrigu.”

“Sinjoro Chen diris en sia letero, ke la diamanto estas transdonita herede al li de lia patro. Li havas nenian alian valoraĵon ol tiu trezoro. Li volonte donis ĝin al nia fraŭlino nur pro tio, ke li admiras ŝin.”

“Kian blindan pasion havas sinjoro Chen!”

“Kiu povus tion diri? Mi nur kulpigas tion al nia fraŭlino...” Tion dirante, ŝi denove turnis la kapon kaj rigardis. La vojeto, tiel kvietita, estas taŭga loko, ĉe kies rando oni povas halti por babiladi. Tial ŝi diris plu.

“Alifojon, sinjoro Chen venis kaj donacis al ŝi pentraĵon, dorse de kiu algluiĝas papereto. Li diris, ke la pentraĵo, pri kiu li estas plej kontenta, iam

ricevis ian oran medalon en iu konkurso. Li volis donaci al ŝi siaĵon plej valoran, ĉar li admiris ŝin. Sed nia fraŭlino ial nur ekĝemis kaj disŝiris la pentraĵon!”

“Nun ke via fraŭlino ne akceptis eĉ diamanton, pentraĵo do estas nenio por ŝi! Ĉu li ne subtaksis vian fraŭlinon? Se mi estus via fraŭlino, ankaŭ mi ekkolerus. Vi diras, ke sinjoro Chen estas inteligenta; malgraŭe li estas pli stulta ol mi. Li estus devinta donaci al via fraŭlino ion pli karan ol diamanto por montri sian admiron.”

“Ne, ne tiel, vi ankoraŭ ne...”

“Kial sinjoro Chen faris al si tion? Se li nur volus preni al si edzinon, li povus vendi la diamanton por mono kaj per ĝi havigi al si eĉ cent. Kial li nepre edziniĝis al si vian fraŭlinon?”

“Sinjoro Chen dum la tuta tempo ne diris, ke li edziniĝos al si nian fraŭlinon. Anstataŭe, li nur diris, ke li admiras ŝin.”

“Kio do sekvis?”

“Okazis nur antaŭ pli ol dek tagoj, ke li sendis la pentraĵon. Plejlaste li sendis tiun ĉi leteron.”

“Jen la letero!” Li elprenis la paperojn el la ĉaro, forskuis de ĝi la polvon kaj foliumis ĝin, dirante, “Jen pure blankaj paperoj sen ia ajn vorto!”

“Prave dirite! Tio estas tre stranga letero. Kiam ĝi atingis ĉi-matene, mi rimarkis la vortojn sur la koverto: ‘Se vi min respektas, havu la bonecon malfermi ĝin, alie ĝin forbruligu.’ Sed nia fraŭlino insiste rifuzis la leteron kaj postulis, ke mi perfajre detruu ĝin. Ĉiaokaze mi volis scii, kio estas skribita en la letero kaj ĝin malfermis. Dum foliumado, mi trovis, ke la letero konsistas el tutblankaj paperoj. Malpacienca, mi volis ĵeti ilin en fajron, sed post momenta pensado, sentis iom da domaĝo. Tial mi plu foliumis la leteron, ĝis fine mi vidis unu lian portreteton pentritan de li mem.” Tion dirante, ŝi serĉfosis la portreton el la ĉaro kaj ĝin montris al la balaaf-kolektisto. Ŝi diris, “Rigardu, kia bel-aspekta viro!”

“Estus neniel belaspekta kun makuloj nigraj kaj blankaj sur la vizaĝo, ĉu ne?”

“Vi vere ne komprenas... eh, legu la vortojn apudajn...”

“Legi mi ne povoscias, prefere vi legu ilin por mi.”

Fingre montrante la vortojn, Onĵo Ling legis, “Via moŝta amikino: Mi jam donis al vi ĉion, kion mi posedas. Sed ĉion tion vi rifuzis. Restas al mi nun nur mia vivo, kiun mi povus al vi dediĉi kiel mian lastan donacon...”

“Kiu prenos lian vivon? Vi diras, ke li estas inteligenta, tamen li estas simple stultulo!”


Anstataŭ respondi, Onjo Ling daŭrigis, “Mi scias, ke ĝi plaĉas al vi; sed antaŭ ol mi forpasos, mi volas donaci al vi...”

“Onjo Ling, Onjo Ling, via fraŭlino vokas vin!” Aŭdiĝis ia voĉo de sur la ŝtuparo en la ĝardeno, kiu interrompis ilian babladon. Onjo Ling ĵetis la portreton reen en la ĉaron kaj diris, “Mi devas reeniri...”

“Tion vi devas sciigi al via fraŭlino, kio rilatas al homvivo.”

“Kiu kuraĝas! Ŝi ne nur ne petis min malfermi la leteron, sed male ordonis min forbruligi ĝin. Se mi sciigos ŝin pri tio, ĉu tio ne egalas, ke mi altiros formikojn sur min! Mi timas, ke tio ĝenos min, tial mi ne forbruligis la leteron. Nu, vi rapide forpuŝu la ĉaron, alie estus embarase se ŝi tion scius post momento.” Tion dirinte, en rapidemo, ŝi fermis la feran pordon kun maldensaj kradoj.

La balaaj-kolektisto tiris la ĉaron al aliaj domoj. La portreto estis hazarde blovita sur la teron de la vento kaj lasis sin treti laŭplaĉe de homoj kune kun la falintaj floroj. La sorto de la portretaĉo tamen estis finfine feliĉa, ĉar, se ĝi estus falinta sur la vojeto, fraŭloj kaj fraŭlinoj pasantaj eble reprenus ĝin por apreci; eĉ se la naivaj infanoj reprenus kaj disŝirus ĝin post fuŝpalpado, tio estus pli bona, ol ke la ĉaristo alportus kaj enigis ĝin en la rubejon.



Anonima

Mistera puto

Reskribis Yanke laŭ surreta materialo

Post diplomitiĝo el universitato Duano penis dungigi ĉe kompanio, sed pro lia mallaboremo li ne povis teni sian okupon kaj senĉese saltis de unu kompanio al la alia. Li ĉiam songis pri riĉiĝo de nenio. Kvankam li ne havis neniom da ŝparmono, li prunteprenis monon de familio al familio. Antaŭ kelkaj tagoj li prunteprenis cent mil yuanojn por aĉeti biletojn de loterio, kaj li rikoltis neniom. Kiam li vidis sian avon proksimiĝanta al la aĝo de naŭdek jaroj, li sentis malĝojon kaj maltrankvilecon.

Antaŭ multaj jaroj lia gepatroj ambaŭ mortis pro aŭtomobila akcidento, li vole nevole vivis ĉe sia avo. Ekde kiam li estis knabo, lia avo alnajiĝis al la lito pro malsano. Eble pro granda aĝo lia avo diris nenion al li, kvazaŭ vivanta mortinto. Tio, kio plej timigis lin, estis, ke lia avo ne havis manojn. Kial lia avo ne havis manojn, liaj gepatroj neniam rivelis al li.

En liaj okuloj la avo estis nur fremda maljunulo. Preskaŭ nenia inteimeco ekzistis inter la avo kaj nepo, kaj male eĉ iom da rankoro koviĝis inter ili pro tio, ke la avo lin implikas nun. Krom ĉiutaga prizorgo al si avo, li neniel diris ion superfluan al li. Tamen Duano klare memoris, ke, kiam lia patro ankoraŭ vivis, li diris al li, ke la avo estis tre riĉa antaŭe.

Tiutage Duano, kiu avidis je riĉiĝo, traserĉis la aĵojn de sia avo por trovi ion eksterordinaran. Ĉar lia avo en granda aĝo travivis multe, li certe kaŝis ion siatempan, eble valoran. Se mi trovos ion, Duano pensis, mi eble akiros abundon da mono, cendis ĝin. Kvankam li havis la saman ideon antaŭe, li ne riskis siajn penojn por trovi ion. Sed nun li preskaŭ manĝis la venton por satigi sin, kaj li malgraŭe faris tian traserĉadon.

Traserĉinte tie kaj tie, fine li trovis eluzitan kesteton en tre sekreta angulo sub la lito. Plena je espero, li malfermis ĝin kaj trovis nur malnovan taglibron. Lia patro diris al li, ke lia avo instruis en malgranda vilaĝo, kaj tiu taglibro certe apartenis al li.

Scivoleme li elprenis la taglibron kaj foliumis kelkajn paĝojn, kiam lia avo subite malfermis siajn maljunajn okulojn kaj pene etendis brakon, kun murmuro en la buŝo, ŝajne volante malhelpi sian nepon legi la taglibron.

“Kial vi ne lasu min legi? Ĉu en ĝi troviĝas mapolinio por trezoroj?” Tiujn



vortojn eligis Duano kun malkontenteco kaj li daŭrigis legadon.

La avo mallevis la brakon. Liaj velkiĝintaj kaj sekaj okuloj eljetis tre maltrankvilan kaj senhelfan rigardon. Lia miasma kaj malgrasa korpo ekstremetis.

Dun tiu tempdaŭro Duano pli kaj pli rapidigis sian legadon kaj lia mieno fariĝis pli kaj pli peza.

Duano trovis, ke la taglibro konsistas el pli ol dek pecoj, el kiuj li akiris kelkajn informojn: unue lia avo siatempe instruadis en la vilaĝo Z; due la vilaĝo Z estis la frekventejo de komercistoj kaj la vilaĝanoj estis tre riĉaj; trie poste ĉiuj vilaĝanoj mistere forlasis la lokon, kiu de tiam fariĝis neloĝata kaj sovaĝa.

“Preskaŭ dum unu nokto ĉiuj vilaĝanoj forfuĝis, forĵetinte kaj enteriginte la posedaĵojn, kiujn ili ne povis kunporti. Kia katastrofo! Mi deziras, ke oni ne plu memoras la vilaĝon ekde nun. Ankaŭ mi iros malproksimen.” Tio estis la enhavo de la lasta paĝo de la taglibro.

Antaŭ tio Duano aŭdis pri la vilaĝo Z, kiu situante ĉe la piedo de la monto sude de la urbo, distancis pli ol du cent liojn de la urbo, kaj kiun neniu vizitis, tial nedamaĝitan. Oni diris, ke la forlasita vilaĝo elspiras makabran etoson.

Finleginte la taglibron, Duano subite sentis, ke neloĝateco de la vilaĝo estas bona afero, ĉar li eble povos eltrovi ion valoran. Ĝojplene li telefone konektiĝis kun Sun kaj rakontis al li pri la vilaĝo.

Sun estis lia kunlerninto en universitato kaj funkciigis butikon de antikvaĵoj post diplomitiĝo el la lernejo. Li kompreneble konis la valoron de tiuj malnovajoj.

Kiam Duano telefonis al Sun, lia avo sur la lito portis lividan mienon, ŝajne retenante la lastan spiron, sed li donis nenian atenton al la avo.

Post kelka preparado Duano kaj Sun ekiris. Post du horoj ili trairis makabran arbaron, kie eĉ aŭdiĝis neniu ĉirpado de birdoj, kaj fine ili atingis la forlasitan vilaĝo ĉe la piedo de la monto.

La vilaĝo ne estis granda, sed ne damaĝita. Svage vidiĝis tie blankaj muroj kaj nigraj tegoloj, kio montris la antaŭan riĉecon de la vilaĝo antaŭ ol ĝi

dezertiĝis. Ĉie kreskis pompe herbaĉoj, pendis araneaĵoj kaj malklaraj spuroj de ĉevalhufoj sur la ŝtonplata vojo plena de muskoj.

“Ĉu via avo diris al vi, kial ĉi-tieaj vilaĝanoj ĉiuj forfuĝis dum unu nokto?” Sun demandis maltrankvile.

“Tio ne gravas. Estas grave, ĉu ni povos trovi valoraĵojn,” diris Duano.

“Jam forpasis kelkdek jaroj. Mi konsideras, ke ne estas granda espero eltrovi valoraĵojn. Kaj plie ĉi tie neniu loĝas dum kelkdek jaroj kaj regas makabra etoso. Laŭ mi, ni pli bone reiru,” diris Sun, ĉirkaŭrigardinte.

“Ne afektu. Ĉu vi pensas, ke mi ne scias, de kie venas tiuj antikvaĵoj en via butikoj?” Duano ŝerceme diris.

“Jes. Tiujn aĵojn alportis tombŝtelistoj, kaj mi nur aĉetis ilin. Neniam mi persone prifosis ilin!” Sun kontraŭdiris malkontente.

“Tio estas la sama afero. Ne babilaĉu. Rapide ni traserĉu,” diris Duano.

“Kion ni povus fari en tiom granda vilaĝo”

“Kompreneble ni utiligu altteknikajn rimedojn,” dirante, Duano elprenis faldeblan detektilon por metalojn.

Dum pli ol unu horo ili skanis la vilaĝon kelkfoje per la detektilo, sed ili rikoletis nenion krom kelkaj moneroj kaj hufferoj. Ili dronis en laceco kaj malespero. Kiam ili volis sidiĝi sur ŝtonplato por ripozi, la detektilo eligis okulpikan alarmajn sonojn.

“Troviĝas aĵoj, kaj tre multaj!” Ili du tuj ekscitiĝis kaj forŝovis la ŝtonplaton, kiun la detektilo indikis. Ili surprizite trovis, ke sub la ŝtonplato troviĝas puto en mallumo. Kiam la detektilo estis enmetita en la puton, la alarma sono pli laŭte sonoris.

“Troviĝas trezoroj ĉe la puta fundo!” Sun diris ekscitite.

“Mi jam diris al vi, ke ni ne faros senfruktan vojaĝo, ĉu!” dirante, Duano ĝojplene venigis longan branĉon kaj etendis ĝin en la puton. Li trovis, ke estas akvo en ĝi, kaj la akvo tre profundas, sed tio ne ĝenis lin. Li elprenis el la sako malgrandtipan subakvan spirilon kaj kompletan da akvimuna kostumo.

Je tio Sun ĝojiĝis: “Duano, vi vere pretigis vin anticipe!”

Ili ligis longan ŝnuron al la dika salikarbo apud la puto kaj ĵetis la alian fino de la ŝnuro en la puton. Kiam Duano pretis subakviĝi vestita en akvimuna kostumo kaj kun spirilo, leviĝis ventblovo de ĉirkaŭe kaj la branĉoj de salikarbo dance svingiĝis kiel demonaj ungegoj.

Kial subite leviĝus vento en serena tago? Radio da maltrankvileco fulmis tra ilian koron. Tiam Duano trovis virinon blanke vestitan, kiu, starante ĉe la pordo nemalproksima de la puto, malvarme rigardis al ili. Ŝi ŝajnis proksimume tridek-jara, kun delikataj vizaĝtrajtoj kaj kun pala vizaĝo.

“Kiu vi estas?” Duano tuj demandis. Dirante nenion, ŝi rekte eniris la domon.

“Ĉu...ĉu ŝi estas fantomo?” Sun diris anksie.

“Ne diru sensencaĵon! Kie troviĝas fantomoj? Ni iru tien vidi,” dirante, Duano eniris la domon, tirante Sun.

Endome estis malvarma kaj sombra. Krom eluzita ŝpinilo ĉe la pordo ili vidis nenion inkluzive de la virina figuro, kiun ili ĵus vidis.

“Kie ŝi estas? Kial ŝi malaperis? Ĉu ŝi ne estas fantomo!” Sun diris panike.

Tiumomente Duan ankaŭ sentis maltrankvilecon. La celo por li veni ĉi tien estis trovi trezorojn por vendi, kaj li malhavis tempon timi. Li prefere kredis, ke li ĵus ekhavis halucinon.

“De nun ni nek vidis nek aŭdis ion ajnan. Ni rapide malsuprengrimpu la puton.” Duano trenis Sun eliri. Tuj ĉe la momento, kiam ili trapasis la sojlon de la dometo, la ŝpinilo malantaŭ ili subite knare moviĝis. Ili vere ŝokiĝis de timo.

“Ne turni la kapon. Daŭrigu nian iradon.” Duano penis aplombe treni Sun al la puto. Tiam la sonoj de la ŝpinilo malaperis kaj la stranga ventblovo ĉesis samtempe.

Antaŭ ol malsupreniri en la puton, Duano varmigis sin per korpekzercoj. Ĉe malsupreniro Sun kaptis lian brakon kaj diris: “Mi iom timas, restanta sola ĉi tie.”

“Kio ajn okazos, ne turnu vian kapon por vidi. Ĉio alia estas nenio, se ni akiros ion,” dirante, Duan malrapide glitis per ŝnuro en la puton.

La puta aperturo pli kaj pli malproksimiĝis de li kaj la lumo ene pli kaj pli malheliĝis. Li ŝaltis la akvimuna lampo sur la spirilo.

Baldaŭ li sinkis en la akvon, malklaran kaj glacimalvarman. Grincante siajn dentojn, li daŭre naĝis pli profunden. Ĉirkaŭ pli ol tri metrojn sub la akvo la lumo de la akvimuna lampo reflektis la rebrilon de du metalaj objektoj en liajn okulojn. Je siaj ĝojo kaj surpriziĝo, li trovis du brilantajn metalajn kestetojn bonorde metitajn sur elstara ŝtonpeco el la puta vando. Fine li sukcesis! Apenaŭ li etendis siajn manojn por ambaŭmane kapti la du kestetojn, li trovis iom post iom klariĝantan blankan figuron sub sia flosanta korpo. Jen estis ŝi, kiun ili ĵus vidis ekster la puto. Nun ŝi, kun levita kapo, rigardis lin per paro da sorĉaj okuloj.

Kiam li, kun du kestetoj en la sino, volis naĝi supren, la virino abrupte kaptis lian piedon kaj forte sinkigis lin.

“Kio okazas al vi, Duano?” Aŭdiĝis suite la voĉo de Sun el la aperturo de la puto. La virino malstreĉis sian mantenadon kaj malaperis.

Timigite, Duano hasteme ligis la ŝnuron ĉirkaŭ sian talion kaj forte ektiris

la ŝnuron. Kun helpo de Sun li kunportis la du kestetojn al la puta aperturo.

La kestetoj estis el bronzo, delikate faritaj kaj oritaj, kun po verdigra seruro surflanke, kiuj ŝajnis aĝaj je multaj jaroj. Kun tiel fajne faritaj kovriroj la enhavo en la kestetoj certe estis bona. Antaŭ ol li sekviŝis la putakvon sur la korpo, Duano urĝigis Sun malfermi la kestetojn, sed vane, kvankam ili farais grandan penon. Ili timis, ke la enhavo en la kestetoj estas runiĝita, se ili perforte rompus ilin. Do ili decidis zorgeme malfermis ilin post ilia hejmeniro.

“Mi vere ne imagis, ke ni povos akiri ĉi tiujn aĵojn. Divenu, kio troviĝas en ili,” diris Sun kun radianta rideto.

“Certe valoraĵoj ene. Ne babilaĉu. Pririgardu, kio alia kaŝiĝas en la puto,” dirante, Duano etendis la detektilon en la puton, sed alvenis nenia reago. Pro tio ili eksentis malesperon. Tiam la ĉielo subite malheliĝis, heroldante tujan pluvon. Ili rapide metis la bronzaĵajn kestetojn en la sakon kaj pretigis sin foriri unue kaj reveni la sekvantan tagon. Ĉimomente Duano montris pezan mienon kaj plumbe faligis detektilon sur la teron.

“Kio okazas? Ĉu vi vidas fantomon?” Sun demandis kun larĝa rideto. Tiam Duano fiksrigardis al la malantaŭo de Sun kaj lia tuta vizaĝo ŝajne distordiĝis.

Vidinte lian tian mienon, Sun retenis sian rideton. Turninte sian kapon, li vidis malantaŭ si knabon kun skarlataj lipoj, terure pala vizaĝo kaj feltĉapo sur la verto, vestitan en indiga veŝto. Oni prenis lin por mortinta infano, se li ne palpebrumus.

“Ĉu vi estas homo aŭ fantomo, infano?” Sun demandis maltrankvile.

La knabo senparole aliris, subite kaptis la sakon kun la kestetoj kaj forkuris.

“He, kial vi rabis nian sakon? Demetu ĝin!” kun krio Sun postkuris kelkajn paŝojn.

La knabo subite haltigis siajn paŝojn kaj malrapide demetis la sakon sur la teron. Dum Sun kaj Duano stuporiĝis, li rapidpaŝe alkuris, saltis sur la korpon de Sun kaj, kun kolera rigardo, prenis lin ĉirkaŭ ties kolon. Kun ŝriko Sun falis rekte sur la teron senkonscia. Dume, irinte trankvile al la sako, li turnis la kapon, trudis malvarman rideton kontraŭ Duano ŝokita de surpriziĝo, kaj kuris malproksimen kun la sako en la mano.

Vidinte lin malaperi malproksimen, Duano eksentis moliĝon de siaj femuroj. Li tuj ekskuis Sun. Tiu tiris longan enspiron kaj baraktis al la sida pozo. Kun vaksblanka vizaĝo ili rigardis vidalvide, dirante nenion dum longa tempo.

“Mi persvadis vin ne veni ĉi tien, sed vi persistis. Ni rapide foriru. Ĉi tie vere troviĝas fantomoj.” Sun, kiu ĵus revenis al sia konscio, volis forkuri.

Kaj Duano ankaŭ kaptis la ekipaĵojn kaj pretigis sin forkuri. Sed sur la vojo aperis la virino, kiun ili vidis antaŭe, malvarme rigardante ilin. Ili ambaŭ eligis

laŭtan ekkrion kaj ŝi tuj malaperis. Ĝuste dum ili panikiĝis, aŭdiĝis el la puto laŭta plaŭdado, ŝajne kvazaŭ giganta monstro eligus anhelan voĉon de spirado.

La voĉo altiris ilin al la rando de la puto. Mallevinte la kapon, ili surprizite trovis, ke la grandaj vaporaj vezikoj alsvarmas de la puta fundo kaj tuj poste peĉnigra vazego alnaĝas al la akvosurfaco.

“Certe troviĝas aĵoj en la vazego. Tuj suprentiru ĝin per ŝnuro, Sun!” Duano urĝeme diris.

“Vi frezeziĝas, Duano! Tiel granda vazego, eĉ se ĝi entenus nur aeron, ne povus alflosi surakven. Mi konsideras, ke io malbona okazos. Ni plibone tuj foriru!” Sun diris konfuzite.

“Se troviĝus vere trezoroj ene? Ĉar ni venis ĉi tien malgraŭ riskoj, ni ne povas reiri kun malplenaj manoj!” diris Duano maltrankvile.

Finfine pro la persista petado de Duano, Sun kune kun li riskis elporti la vazegon, kiu pezis pli ol kvindek kilogramojn. Sun estis prava pti tio, kiel tiom peza vazego povus alflosi al la akvosurfaco. Sed Duano, kiu soifis je riĉiĝo, ignoris la klarigon de Sun, kaj post iom da hezito, malligis la ŝaffelon kovrantan la aperturon de la vazego.

Tiam aŭdiĝis hihi-rido de virino. Ili haste ĉirkaŭrigardis, sed vidis nenian figuron de virino. Kiam ili refoje direktis sian rigardon al la vazego, ili panikplene trovis, ke maso da implikitaj nigraj kapharoj superfluiĝas el ĝi kaj tuj poste virino blanke vestita malrapide elgrimpas el ĝi. Iloi ambaŭ volis forkuri, sed ili neniel povis movi siajn krurojn.

La virino malrapide elgrimpis, kun longaj nigraj haroj pendantaj ĝis la tero, el kiuj akveroj gutadis plaŭde. Kiam ŝi rampis proksimen al ili, ŝi tuj stariĝis kaj ŝiaj haroj estis disŝovitaj de ventblovo. Pro tio ŝia vizaĝo montriĝis delikata kaj malvarma. Jen ŝi estis la virino, kiun ili vidis antaŭe. Ili ektremetis tra la tuta korpo.

La virino kviete rigardis ilin. Subite ŝi larĝe malfermis sian buŝon kaj eligis rid-sonojn. Ŝia antaŭa delikata vizaĝo tuj ŝanĝiĝis minace. Sun ankoraŭfoje peze svenfalas sur la teron.

“Sun! Sun!” Duano urĝe kriis. Sed Sun donis nenian respondon.

La virino disetendis siajn brakojn kaj fulme sin ĵetis al Duano, kiu neniel povis elteni la hororan scenon kaj ankaŭ falis sur la teron.

Sed Duano ne svenis tute senkonscie kaj li povis malklare vidi la okazaĵon. La virino aliris al li, unu paŝon, du paŝojn... Lia koro forte batis. Subite malalta kaj malgrasa maljunulo aperis antaŭ Duano kaj baris al la virino la vojon.

“Lasu mian nepon! Mi venas kaj mi sekvu vin,” diris la maljunulo.

Estas mia avo, Duano surprize pensis. Li evidente paralizigiĝas sur la lito kaj

eĉ ne povas paroli. Kiel li povas aperi ĉi tie? Kiel li eĉ fariĝas normala hommo? Duano volis malfermi la buŝon, sed li ne povis.

La virino senforte rigardis la avon, kun ardanta rankoro en la okuloj.

“Lasu min diri kelkajn vortojn al mia nepo. Post tio mi sekvos vin,” dirante, la avo tremete iris al Duano, kiu volis barakti al stara pozo, sed vane.

“Tio estas mia kulpo! Mi devus forbruligi la taglibron pli frue. Vi vere ne devus veni ĉi tien!” Post tio la avo rakontis al li historieton, kiu ekstreme surprizis lin.

Antaŭ kelkdek jaroj troviĝis instruisto en la vilaĝo. Li edziĝis al riĉa vidvino pro ties mono, sed baldaŭ ŝi eksciis pri lia malbona motivo. La kolera vidvino metis siajn valoraĵojn en la kofron kaj volis ĝin en la riveron. Kaj samtempe ŝi pretis malkaŝi lian veran vizaĝon antaŭ la klanestro. Li eksentis timon, tiel ke li volis forfuĝi de la vilaĝo, sed li domaĝis tiujn riĉaĵojn.

Pripensante fojrefoje, li produktis komploton. Kelkaj kanajloj, kiujn li utiligis per mono, enstrudiĝis en la domon de la vidvino kaj rabis ĉiujn ŝiajn riĉaĵojn. Sed ili ne redonis okdek procentojn da riĉaĵoj al li laŭ la antaŭdefinita intersento, sed nur unu cent arĝentajn monerojn.

La instruisto ekrajdis siajn altajn ĉevalojn, sed li povis fari nenion. Pro timo, ke la komploto malkaŝiĝos, li hasteme forkuris. Post kelkaj tagoj li aŭdis informon, ke tiunokte, kiam tiuj kanajloj rabis ŝiajn riĉaĵojn, ili svenbatis ŝin, metis ŝin en vazegon kaj sinkigis ĝin en la puton, kio vekis ĉe li grandan panikon kaj rimorson.

La vidvino ne povis dispeli sian koleregon kaj ŝi alformiĝis kiel fantomo, kiu fortimigis ĉiujn vilaĝanojn. Tiunokte la instruisto drinkis por moderigi sian ĉagrenon kaj subite trovis ŝin jam sidanta antaŭ li kaj rigardante lin per mortulaj okuloj. Sentante konscienciproĉon kaj timegon, li falis sur genuojn antaŭ ŝi...

Tiunokte la vidvino ne mortigis lin, sed ŝi hakigis liajn ambaŭ manojn, sigelis ilin en po bronzan kesteton kaj metis ilin en la profundan puton, kio finfine mildigim ŝian koleregon.

Je la fino de la rakonto de sia avo Duano komprenis la tutan proceson de la okazintaĵo. Ĉi-momente la virino aliris kaj ekkaptis la brakon de la avo.

“Avĉjo!” Duano ekbris.

“Nun mi ne havas manojn kaj mi ne plu povas subpremi ŝian koleron. Mi devas, en tia granda aĝo, sevi ŝin por ripari mian krimon. Vi devas havigi al vi bonan okupon kaj perlabori monon per laŭleĝaj rimedoj. Ne cerbumu pri tiuj malhonestaj metodoj. Se paroli pri fantomoj, nur avideco alvokas ilin,” la avo triste diris.

Antaŭ ol li finis sian parolon, la virino forte ektiris lin kaj puŝis lin en la

puton. Aŭdiĝis laŭta plaŭdado. Kaj la virina fantomo ankaŭ saltis en ĝin.

“Avĉjo, avĉjo!” Duano pene kriadis, rampante al la puto.

Subite la avo aperis tramalsekigitaj ĉe la puta aperturo kaj mizerplene eksvingis la monon, signante, ke Duano tuj foriru. Antaŭ ol li ankoraŭ ne finis la geston, la palaj manoj de la virino premis la ŝultrojn de la avo kaj ankoraŭfoje fortiris lin. Baldaŭ kvieto revenis en la puto. Duano malrapide fermis la okulojn.

Post longa tempo Duano en komato estis vekita de Sun. Duano ekrememoris la scenon pri la avo kaj tuj sin ĵetis al la puto kaj plore kriadis: “Avĉjo, avĉjo!”

La puto ne donis ajnan eĥon.

“Vi freneziĝas, Duano! Kiel via avo povus sin trovi ĉi tie? Ni ne plu restu ĉi tie eĉ unu sekundon. Ni devas rapide foriri.” Sun, kiu ĵus dronis same en komato, kriis al Duano.

Jes, mia avo fakte paralizigiĝas en la lito. Ne eblas por li aperi ĉi tie. Halucino, tio, kion mi ĵus vidis certe estas halucino!

Li devis rapidi hejmen por vidi la avon.

Ili ambaŭ helpe subtenis unu al la alia kaj hasteme forlasis la vilaĝon kaj la puton.

Post reveno al la urbo ili, tute elĉerpitaj, disiĝis kaj reiris al sia propra hejmo.

Kiam Duano revenis al la etaĝdomo, li trovis, ke kolektiĝas ĉe la pordo liaj najbaroj, kiuj vesuspire pririgardis mason da jam sekiĝinta sangspuro.

Kio okazis? Radio da anksio fulmis tra lia koro.

“Jen finfine vi revenas, Duano,” najbaro urĝeme diris al li, vidinte lin reveni.

“Kio okazis?” Duano demandis.

“Via avĉjo...” la najbaro balbutis.

“Kio okazis al li?” haste demandis Duano.

“Antaŭ pli ol du horoj via avĉjo stumble falis de la ŝtuparo,” la najbaro diris kun larmoj en la okuloj.

Antaŭ pli ol du horoj! Tiam mia avo estis min alparolanta. Ŝajnas, ke tio, kion li vidis en la sovaĝa vilaĝo, ne estis halucino, sed realaĵo. Estas certe, ke la avo antaŭvidis la katastrofon, kiun li suferos, kaj siavice li elektis memmortigon por savi min per sia animo! Duano subite venis al la klara kompreno.

“Kie troviĝas mia avĉjo?” freneze kriis Duano.

“Ambulanco alvenis kaj kuracisto konstatis, ke via avĉjo jam mortis. Policano kune kun ili forportis la kadavron per ambulanco.”

Kiam Duano surgenu faris pripentadon, Sun rapideme iris al la butikoj por vendi florkronojn. Tie pleniĝis florkronoj kaj diverspecaj porfunebraj objektoj, inter kiuj plej okulfrapaj estis tiuj geknaboj faritaj el papero, kies kostumo tute

samis kiel ili ambaŭ vidis en la sovaĝa vilaĝo. Kun rideto li rigardis tiujn paperajn geknabojn sen montri iom da timemo.

“Kial vi revenis tiel malfrue?” demandis la grasa butikestro, ferminte la pordon.

“Ne parolu pri tio. Ĉifoje ni vere renkontis fantomojn. Mi dronis en sveno dum longa tempo,” diris Sun maltrankvile.

“Ĉu vi estis timigita de mia filo?” diris larĝridete la butikestro.

“Via filo vere estas elstara ludanto. Lia eksteraĵo estis verŝajna kiel tiu de fantomo. Li vere timigis Duanon. Sed poste vere venis virina fantomo,” rakontis Sun.

“Ĉu eblas?” la butikestro demandis, sufokinte sian rideton.

“Ne parolu pri tio plu. Ĉio jam forpasis. Kie estas tiuj du kestetoj?” Sun demandis.

Tuj poste la butikestro elportis la du branzajn kestetojn el la interna ĉambro kaj metis ilin sur la tablon.

“Duano neniel imagas, ke la trezorojn mi tenas. Ĉifoje mi riĉiĝos. Mi vere meritas tion, kvankam mi estis timigita de fantomoj,” dirante, Sun karesis la kestetojn.

“Antaŭ vi promesis doni al mi du mil juanojn. Tio ne sufiĉas. Mi postulas dek mil juanojn, alie mi ne povas regi mian buŝon,” diris la butikestro kun malvarma rideto. Antaŭ ol li ĉesis ridi, Sun jam enŝovis longan ŝtalan pnglon en lian kolon...

Post pli ol unu horo Sun malfermis la kestetojn en sia butiketo de antikvaĵoj. Dum la momento, kiam la kesteto malfermiĝis, lia vizaĝkoloro tuj ŝanĝiĝis. Krom paro da pure blankaj manostoj, nenio troviĝis en la kestetoj.

“Kio okazas?” ekkriis Sun panike kaj pentoplene. Ĝuste tiam la peze ŝlosita pordo de lia butiketo knare malfermiĝis.

Frumatene de la sekvanta tago Duano vidis la mortintan Sun sur la televida ekrano. Sur lia korpo troviĝis neniu vundo. Nur liaj okuloj estis malferme rondigitaj. Policianoj jam prenis la registrojn el la videa monitoro instalita en la butiketo de Sun, kaj ili nur kaptis malklara blanka ombro, ŝajne de virino aŭ de blanka fumo...

Tiam Duano ekmemoris, kion lia avo diris: “Se paroli pri fantomoj, nur avideco alvokas ilin.”

Kaj samtempe li ekpensis tri aferoj: unue li devas iri al la tombo de la avo kaj babilu libere kun li, due li forbruligos la taglibron de la avo kaj trie li havigos al si bonan okupon kaj vivos normalan vivon kiel aliaj homoj.

Chiung Yao



En Profunda Korto

Elĉinigis Vejdo

Chiung Yao (ĉjong jaŭ), ĉina moderna fekunda verkistino de romanoj. Ŝi nun vivas en Tajvano. «En profunda korto» estas unu el ŝiaj elstaraj romanoj. BE aperigas la tutan romanon popece en venontaj numeroj.

Parto Unu Spirito sur Ruino

1.

Fang Siying suriris la ponton.

Starante ĉe la balustrado de la ponto, ŝi silente observis la fluakvon sub la ponto. Sube, la fluejo ne tiom larĝis, sed la bordo plene pavimita per rulŝtonetoj kaj ŝtonpecoj okupis grandan areon. El lirlanta fluo multaj rokoj alte elstaris kun fiera pozo. La fluakvo torentis malsupren de ĉiuj interspacoj inter rokoj, levante sennombrajn vezikojn kaj kirlojn. La maja suno disŝutis siajn radiojn sur la riversurfaco kun miloj kaj miloj da rebriloj. La sonoj de kuranta riverfluo ŝajnis melodio delikata kaj softa. Ŝi staris tie kelkan tempon. La riverfluo, la ŝaŭmoj, la rokoj kaj kirloj jetis ŝin en ekstazo, emocio kaj ravo. Palpante la pontan balustradon, ŝi profunde enspiris la aeron kun la miksita odoro de pinoj, bambuoj kaj grundo. Poste, ŝi malrapide iris direkte al la alia ekstremo de la ponto, kie jam malproksimis de la urba centro. Tie larĝa kota vojo rekte etendiĝis antaŭen, ĉe kies maldekstra flanko troviĝis deklivo kun pinoj kaj bambuoj prospere kreskantaj, kaj ĉe la dekstra vasta kamparo kun dise lokitaj farmdomoj.

Transirinte la pontoon, ŝi returnis sian kapon kaj vidis la surskribon sur la punta fosto: “Ponto de Pinoj kaj Bambuoj, rekonstruita en 1955”.

Ŝi iom kuntiris siajn brovojn. La nomo “Ponto de Pinoj kaj Bambuoj” ne estas malbona, sed kial oni ne konstruis ĝin per ligno? Kiel malplezuriga ponto

konstruita per cemento! Tamen, ĝi estas praktike utila. Ŝi povis observi la radspurojn de frekventadaj aŭtomobiloj sur la kota vojo. Ĉi tie estas la antaŭurbo de Tajbei. Multaj riĉuloj, kiuj malŝatas la bruegon de Tajbei, preferas loĝi en proksima ĉirkaŭurbo. Kaj plie, ĉi tie estas famkonata pejzaĝejo! Ŝi kredis, ke plu antaŭe troviĝas multaj superaj riĉe ornamitaj loĝlokoj kun pavilonoj.

Transpasinte la ponton, ŝi vidis vojmontrilon kelkajn paŝojn antaŭe, kiu legiĝis “Templo de Pinoj kaj Bambuoj”. La sago sur tabulo montris al surdekliva pado, ĉe kies ambaŭ flankoj staris rektaj pinoj. Templo de Pinoj kaj Bambuoj! Ĝi estis relative konata templo, al kiu multaj kredantoj kaj turistoj frekventis. Ĉu ŝi? Ĉu ŝi ankaŭ pilgrimos al ĝi? Ĉe la enirejo de la pado ŝi haltis momenton. Kaj poste, ŝi, ekskuinte sian kapon, deiris de la pado kaj plu antaŭeniris laŭ la larĝa kota vojo.

La sunlumo post tagmezo varme brilis. Majaj tagoj jam ne estis friskaj plu. Ŝi aŭtomate kiel eble plej malrapidigis siajn paŝojn, ĉar perlis ŝvito sur ŝia frunto. Ŝi haltis kaj forviŝis ŝviton de sur la frunto per mantuko. Fronte, sidis pluraj blankaj domoj, tute novaj, evidente nove konstruitaj, tre rafinite kaj bele. Ŝi pririgardis la domojn, kaj post tio, iom kuntirinte siajn brovojn, ŝi parolis al si, “Kion vi volas fari? Kien vi volas iri?”

Ŝi ne donis respondon al si mem. Tamen, ŝi mekanike antaŭeniris, malrapide kaj peze. Preterpansinte vilaojn kun ĝardenoj, ŝi trovis la kamparon ĉe ambaŭ vojflankoj fariĝi terasoj kun tearbedoj. Jen la ĝardeno de tearbedoj! Ŝi konfuzite rigardis la tearbedojn unu post alia. Jam proksimiĝas la tempo por pluki tefoliojn, ŝi nebule pensis. Post kovrado de granda peco da vojo, li haltis subite. Ŝian rigardon allogis granda konstruaĵo ĉe vojrande. Konstruaĵo? Ne, tio nur ESTIS konstruaĵo — sed nun ruino postlasita de incendio. Ŝi gapis la difektitan konstruaĵon. Juĝata el la brikoj, tegoloj, la aĵura ferpordo de la ĝardeno postlasitaj, ĝi estis luksa loĝdomego. Makadamita pado branĉita de la vojo kondukis al la aĵura ferpordo, malantaŭ kiu staris alta saliko. La pordo estis duone malfermita. Herbaĉoj prospere kreskis piede de ĉirkaŭmuro. Sur la aĵura ferpordo jam kovriĝis sennomaj rampaĵoj kun longe pendantaj ĉiroj kaj verdaj folioj. Ĉe rando de la makadamita pado ankoraŭ staris ligna tabulo preskaŭ dronita en abundo de herbaĉoj. Aŭtomate alirinte ĝin, ŝi flankenŝovis herbaĉojn kaj vidis la skribaĵon gravuritan sur ĝi.

Ĉu la delikata surskribo “Hanyan Bieno” kortuŝis ŝin? Ĉu la homa naturo de scivolemo regis ŝin? Ŝi ne povis fari klarigon al sia tiutempa humoro. Kiam ŝi ekrigardis tiujn vortojn, el ŝia korfundo levigis kurioza sentimento. “Hanyan Bieno”, “Hanyan Bieno”! Kiaj homoj loĝis tie? Kia historieto okazis? Kiu

povas rakonti al ŝi? Incendio? Kiel ĝi okazis?

Ŝi aliris la aĵuran ferpardon. Rigardante internen tra la malfermita pordo, ŝi vidis la ĝardenon senbride invaditan de herbaĉoj, inter kiuj aperis unu aŭ du ruĝaj rozuoj en disflorado. Kelkaj altaj banyanarboj, de sur kiuj pendis spirradikoj pro multjara manko de pritondado, aspektis kvazaŭ kelkaj kadukaj maljunuloj kun longaj barboj. La densa ombro de verdaj folioj donis profundecon de la korto. Malantaŭ la banjanarboj situis la forbruligita konstruaĵo kun falintaj muroj, enkaviĝinta tegmento kaj fenestroj preskaŭ ĉiuj kun rompitaĵoj. Tamen el tio oni ankoraŭ povis bildigi al si la antaŭan bele konstruitan duetaĝan domon, ŝajne kun multaj ĉambroj, kun zigzaga koridoro, kun delicate malgranda balkono, kun ĉizita balustrado kaj kun vitralaj fenestroj. Imageble ĉi tie certe regis prospera spektaklo de vivo: en ĝardeno plenplenis kuriozaj floroj... kiaj homj loĝis en tiuj ĉambroj? Kun granda atentemo ŝi pririgardis la nudan framon de la domo, nigre fumajitan eksteran muron, la karbiĝintajn fenestrojn kaj pordon, trabojn defalintajn sur la tero... Herbaĉoj laŭvole kreskadis, rampantoj kun dornoj etendiĝis, tra fenestroj, de interne eksteren, kaj de ekstere internen... Ho ve! Tiu ĉi domo! Tiu ĉi amaso da ruino! Neniu jam troviĝas ĉi tie! Ŝi eligis profundan suspiron. Ĉiuspeca ruino donas impreson de tristo kaj senton de soleco kaj forlasiteco. Ŝi enpaŝis la ĝardenon (se ĝi povas esti kalkulata kiel vera ĝardeno), kaj aliris apud du ruĝajn rozuojn. Nuntempe estis majo, la sezono por pompa disflorado de rozuoj. Tiuj ĉi du rozuoj ankaŭ disfloris en prospero. Interplekĝinte inter herbaĉoj kaj vepro, ili aspektis iom kompatinde. Klinante sian korpon, ŝi deŝiris du rozojn kaj tenis ilin en la mano. Fikse rigardante freŝajn kaj delikatajn petalojn, ŝi eligis suspiron. Tenante la florojn kun densa parfumo, ŝi aliria al la ruino.

Ŝi sentis grandan lacecon, ĉar ŝi jam paŝadis preskaŭ la tuan posttagemzon. Je la dua horo ŝi eliris de la loĝejo, sed nun la suno jam koemncis subiri. Surrinte kelke da ŝtonaj ŝtupoj, ŝi sidiĝis sur la falintan murpecon, kun rozoj en la mano. Apoginte sian mentonon per la mano, ŝi ĉirkaŭrigardis kaj firme kaptiĝis de la dezerta ĉirkaŭaĵo.

Ŝi ne sciis, kiel longe ŝi sidis tie tiamaniere. La vesperkrepusko jam alnaĝis nerimarkite. La sburiranta suno borderis la ruĝon per softa orkoloro kaj vespera brizo ŝin atakis per iom da malvarmo. Ĉirkaŭprenante siajn nudajn brakojn per la manoj, ŝi rigardis la ombron ĵetitan de la alta nefalinta muro pli kaj pli larĝiĝanta, longvostan lacerton preterkuranta inter rampantoj, la rozojn en herbaĉoj tremantaj en vespera blovo, kaj... Fulmis tra ŝia menso la priskribo: la prospero de ĉiuj floroj formortas kun la ruino...

Sekve de tio, sennoma varmo leviĝis en ŝiajn okulkavojn kaj ŝia vidkampo

nebuliĝis. Ŝi droniĝis en revo pri la antaŭaj ĝojo, gajaj babiloj... kaj amo. Ŝi eĉ kredis la verecon de la amhistorieto de ŝi imagita, la ama rakonto inter geviroj en forgesiteco, kompreneble interpleksiĝanta kun doloro, barakto, larmoj, miskompreno kaj eksplodo... Larmoj rulfalis de ŝiaj vangoj. Ferminte siajn okuojn, ŝi nevole elbuŝigis alian longan vespiron.

Subite, ŝi surpriziĝis pro brueto. Malfermite siajn okulojn, ŝi direktis siajn okulojn al la fonto de brueto. Ŝi ege surpriziĝis. Tie, en la ombro de rompitaĵ muroj, tegoloj kaj brikoj, viro malrapide stariĝis... Ŝi estis tiel surprizigita, ke ŝi preskaŭ ekŝriakis, ĉar ŝi ne trovis, krom ŝi mem, alian homon, kiu evidente atinginte tien antaŭ ŝi, sensone kaŭriĝis ĉe la murangulo, kiel fantomo. Kovrante sian buŝon per la mano kaj retenante sian krimon, ŝi rigardis la viron kun larĝe malfermitaj okuloj. Li eliris el la ombro kun promenbastono en unu mano kaj alia mano apoganta la muron, alfronte al ŝi. Ŝia koro violente batadis, ĉar ŝi sciis, ke, banante en la lumo de subiranta suno, ŝi klare vidiĝis de li, jam delonge, kiu sin kaŝis tie dumtempe. Sed tuj ŝi trovis, ke ŝi eraris. Tiu viro malrapide moviĝis antaŭen, frapetante la teron per la promenbastono kaj palpante la ĉirkaŭajn murojn. Kun malfermitaj okuloj, li vidis nenion... li estis blinda!

Ŝi eligis longan spiron kaj malrapide demetis la manon kovrintan la buŝon, sed tuj ŝi kaptiĝis de alia kompatema sento. Ŝi fikse rigardis lin, liajn malfacilajn, malglatajn kaj stumblajn movojn inter ruino. Li ne estis tiel juna, iome pli-ol-kvardek-jara. Vivo klare ĉizis siajn spurojn sur lia vizaĝo, kiu eksponiĝis senerare en la rebrilo de la subiranta suno. Sur lia mieno legiĝis melankolio, sorto-atakiteco, vicleco kaj sentimento. Sen paro da senbrilaj okuloj, li estis preskaŭ bel-aspekta. Li havis dense nigrajn brovojn, kaj rektan kaj distingan nazon. Lia firme fermata buŝo impresis per obstineco kaj malbonhumoro. Lia vestaĵo tute ne estis ĉifonaĵoj, sed male, li estis vestita dece kaj bonorde. Lia eŭropa kostumo kaj kravato bone sidis, kaj lia promenbastono nigre lakita kun ora kapo estis cirita brile. Ĉio ĉi tio indikis, ke li ne estis vagabondo, sed ĝentelmano en la mondumo. Tamen kial li kaŝe kaŭriĝis inter la ruino?

Li palpe antaŭeniris, paŝante inter rompitaĵ tegoloj, brikoj kaj veproĵ kovrantaj la teron. Kelkfoje li stumblis kaj li baraktis stariĝi stabile. La subiranta suno projekciis inter herbaĉojn lian ombron, longan kaj solean. Lia palpado kaj baraktado ŝajnis tragediata, senhelpa kaj preskaŭ malespera. Larmoj denove malsekiĝis ŝiajn okulojn. Kia tragedio! Ĉu troviĝas io pli trista ol invalideco? Vidante, ke li sin direktis renkonte al amaso da rompita muro, ŝi nereteneble eksaltis. Senpripense, ŝi sin ĵetis antaŭen kaj stabiligis lin tuj antaŭ ol li stumbe falis. Anhelante, ŝi kriis, "Ho, sin gardu!"

La viro ekhavis subitan surprizon kaj, haltinte, stuporiĝis. Poste, li, vane direktante sian senbrilajn okulojn al ŝi, singardeme kaj forte demandis, “Kiu? Kiu?”

Por momento, ŝi ne donis respondon. Ŝi nur stupore rigardis la vizaĝon antaŭ si. Tio estis la unua fojo dum ŝia 30-jara vivado legi la profundan mizeron kaj senpaciencon sopiremon sur la vizaĝo de viro. Pro manko de respondo, li refoje laŭtvoĉe demandis, “Kiu? Kiu ĵus?”

Reveninte al si mem, ŝi faris enspiron kaj respondis per stabila voĉo, “Estas mi, sinjoro.”

“Vi!” li malbonhumore diris, “sed kiu vi estas?”

“Mia familia nomo estas Fang, kaj mia nomo estas Siying,” ŝi sin prezentis kontraŭvole, sentante absurdecon en la koro. Memprezentado! Kial ŝi devas prezenti sin mem? “Vi ne konas min,” ŝi diris flegme, “kiel preterpasanto, mi, pro scivolemo, eniris por pririgardi la ruinon postlasitan de fajrego.”

“Ho,” li atenteme aŭskultis al ŝi. “Do, ĉu la vespirado, kiun mi ĵus aŭdis, devus esti iluzio? Ĉu la vivanta homo, kiu troviĝas ĉi tie, ne devus esti rigardata kiel fantomo?” li malĝoje diris, kvazaŭ al si mem.

“Fantomo?” Iom kuntirinte siajn brovojn, ŝi enpense rigardis al li. “Ĉu vi atendas fantomon?” ŝi senpripense eligis tiujn vortojn, ĉar ŝi vidis malesperan esprimon sur lia vizaĝo.

“Kio?” En lia voĉo sin trudis iom da kolereco. “Kion vi diris?”

“Ho, nenion,” ŝi respondis, esplorante la vizaĝon antaŭ si. Kiel kolereca homo li estas! “Mi nur miras, kial vi sidis meze de ruino.”

“Do, kaj vi? Kial vi venas al ĉi tiu ruino?”

“Mi jam diris al vi. Pro scivolemo,” ŝi diris, “mi estus vizitinta la Templon de Pinoj kaj Bambuoj.”

“Sola?”

“Jes, mi ne havas amikojn en Tajvano. Mi estas elmigrinto. Mi venas al Tajvano por ferii. Mi jam loĝas en Usono dek kelkajn jarojn.”

“Ho.” Ŝajne li tute ne interesiĝis pri ŝia informoj, sed li zorgeme aŭskultis al ŝi, kun atentemo de blindulo. “Sed vi bone parolas la ĉinan lingvon.”

“Ĉu jes?” Fulmis apenaŭ videbla rideto sur la angulo de ŝia buŝo. Ŝi sciis, ke ŝi parolas la ĉinan lingvon nebone, ĉar ŝi loĝis kvin aŭ ses jarojn en la medio sen ĉinoj, kaj ŝi eĉ ne parolis unu vorton de la ĉina lingvo, tiel ke ŝia prononcado de la ĉina lingvo estas miksitita kun fremda akĉento.

“Jes, bone,” li diris ravite kun suspiro. “Ĉu vi portas rozon kun vi? Mi jam flaris la bonodoron de la floro.”

“Mi havas du rozojn. Mi plukis ili en la ĝardeno.”

“La ĝardeno...” li ekhezitis. “Ĉu troviĝas floroj tie?”

“Jes, troviĝas du rozujoj inter herbaĉoj.”

“Herbaĉoj...” Inter liaj brovoj tuj aperis multe da rektaj sulketoj. “Ĉu ĉie troviĝas herbaĉoj ĉi tie?”

“Jes, herbaĉoj kaj ruino.”

“Herbacoj kaj ruino!” li mallaŭte diris per pala kaj vaka voĉo. “Ĉi tie prosperis floroj kaj arboj.”

“Mi povas imagi tion.” Ŝi iom kortuŝiĝis, ŝokite de la mieno de la viro. “Vi certe bone konas ĉi tiun lokon.”

“Koni? Pli ol koni. La loko estas mia. Mia domo, mia ĝardeno, kaj mia hejmo.”

“Ho,” ŝi gapis al li. “Do, vi jam perdis multon?”

“Unu mondon,” li diris mallaŭte, apenaŭ aŭdeble nur al li.

“Kiel la fajrego okazis?” Ŝi ne povis kaŝi sian scivolemon. Antaŭ ol li respondis, ŝi hasteme demandis, “Ĉu iu ajn mortis en la fajrego?”

“Ne, neniu.”

“Bone, do.” Ŝi eligis spiron. “La ĝardeno kaj domo povos esti rekonstruitaj.”

“Rekonstruitaj!” Li hmis tra la nazo. “Neniu povos rekonstrui Hanyanbienon, neniu plu, nur se...” li haltis pro ploremo. Sin turnante sian kapon al la ĉielo, li subite elvekiĝeme demandis, “Tempo malfruas, ĉu?”

“Jes, la suno jam subiris.”

“Do, mi devas foriri,” li hasteme diris, explore tuŝante per sia promenbastono la tersurfacon kovratan de herbaĉoj kaj rompitaĵoj ŝtonpecoj.

Lia senrimedeco vekis kompaton ĉe ŝi kaj ŝi aŭtomate lin apogis. “Kie vi loĝas?” ŝi demandis.

“Proksime, nur kelkajn paŝojn.”

“Do mi akompanu vin ĝis via hejmo, ĉar mi ne havas aliajn aferojn por fari.”

“Ne!” li tuj diris, preskaŭ ofendite. “Mi povas iri per mi mem. Mi konas ĉi tiun lokon kiel miajn fingrojn! Cetere, mi ankoraŭ ne pretas hejmenreveni! Mi devas iri por preni mian filinon.”

“Filino!” Post paŭzeto, ŝi fikse rigardis la viron antaŭ sia vizaĝo. “Ĉu vi havas filinon? Kiomaĝa? Kie ŝi troviĝas? Ĉu vi renkontos ŝin tie?”

Liaj brovoj tuj kuntiriĝis. “Ĉu tio koncernas vin?” li diris senĉirkaŭfrazo, “Vi ja emas ŝovi vian nazon en alies vazon!”

Ŝia vizaĝo tuj ruĝiĝis. Ŝi ĵetis sian rigardon al la horizonto. La suno jam subiris, lasante la lastan hele skarlatan nubaron sur la malproksima montpinton. “Mi nur faris laŭvolan demandon,” ŝi softe diris. “Mi jam diris, ke mi ne havas amikojn ĉi tie. Do, mi...” ŝi englutis tion, kion ŝi volis diri.

Evidente la viro jam ekkomprenis el tio ŝian solecon, ĉar li malstreĉis la kuntirigĝon de siaj brovoj, kaj ĉe lia buŝangulo alnaĝis pli-malpli milda esprimo, kiu moderigis la rigidecon de muskoloj sur lia vizaĝo kaj aspektigis lin afabla kaj amema. “Pardonon,” li hasteme diris, “Lastatempe mi ĉiam havas malbonan humoron.” Por ripari la maldececon, kiu li ĵus prezentis, li memvole respondis al ŝiaj demandoj. “Mia filino estas dekses-jara kaj ŝi lernas en ĉi tiea publika elementlernejo. Ordinare ŝi revenis hejmen per si mem. Hodiaŭ, ĉar mi jam estas ekstere, mi prefere renkontos ŝin.”

“Mi akompanu vin, ĉu bone?” ŝi varme diris, “Mi ne havas aliajn aferojn, ne iome.”

“Se tio plaĉus al vi,” li diris kun flegma kaj nevarma tono. Ŝi ĵetis ekrigardon al li. Ŝi sciis, ke li opinias, ke li certe renkontas la plej enuigan kaj interveneman nenionfaranton, sed ŝi ignoris tion, kion li pripensis.

Rigardante lin, ŝi avertis, “Atenton! Antaŭ vi troviĝas amaso da ŝtonoj. Pli bone estas iri ĉiflanke!” Ŝi donis apogon al li. “Mi apogas vin por iri, ĉu?”

“Ne necese!” li diris laŭtvoĉe.

Ŝi retenis siajn vortojn. Ili ĉirkaŭiris la ruinon. Kiam ili eniris la ĝardenon, kie mankis stumbligaj lignaĵoj kaj ŝtonpecoj, liaj paŝoj plirapidigis. Ŝi trovis, ke li vere bone konas ĉi tiun lokon. Tiam ŝi ankaŭ trovis tion, kion ŝi ĵus neglektis: tra la ĝardeno kuŝis cementa vojo ne invadita de herboj, kio indikis, ke homoj ofte frekventis laŭ ĝi. Do, vere ofte li venas al la ruino? Kion ĉi tiu blinda viro faras en la ruino? Ĉu li meditas pri la pasinteco ĉi tie? Ĉu li serĉas la pasintajn rememorojn? Ŝi nereteneble okule esploris, sekrete kaj zorgeme, la vizaĝon de la viro apud si. Nun, li atenteme iris sian vojon, kvazaŭ li tute forgesus ŝian ekzistadon. Sur lia vizaĝo regis ĉagreno, flegmo, seriozeco kaj nesondebleco. Laŭ la vojo, irinte nelonge, ŝi vidis tre luksan vilaon ĉe la vojrandoj: du ruĝaj grandaj pordklapoj, alta ĉirkaŭmuro, nete pritonditaj banjanarboj pavilonformaj videblaj super la ĉirkaŭmuro. En la muro troviĝis duetaĝa domo tegita per bonkvalitaj koloraj kaheloj, kun belaj murlampoj kaj originalaj rondframaj fenestroj. Sur la ruĝa pordo en la ĉirkaŭmuro pendis tabulo kun oraj vortoj sur nigra fono: Loĝejo de Familio Bai. Ŝi ĵetis alian ekrigardon al li.

“Ĉu la domego ĉe la vojrandoj estas via hejmo, sinjoro Bai?” ŝi demandis.

Li ekmiris. “Kiel vi scias, ke mia familia nomo estas Bai?” li tuj demandis.

“Estas simple. Vi diris, ke via hejmo estas proksima, kaj tiu ĉi domego estas unusola eleganta konstruaĵo en ĉirkaŭaĵo. Laŭ via vestaĵo, vi devas esti la mastro de ĉi tiu domego. Kaj plie, sur la pordo pendas la tabulo de ‘Loĝejo de Familio Bai’.”

“Ba,” li malstreĉis la muskolojn sur la vizaĝo. “Vi havas riĉan povon de

asociado. Kio vi estas? Verkisto?"

"Mi ne havas tian talenton, sed interesiĝas pri verkado," ŝi diris, fikse rigardante al li. "Mi studis edukadon en Usono kaj mi instruis en elementa lernejo kvin jarojn."

"Vi povas konverti vian karieron al verkado. Ŝajne vi priserĉas rakontojn! Vi faras viziton al ruino, trovas blindulon, el kiu vi deziras elpremi epizodojn por via verko simila al Jane Eyre, Wuthring Heights aŭ Rebecca," li malvarme diris kun iom da sarkasmo.

"Hm!" ŝi nevole elbuŝigis. "Vi eraras, sinjoro Bai. Mi ne interesiĝas pri via rakonto."

"Ĉu ne?" Ŝi diris nenion plu. Silenteme ili kovris grandan pecon da vojo. Poste, ŝi vidis la elementan lernejon, el kies pordo elsvarmis geknaboj duope aŭ triope. La lernejo, kun la nomtabulo "Zhengxin Publika Elementa Lernejo" ĉe la pordo, situis sur la altaĵo de la urbeto. Estis klare, ke ili venis malfrue, ĉar la lerneja kurso jam finiĝis. Multaj infanoj forkuris en la direkto al la interno de la urbeto, kaj unu aŭ du el ili venis renkonte al ili. Ili haltis. Fang ĵetis zorgeman rigardon al tiuj infanoj, kiuj, surhavante blankajn ĉemizojn kaj malhelbluajn kalsonetojn aŭ jupojn, ĉasis unu la alian, petole kaj inciteme ludante, kiel ĉirpantaj birdoj... Kiel vivecaj kaj ĝojaj ili estis!

"Ili jam hejmenrevenis post la lerneja kurso," diris la blindulo.

"Jes." Ŝia spirado iome rapidemis, ĉar ŝi soifis vidi, kia estas la filino de la viro. "Eble via filino jam revenis hejmen."

"Eble," diris la viro sen atentemo.

"Ĉu ŝi estas altstarura? Aŭ malalta? Beleta?" Ŝi varme kaj dezireme okule priserĉis la infanojn. "Kiel ŝi aspektas?"

"Ankaŭ mi esperas, ke oni priskribas ŝian aspekton al mi!" li murmuris. "Aĥ!" Ŝi mirplene rigardis al li. "Eĉ vi mem ne scias... aĥ!" Kompatema kaj trista sento levigis al ŝia brusto. Jes, li estas blinda! Li ne scias, kiel lia filino aspektas! Sed... ĉu li estas blinda dum multaj jaroj? "Mi devas hejmeniri. Ŝi certe jam troviĝas en la hejmo." Li turnis sian korpon.

"Ho, momenton!" ŝi kriis, ĉar ŝi tuj rimarkis knabinecon ĉe la lerneja pordo, kiu eliris sola, kun malalta staturado, pala kaj malforta, kun longaj harplektaĵoj, kaj kun vizaĝesprimado de frumatureco. Kun saltanta koro, ŝi certigis al si sian juĝon: tio estas lia infano! Certe! La infano aspektas simile al sia patro, tiel versimile kiel ŝi neniam vidis antaŭe. Densaj brovoj, grandaj okuloj, rekta nazeĝo kaj eĉ la melankolia vizaĝesprimado estas kopio de ŝia patro. "Mi jam vidis vian infanon!" ŝi diris anhelante. "Ŝi vere estas beleta infano!"

"Kiel vi certas..." La mira krio interrompis la finitan parolon de la patro.

La knabineto jam vidis ilin. Kun ekkrio, ŝi elane sin ĵetis renkonte kaj salutis anhele, “Paĉjo, paĉjo!” Ŝi sturmis ĉe lin kaj firme ekkaptis lin je la manoj tenantaj la irbastonon. Ŝi havis paron da grandaj kaj brilaj okuloj. Kun raviteco kaj drolateco, ŝi kapleve rigardis al sia patro. Ŝia pala vizaĝo nun ruĝiĝis pro ĝojo kaj ekscitiĝo. Ŝi spiradis mallonge kaj rapideme. “Paĉjo! Ĉu vi venas por renkonti min? Ĉu jes? Paĉjo!” Kriante, ŝi ĉirkaŭiris ĉe la genuoj de sia patro. Kiel maldika kaj malgranda ŝi estas! Dekjara? Ŝi ŝajnas ne atingi ses jarojn, kiel eta herbo, kiu ekrompiĝus je ventblovo. Ŝia pala haŭto aspektas preskaŭ diafane. Kiel fragilan vivon ŝi havas!

“Mi promenadas, kaj preterpase, mi venas por scii, ĉu vi jam finis la kurson,” monotone diris la patro, ne influite de la ĝojego de sia filino. Tiu monotoneco de lia voĉo preskaŭ iritis Fang Siying-on. Ĉu vi eĉ ne sentas kiom via filino vin amas? Stultulo! Ĉu vi eĉ ne scias, kiel la eta animo soifas je amo? Stultulo! Ĉu vi iam bone zorgis pri ŝi? Kiel kruela patro! Se vi ne povas vidi, vi minimume povas senti tion! “Oh, paĉjo!” La infano ne senesperigis pro la monotona parolo de la patro. En la pupiloj, per kiuj ŝi supren rigardis al sia patro, brilis simplaj kredo kaj adoro, kaj krome iom da respekto kaj timo. Apoginte sian vangon sekrete sur la mandorson de la patro, ŝi ekscitite demandis, “Ĉu vi venas sola? Ĉu Yazhu kaj Maljuna You ne akompanas vin?”

“Tiu onklino akompanis min ĝis ĉi tien. Donu dankon al ŝi!” La blindulo precize montris la pozicion, kie Fang staris. La knabino turnis sian vizaĝon al ŝi. Dum momento, Fang sentis la impulson tiri ŝin en sian sinon. Kiel ĉarma etulino! Kiel dorlotinda etulino! Ŝi eĉ volontus oferi ĉion en la mondo por akiri la rideton de la etulino.

“Aĥ, onjo, dankon al vi!” La infano iom klinis sian talion al ŝi, sed ŝi ne volontis forlasi sian patron, kun sia maneto firme tenanta la patron je la mano. Post kiam ŝi malzorgeme ĵetis tiun frazon, ŝi turnis al sia patro la vizaĝon brile brulita de ĝojo. Ŝi ĝojplene diris, “Mi helpe irigu vin hejmen, paĉjo! Singardu! Ĉe via piedo troviĝas fosajo!”

“Bone, konduku min, Tingting.” La patro lasis sian filino subteni lian manon. Tamen, evidente, li ne vere bezonis helpon, sed li faris tion nur por console plezurigi ŝin. “Ni hejmeniru! Jam estas malfrue.”

“Ĝis revido, onjo!” La infano ne forgesis diri adiaŭ al ŝi. Post tio, subtenante la manon de la patro, ŝi iris en la direkto al la larĝa kota vojo.

Fang Siying okule akompanis la dorsojn de la patro kaj filino. La vespera krepusko jam vualigis nebule. La du dorsfiguroj kvazaŭ iris en maldika nebulo, flosantaj kaj iluziaj. En tiu momento, sennoma acideco leviĝis ĝis la gorĝo de Fang Siying, kiu ekhavis fortan senton de forlasiteco. Ŝi vidis iliajn figurojn

malgrandiĝi, malproksimiĝi, perdiĝi en krepusko... Ŝi stupore kaj senmove staris, kun malsekiĝintaj okulkaŭtoj. (*daŭrigota*)



Eto

Malsaĝa Avo formovis montojn

ĉina antikva fablo

I.

Malsaĝa Avo loĝis izole montpiede,
la voj' zigzagis inter alt-montoj tre apikaj.
Familianoj ĉiam eksentis sin panikaj,
se ili volis iri eksteren senrimede.

Vojaĝ' konsumis longan tempdaŭron vere tede
kaj ilin suferigis la iroj lunatikaj.
Survoje vepro'j frapis ilin per dornoj pikaj,
terfendoj kaj rokegoj minacis ja obsede.

Formovi l' Av' decidis du montojn kiuj ĝenis
per ĉirkaŭiroj ilin, starantajn ĉe l' kabano.
Persvadi la domanojn en hejmo li ja penis.

Gefiloj liaj lian volegon jen komprenis,
promesis doni fortojn por lia granda plano
kaj la rimedojn eblajn preparajn tuj alprenis.

II.

Sekvtage li kondukis gefilojn al la monto
kaj ekis foslaboron pioĉe kun fervoro.
El ili iuj fosis, aliaj al la foro
transportis ŝtonojn ĉare, ŝvitante kun volonto.

Nenia grumbl' okazis en familia rondo,
neniu pigris iel kaj plendis pri laboro.
Post kelkaj jaroj la montoj en sungloro
variis neniome kaj restis sur termondo.

Sed ili ne rezignis, ankoraŭ fosis plie,

laciĝon, malfacilojn ignoris tre kuraĝe,
kun cel' formovi montojn ankoraŭ energie.

La olda Av' fortstreĉis, kvankam iom malsaĝe,
modelon li starigis por idoj mens-racie,
elspezis forton, tempon kaj riĉon sendomaĝe.

III.

Vidinte tion klare, maljuna Saĝa Avo
demandis al li: "Kial vi tion ja infane
fifaras? De antikve la montoj staras sane,
kaj povas ne moviĝi pro via ega bravo."

Replikis Av' Malsaĝa defende ja kun pravo:
"Laboron tiun ni ne faradas tute vane.
Ne diru sensencaĵon tiome vi ĉikane.
Min pikas via diro maljusta kiel glavo.

Se mi ne povos fini, genepoj miaj vere
daŭrigos l' entreprenon senĉese kontinue,
sukcesos la du montojn formovi sinofere."

Kortuŝis Ĉielreĝon agado lia skue,
ordonis Li formovi la montojn jen eltere.
Pro tio Av' Malsaĝa dankegas plene ĝue.

La luno en aŭtunmeza nokto

(en tercino)

Ĝi sin kaŝas en nombroj honte,
sur ĉielo regas griza brumo.
Vent' ekblovas fole jen demonte.

Arboj nestas en la nokt-mallumo,
svingas siajn branĉojn kun susuro,
ŝajne malkontentaj pri l' brakumo

nigra subpremata de malplezuro.
Ĉio ne videblas nur kun krioj
de insektoj tute en obskuro.

Post moment' elvenas la radioj
de la luno el post nubamaso
kvazaŭ imagitaj fantazioj.

Grizaj nuboj flosas en forpaso,
cedas lokon al kreskanta luno,
kiu elas fine el nub-naso.

Jen plenlun' aperas de aŭtuno,
kun helpala vang' kaj flava brilo.
Tuta ter' ekklaras tuj en nuno.

Montoj staras belaj en profilo;
lago pace glimas en kvieto;
la insektoj ĉirpas per bel-trilo.

La plenlun' avare per lumĵeto
farbas ĉion sur la ter' varie
de malhel' al helo, eĉ ĝis kreto.

Ha, pejzaĝo sub lunlum' magie
sin prezentas al la lunĝuantoj.
Kiel bele, rave, harmonie!

Tio estas por okulaj frandoj.

Odo al aŭtunaj koloroj

La vento aŭtuna eksvingas per farboj
penikon ŝmiradas naturon plenforte.
Diversajn kolorojn prezentas jen arboj,
plantaĵoj, riveroj kaj floroj komforte.

La noktano mallumon dispelas aŭroro.

Jen ludas sur fono lazura ĉiela
laktblankaj nubmasoj tremvibre en foro,
glitante, flosante ja kiel ŝafaro fabela.

Sur transa deklivo de l' val' en prospero
diantoj disfloras en flava nuanco.
Svingiĝas ilia kapet' en libero
flirtante kun vento kvazaŭe en danco.

Montsupre sin sternas oranĝa la vasto
da persimonarboj punktitaĵ en verdo.
La fruktoj maturas vere en kontrasto
al verdaj folioj cedante ne al konkur-perdo.

Cipresoj sin montras inkverdaĵ des plie,
verŝajne sin pretigi envintre rezisti
la neĝan atakon kaj strebe defie
rigoron malvarman por vive ekzisti.

Lavendo sin vestis viole purpura,
moleta kaj freŝa ja kiel vil-plena
tapiŝo farita el tuko velura
rebrile per gam' de violo solena.

En kampoj sorgplantoj kun spikoj skarlataj
skuiĝas leĝere kaj klinas sin pro kap-pezo.
Je blovo de vento aŭdiĝas ventbataĵ
susuroj por sona orela aprezo.

Kotonkampoj regalas okulojn per blanko
en verdaj foiloj — ja vere mantelo
kun fono smeralda sub puro sen manko,
simile al vasta stelplena ĉielo.

Orflavaj ondetoj nun ludas leĝere
rizkampe sub arda sunluma zorgemo,
leviĝas kaj sinkas rizspikoj espere
al riĉa rikolto kun ĝoja poemo.

Do, kiu kolor' plej elstaras aŭtune?
Kunplektas la buntan vidaĵon naturo
per ĉiaj koloroj kombine jen nune —
festen' por okuloj pri plena maturo!

Vintraj Hajkoj

Ululas vento
Tra kampoj kaj arbaro
El okcidento

Neĝeroj flirtas
Arĝenta la pejzaĝo
Vivece bildas

Sporadas homoj
Irantaj sur la stratoj
Sub neĝaj vomoj

Ne movas roĵo
Kuŝanta sub glacio
Jen kun malĝojo

Junuloj brue
Aktivas kun vicleco
Kantante ĝue

Alportas vere
Varmecon ili ja al
Silent' surtere

Yi Qiao



Flugiloj de amo

Ĉirpas orioleoj frumatene
dolĉaj en-ĝardene
kaj unisone kun susuro de mildvento
el oriento.

Kveras hirundoj dumtage
viglaj super-lage
kaj unisone kun lirlado de akvfluo
kun plena ĝuo.

Trilas fringeloj vespere
bravaj tutlibere
kaj unisone kun flirtado de nubaro
super maro.

Rukulas najtingaloj noktomeze
sorĉaj kor-karese
kaj unisone ja kun mia zumo
en bano de lunlumo.

La birdoj kun flugiloj de amo
kantas unisone kun la versdeklamo.

Kruta monto

La vivpado sternas sin ne plata,
ni defias ĝin kun fortfervero.
Revo ne ankoraŭ estingata

estas jen kaŝata en la koro.

Ni deziras brave kun sopiro
venki la obstaklojn ja decide.
Grimpu ni krutmonton kun aspiro,
cele l' kreston gloran jen konfide.

Espereble venos baldaŭ l' tago,
mornoj kaj mizeroj jam forestos.
Ne plu ni suferos pro fuĝvago,
kaj agrable en hejmloko restos.

Devas ni defendi pacon pene,
por ke bluu la ĉiel' serene!

Mia abio

(dediĉe al la Zamenhof-tago)

Jen en fund' de mia grizĝardeno
staras l' alt-abio jam centjara.
Min inspiras ĝi kun gracia beno
dum natura depresi' amara.

Ĝiaj brakoj viglaj freŝe brilas
neĝkovritaj feste por Advento.
Spite rigorfroston ĝi trankvilas
fronte al la vintra fritita vento.

La abi' fariĝis bonkunulo
en la vivo mia kunsufera.
Ĝi alportas fidon laŭ postulo
kaj mi stimulas plenespera.

La abio jam en vintresevero
scias, ke jen venos primavero.

Infaneco en memoro

Lanta briz' susuras jen mildsona,
hela l' suno vekas min matene.
Infanec' en songo ja impona,
ovras mi okulojn iom ĉagrene.

Jaroj sen ajn ĝeno jovialas,
infantempo restas ĉiam ĉarma.
Hejmvilaĝo bene idealas,
hieraŭa ĝojo jen korvarma.

Pasintecaj ridoj en memoro
sonas ĉiam kun esper' fiera.
Dum medit' mi mutas kun humoro,
sopirante al junec' sincera.

Nun suspiras mi kun blanka haro,
kaj pli nostalgias jar' post jaro.



Shu Ting (1952-)



Elĉinigis Hong Jia

Shu Ting (ŝu ting): ĉina moderna poetino

Dediĉe al kverko

Se mi vin amus,
 mi ne suprenrampus sur vi kiel hedero
 por pavi per viaj altaj branĉoj.
 Se mi vin amus,
 mi ne kondukus kiel pasia birdo
 kantanta monotone por folioj verdaj,
 nek kiel fonto
 sendanta freŝan la konsolon ĉiam,
 nek kiel la apika monto
 pliiganta vian alton,
 beliganta vian imponecon.
 Eĉ se ne estas sunradioj,
 ja tio estas vera amo!
 Se la printempa pluv' ne falas,
 neniom tio jen sufiĉas.
 Mi devas esti kapokarbo apud vi,
 kiel arbfiguro, staras kun vi.
 radikoj niaj ĉirkaŭbrakas sub la tero,
 folioj niaj intertuŝiĝas en la nuboj.
 Kiam ventblovo pasas,
 ni intersanĝas salutojn,
 sed neniu
 komprenas nian lingvon.

Vi havas viajn bronzan trunkon kaj ferajn branĉojn
 kiel lanco, glav' kaj halebardo;
 mi havas miajn brile ruĝajn florojn
 similajn al suspiroj pezaj,
 ankaŭ al la kuraĝaj torĉoj.
 Ni kune rezistu froston, tondron, uraganon,
 kunĝuu ni la fluantan nebulon, ĉielarkon;
 ni ŝajnas havi disiĝon eternan, sed dumvivan kunloĝadon,
 loĵalo kuŝas ĝuste tie.
 Ne nur mi vian korpon amas,
 sed ankaŭ la situon kiun vi firmkaptas
 kaj l' teron sub piedoj viaj.

Kiam preteriras vi fenestron mian

Kiam preteriras vi fenestron mian,
 donu al mi benon,
 ĉar la lamp' ankoraŭ lumas.
 Lumas lampo —
 en plumb-peza nokto,
 kiel drivas lumpunktet' sur fiŝ-boato.
 Vi imagi povas, ke kabano mia
 ja similas al boat' puŝata de ventego.
 Tamen mi ne kadukiĝas,
 ĉar la lamp' ankoraŭ lumas.
 Lumas lampo—
 Kiam ombr' projekciiĝas sur la fenestrokurteno,
 tio ja indikas, ke mi estas maljunul' senila,
 sen mangestoj viglaj, kaj la dors' pli ĝiba ol antaŭe,
 sed ne mia kor' oldiĝas,
 ĉar la lamp' ankoraŭ lumas.
 Lumas lampo—
 jen ĝi reciprokas per amsento fajra
 la salutojn de l' diversdirektoj;
 la lampo lumas—
 jen ĝi per fier' impona
 strab-rigardas la subpremon en mallum' kaj lumo.
 Kiam, ho, la lampo havas distingeblan karakteron?
 Ekde kiam vi min ekkomprenis.

Ĉar la lamp' ankoraŭ lumas,
 benu min,
 kiam preteriras vi fenestron mian.

Aĥ, patrino

Per pala fingropinto vi ordigas
 la harojn jen ĉe mia tempi'
 nereteneble mi ekkaptas firme
 la baskon de la vest' de vi
 Aĥ, patrino
 por ke figuron vian tiru mi
 kvankam la matenruĝo
 la sonĝon jam distondis je fumstri'
 mi ne kuraĝas jen dumlonge ovri
 okulojn miaj pro anksi'

Ankoraŭ mi trezoras ja konservas
 la ruĝan skarpon kun konsci'
 timante ke lavad' perdigas
 specifan vian mildon de magi'.
 Aĥ, patrino
 Tempfluo same senkompatas
 mi ankaŭ timas, ke l' memorlini'
 senkoloriĝas jen malfreŝe
 kiel mi povus ĝin malfermi kun defi'

Mi iam plore kriis al vi
 pro dorno kun kolera emoci'
 Sed nun eĉ se mi surportus
 surverte vepran kronon
 mi ne kuraĝus plendi per ĝemkri'
 Aĥ, patrino
 mi ofte vian foton ja rigardas triste
 eĉ se alvoko mia povus sen raci'
 penetri la kovritan teron de la tombo
 mi ne kuraĝus ĝeni vin en longa dormebri'.

Ankoraŭ ne mi ja kuraĝus

eksponas l' oferaĵojn por am-ceremoni'
kvankam mi verkis multe da laŭdkantoj
pri floroj, maro kaj aŭror' en bild-vari'
Ah, patrino
sopiro mia al vi, dolĉa kaj profunda
ne estas rapidfluo nek akvfal' des pli
sed akvomanka puto, kiu ne kapblas
eligi kanton jen kun bela melodi'.

Muntoĉeno

en la montoĉen' de l' tempo
nokton sekvas nokt' kompakte
ni retiriĝas el la muntoĉeno de fabriko
kaj hejmiras en linioj muntoĉene
super nia kapo
kuŝas tra la ĉielvolb' la muntoĉen' de steloj
apud liniaro nia
etaĵ arboj stuporiĝas sur la muntoĉeno

certe steloj jam laciĝas
kelkmil jaroj jam forpasis
sed neniam ili ŝanĝas sian vojiradon
etaĵ arboj ĉiuj jam malsanas
fum' kaj monotono
jam senigis ilin je kolor' kaj svelto
ĉion mi jam sentas
pere de l' komuna takto

tamen strange
tio, kion mi ne povas senti
estas mia ekzistado
ŝajne la arbetoj kaj stelaro
eble pro kutimoj siaj
ne plu havas forton zorgi
pri la nuna situaci' fiksita

Memportreto

Ŝi estas lia konspiristo eta.

Nenian vorton ŝi eligas al postulo peta,
kaj bruajn ridojn spite al silent',
Kaj lian kapon turni ĉiam estas preta.
Detruas ŝi jen ekvilibron,
jen malestimas nociojn senzorge.
Kaprica kiel la kobold' enarbareta,
Ŝi per groteskaj paŝoj dancas ĉirkaŭ li.

Ŝi estas lia konspiristo eta.

Al kion li aspiras, ŝi ne sin montras ceda
Kaj akceptas ĉion ekster lia imagpovo.
Evitas ŝi alfronte al altiro l' ampeta;
Ŝi timas perdon, antaŭ ol konkeri.
Estiel kirl' mem ŝi ankoraŭ faras
Sennombrajn kirlojn jen per fort' impeta.
Neniu konas ŝian magiokapablon.

Ŝi estas lia konspiristo eta.

Ŝi ne respondas al alvoko lia, sed kun kor' diskreta,
malfacile li forlasas ŝin pro ŝia ŝajna dislokigo.
Kelkfoje ŝi similas al la mont' glacia,
kelkfoje al la maro fajrojeta,
kelkfoje al la kant' senvorta.
Aŭskultis kaj neniel li distingis veran de la pseŭda.
Gustumis kaj li ĉiam hezitis inter dolĉa kaj lang-pika.
Lia, lia
Ŝi esta lia konspiristo eta.

He Jingzhi (1924-)



Kanto pri la montoj kaj riveroj de Guilin

Elĉinigis Viktoro Li

Ho, l' di' en nuboj, ennebula fe',
kun pozoj graciaj Guilin-aj montoj belas tre!

Kiel profunda sent' kaj songo bela
en Guilin fluas sentoplana akvo la rivera!

Ho, kiom da riveroj kaj kiom da montoj, nu?
La urbo kuŝas en brakum' de montoj kaj akvflu'...

Ĉu monta urbo aŭ la urbo en akvmondo?
Ĝi ja situas en riveroj verdaj kaj smeraldaj montoj...

Aĥ! tiuj montoj kaj riveroj fluas al la sino,
de kie mi devenas por pilgrimo?

...De l' ondoj de l' Rivero Flava kaj de l' limtero en ventpelo,
ĉi tien venas mi trans mil kaj mil montoj kun danĝero.

Sur sel' mi songis pri l' pentraĵo sur la sabla tero:
"Pejzaĝ' de Guilin ĉarmas plej sub la ĉielo"...

Aĥ! ĉu en songo aŭ en land' de fabelo?
Nuntempe mi min trovas sur la monto Belo!

Ĉu mia kor' ebrias aŭ en la sobra stato?
Pentraĵ' de montoj kaj riveroj min renkontas per parado.

Pentraĵo en pentraĵoj—la rivero Lijiang min reflektas bele,
kanto el kantoj—montoj eĥas mian voĉon jen leĝere.

Svingante l' manon mi demandas al la mont' Oldulo:
dum kiom da mil jaroj montojn kaj riverojn ja vualas la nebulo?

—La kavo Perlo-Redona ĉe la Fubo-monto,
la perlo en la kav' atendas longe la frapadon je la pordo...

La monto Kokokaĝo kantas kiel sian voston pavo disetendas,
riveron verdan blankaj veloj kun ruĝaj flagoj fendas.

Printempa pluvo lavas la mienon tristan de la tero,
bonvole vidu l' Monton Chuanshan jen en speguleca la rivero—

Aĥ, la Guilin-aj montoj kaj la Li-rivera akvo—
rideto de la patrolando tiom belas jen en ravo!

Guilin-aj montoj kaj riveroj trovas sin en mia sino,
mi ĉi-momente montras mian senton de la korinklino—

Ĉu la inspir' poema ĉu la amo kun tenero,
ĉiu ja enteniĝas en la Li-rivero en la primavero!

Mi miksas l' akvon Li-riveran kun alkoholaĵo,
Ho, patrolando, mi ebriiĝas en la amo al vi dum cent jaroj...

Pejzaĝo ĉarme belas, homo naskas sentojn en la koro,
mi por eterne ne ekhavas harojn de la blank-koloro!

Fieras mi pri ĉi montoj kaj riveroj en la loko,
mi ĉiam tenas junon kun allogo!

Mi iras al Sep-stela Rok' por fea la kunveno
kaj vokas kantistinon Sahjie Liu el la ĉielo al reveno...

“La homa mond' kun la ĉiel' ligiĝas,” kantas ŝi,

“por novaj kantoj jen min sekvu vi!”

Ŝi havas da montkantoj ja mil-mile,
batalantoj, ho, pri l’ patrolando kantu panegire...

Brodaĵon dek mil ruĝaj flagoj teksas jen navede,
antaŭ okuloj sin prezentas ĝi kokete.

Ho, sabla vento el landlimo kaj la ondoj de la Flav-Rivero
alvenas al hejmloko mia dek mil liojn kune kun la primavero.

Sub ruĝaj flagoj la herooj junaj jen aperas ĉie—
okuloj ne sufiĉe ĉirkaŭprenas montojn ŝanĝiĝantajn ja varie.

—Plenplenas sentoj kaj talentoj en la koro,
ĝuste ja kiel fluas l’ akvo de l’ Li-river’ kun bonodoro

Aĥ! pentras ni l’ pejzaĝon per penik’ kaj ŝvit-ofero,
Guilin-aj montoj kaj riveroj ja videblas sub ĉielo!...



Qu Yuan (ĉ.340 a. K. – 278 a. K.)

Ĉagreniĝo post disiĝo

Elĉinigiĝo Vejdo

Qu Yuan (ĉju jüan) (ĉ. 340 a. K.— 278 a. K.) estas poeto kaj politikisto de Chu (ĉu) –regno dum la periodo de Militantaj Regnoj. En sia knabeco li jam ricevis bonan klerigadon kaj sin montris multscia kaj ambicia. En fruaj jaroj de servado en la palaco li ĝuis fidemon de la imperiestro Huai (hŭaj) de Chu–regno. Li estis nomunita kiel Supera Konsilisto kaj Sinjoro de Tri Klanoj, okupiĝante pri internaj aferoj kaj diplomatio. Li proponis “belan regadon”, opiniante, ke interne oni rekomendu talentulojn al la gravaj postenoj kaj establu bonajn regulojn de la leĝo, kaj ekstere alianciĝu kun Qi (ĉi)–regno kontraŭ Qin (ĉin)–regno. Tamen pro elpuŝo kaj kalumnio de aristkratoj li ekziliĝis al al la malproksimaj regionoj. Post kiam Yindu, la ĉefurbo de Chu–regno, estis prenita de Qin–regno li dronigis sin en Milo–rivero por esprimi sian memoferon al la lando.

Qu Yuan estas patriota poeto de la Chu–regno kaj fondinto de la romantisma poezio en Ĉinio. Li iniciatis la stilon de Chuci (ĉuci)–poemoj kiel ties reprezentanto, kaj formis la tradicion de “aromherboj kaj belulinoj” priskribitaj en poemoj, tiel ke li gajnis al si la titolon “prapatro de Chuci–poezio”. La famaj poetoj, kiaj Song Yu (song ju), Tang Le, Jing Chai (ĝing ĉaj), estis influataj de li. Li kreis la novan epokon de kolektiva ĉantado de poemoj al individua poemkreado.

Mi estas posteul’ de l’prareĝo Alta Suno,
 kaj Boyong (*bojong*) estas nomo de mia patro kara.
 Naskiĝis mi en temp’ de printempo frua bela
 sub stelo la favora en tago tigrojara.

Post divenado zorga laŭ mia horoskopoj
 la patro belajn nomojn ja donis jene al mi:
 la propra nomo Zhengze (*ĝengĝe*) (Justeco en la senco),
 kaj l’ adoltiĝa nom’ Lingjun (*lingĝun*) (Harmonio Ami).

Naturdotitas mi per beleco en la koro,

kaj ankaŭ mi kultivas min pene en spirito.
Mi aromherbojn surportas sur la ŝultroj
kun bela talizon' plektita per orkido.

Forpasas tempo glite ekster atendo mia,
tagoj kaj jaroj marŝas antaŭen sen konsci'.
Matene magnoliojn kolektas mi deklive,
vespere jen ŝirplukas akvalgojn pene mi.

Alternas sun' kaj luno senĉese kaj senhalte,
sezonoj sekvas unu l' alian laŭregule.
Vidante velki herbojn kaj arbojn dezertece,
mi timas, ke tuj oldos belino jen nature.

Kial sangvina lord' ne forigu malpuraĵojn
nek ŝanĝu la malnovajn regulojn kun racio?
ĉevalon rajdu tuje, galopu ja antaŭen,
mi gvidu vin laŭvoje klopodi por nacio.

Antaŭaj tri prareĝoj kondutis ja perfekte,
saĝuloj ĉiuj penis por ili kun fidelo.
Piproj kaj fungoj mikse kreskadas en abundo,
atenton tutan donu nur al orkid' de belo.

Shun (*ŝun*) kaj Yao (*jaŭ*), la prareĝoj, elstaraj en regado,
iris la vojon glatan kaj strebis al la celo.
Jie (*ĝje*) kaj Zhou (*ĝoŭ*), la regnestroj, malicaj kaj tiranaj,
reduktis ŝtaton ja al perea malespero.

Klikanoj tiuj ĝuas plezurojn kaj diboĉojn,
alfrontas ili vere la vojon en obskuro.
Ĉu timas katastrofon do mi en kariero?
Mi zorgas nur pri l' sorto de l' regno en futuro.

Klopodas ĉirkaŭ l' reĝo mi helpi per konsiloj,
espere ke li sekvu l' prareĝon kun fidelo.
Sed li ne min aŭskultas kredeme iomete,
anstataŭ kalumniojn akcepti kun sincero.

Admonoj miaj kaŭzos malfeliĉon al mi certe,
mi tamen povas ne min retenas pro rojalo.
Atestu la Ĉielo, ke mi fidelas vere,
mi faras ĉion nur por la regno sen eraro.

Komence ni jam interkonsenton vere faris,
sed rompis la promeson decide vi subite.
Disiĝu mi facile pro via promesrompo,
sed pro kaprico via ankriĝi ja hezite.

Mi plantis orkideojn printempajn en grandkvanto
kaj aromherbojn jen sur la vasta spac' da tero,
mikse kun azaleoj kaj peonioj buntaj
kaj melilotoj verdaj intere sen pelmelo.

Esperas mi ke ili kreskadu en prospero
kaj poste mi rikoltos pejzaĝon kun prefero.
Rezulte ili velkis putrante en ĝardeno,
damaĝ' ilia pikas min vere kun kruelo.

Avidas tiuj homoj je rango kaj profito,
ho, ili ja sin turnas malice al potenco.
Aliajn ili dubas el sia enviemo
kaj inter si konflikta kun mava la intenco.

Malkiel tiuj homoj vulgaraĵoj en klopodo
mi ĉasas ne profiton nek famon kun pasio.
Mi sentas nur oldiĝon aliri kun tempasoj,
mi volas daŭre resti kun bon-reputacio.

Matene trinkas roson mi sur magnolio,
mi manĝas krizantemajn petalojn en vespero.
Se nur mi restas ĉiam en sento senvaria,
ne gravas por mi magri skelete kun tolero.

Aer-radikojn plektas mi ja kun visterioj
kaj tredas florajn stamenojn kune strie.

Mi ligas laŭrajn branĉojn kun herboj de aromo
por fari ŝnurojn bonajn kaj longajn rektlinie.

Mi lernas de l' prauloj kaj saĝaj kaj talentaj,
ne vulgaruloj povas atingi tion vere.
Kvankam mi ne akordas kun nuna la socio,
mi tamen sekvas praan leĝaron ja prefere.

Suspirojn longajn jen mi eligas kun larmeroj,
lamente, ke plebanoj vivaĉas en mizero.
Kvankam mi regas min per rigoro en konduto,
matene mi admonas, punitas en vespero.

Insultas ili al mi pro mia herb-ornamo
kaj sakras min pro hobiaj pri orkidoj.
Mi tenas mian emon, se mi naŭfoje mortus,
neniel pentus vee ja mi kun bonkvalitoj.

Mi plendas pri l' menskonfuzitec' de l' reĝo,
neniam li distingas malpravon disde pravo.
Virinoj en palaco envias min je belbrovoj,
akuzas min pri pimpa koket' kun obscenmavo.

Nekapabluloj lertas inside en ruzado,
jen kontraŭleĝe agas manovre kun perfido.
Por ĉasi la favoron de l' reĝo mensmalklara
kondukas malbonvirte ili kun hipokrito.

Ĉagreno min atakas kaj ĝenas per ansio,
mi vivas malfacile dronante en malriĉo.
Preferus mi mortaĉi mizere sen animo,
ol vivi ja humile strebante por feliĉo.

La aglo ne viciĝas kun birdoj malsamspecaj,
kutimon tian formas natur' de antikveco.
Kvadrat' kaj rondo ne adaptiĝas bone,
la homoj ne akordas ja pro malsama speco.

Preferus mi subpremi la senton en la koro
kaj teni kalumniojn kaj sakrojn en memoro.
Jen morti pura, justa, por resti nehumila,
saĝuloj praaj prenas ja tion por fam-gloro.

Bedaŭras mi pri mia malĝusta voj' al celo,
post hezitat' la kapon mi turnas por ekiri.
Sur ĉaro mi ĝustigas direkton kun decido,
devojiradon mi ja forlasas sen suspiri.

Ĉevale mi promenas ĉe Orkidea Lago,
kaj spronas la ĉevalon al alta la montkresto.
Ne volas mi admoni pro tim' de kulpigo,
mi retiriĝu ja por ripari oldan veston.

Volas mi teksu veston per lotusaj folioj,
kaj fari mian jupon per la lotusaj floroj.
Ne gravas ke komprenas min homoj en palaco,
se mi nur restas kalma, trankvila en la koro.

Mi plialtigu la kapveston impone kun fiero,
longigu l' zon-rubandon flirtantan kun leĝero.
La malpuraĵo eble miksis kun puraĵo,
sed mia pura kor' 'stas eterne de sincero.

Retrorigardas mi al inteco kun paseoj,
ja ĉio flosas drive nebule en la foro.
surportas mi luksegajn vestaĵojn kun ornamo,
el ili ŝvebas forta nazpika bonodoro.

Hobion sian propran plebano ĉiu havas,
prefero sola mia 'stas min beligi bone.
Ne ŝanĝus mian celon mi ĉe frakas' de l' korpo,
ĉu volus mi pro puno heziti ja poltrone!

Fratino mia zorgas tre pri mi simpatie,
admonas al mi jen ripetade kun sincero,
"Bravulo Gun ja ĝuste pro dura persisteco

'stis ekzilita, mortis sur sovaĝeja tero.

“Vi ĉiam ja fidelas al reĝo per admonoj,
kaj tenas vin bonvirta konstante kun moralo.
Kortego plenas riĉe je floroj, herboj belaj,
sed distingigās vi inter ili per elstaro.

“Konvinki vi ne povas sincere ĉiujn homojn,
neniu ja komprenas tion en nia koro.
La homoj emas agi komplete jen en bando,
kial vi ne aŭskultas obee min laŭ volo?”

Mi sekvas strikte praaĵn saĝulojn por min bridi,
sed ĝis nun mi ankoraŭ anksias kun rankoro.
Transpasi la riverojn Yuan (*jūan*) kaj Xiang (*ŝjang*) volas mi
kaj
al Yao (*jaŭ*) kaj Shun (*ŝun*), prareĝoj, elverŝi mian koron.

Qi (*ĉi*), l' reĝo de Xia (*ŝja*), amis muzikon el ĉielo,
diboĉis kaj plengojis plezure sen mezuro.
Konsideris li nek inton nek onton de l' reĝlando,
kvin liaj filoj tiris la landon al obskuro.

Yi (*ji*) arde amis ĉasojn al predoj en arbaro,
precipe ŝatis vulpojn arkpafi sen kompatato.
Edzinon lian jen delogis subulo lia kaŝe
kaj lin mortigis fine, pereis lia ŝtato.

Ao (*aŭ*) fieraciis pro la potenca forto en si,
diboĉis li tagnokte senbride kun pasio.
Pro sia forgesemo pri ĉio de la regno,
li perdis sian kapon finfine sen konscio.

Perversa Reĝ' Jie (*ĝje*) agis spite al naturleĝoj,
reĝlando lia certe pereis en sufero.
Reĝo Zhou (*ĝoŭ*) fidelulojn dishakis en karnkaĉon,
epoko lia daŭris neniel sen danĝero.

La reĝoj Tang (*tang*) kaj Yu (*ju*) 'stis justemaj kaj solenaj,
kaj l' reĝoj de Zhou (*ĝou*) ĉiam agis laŭ decreguloj.
Elektis ili bone la talentulojn saĝajn,
sekvante strikte normojn modelajn laŭ postuloj.

Ĉielo senpartias favore al ĉiuj homoj,
kaj helpas tiujn homojn bonvirtajn kun sincero.
Nur tiuj bonkvalitojn heredas de prareĝoj,
kaj rajtas regi super la vasta spac' da tero.

Pensante pri intaĵoj, ontajoj en la menso,
mi trovas normojn por homoj kun bonvirto:
nenion malutilan ne fari kontraŭ volo,
nenion ja malbonan ne porti kun mensflirto.

Kvankam mi riskas vivon por fari la konsilojn,
neniel pentas mi pri l' komenca ambicio.
Tenon' kvadrata taŭgas ne al la truo ronda,
kaj multaj bonvirtuloj mortis en agonio.

Ĉagrenon mi suferas kun tristo lamentada,
plendema pri tragika traviv' en kariero.
Per aromherboj larmon deviŝas mi senĉese,
ja mian veston tramalsekigas larmrivero.

Surgenue sur robbasko detale mi plendemas,
kun vero en la koro direktas min mi klare.
Per vento flugas rekte ĉielen mi leĝere,
en feniksa la kaleŝo garnita jadvuale.

Matene mi ekiras de Verdlando en la sudo,
atingas Kunlun-monton mi jam ja en vespero.
Mi volus halti iom ĉe la ĉiela pordo,
la sun' jam malaperas post monton en malhelo.

Ordonas al Sun-dio paŝadi mi pli lante,
ne proksimiĝi al monto kun akcelo.
Longlonge l' vojo mia etendas sin al foro,

priserĉas mi kun peno la mondon por la vero.

Trinkigas mi ĉevalon ĉe la Sunbana-lago,
kaj ligas bridrimenon al arb' en fea sfero.
Deŝiras branĉojn mi ja kontraŭ sunardo,
promenas mi vagade senĝene en libero.

Lunĉar' antaŭen marŝu samkiel pioniro,
Ventdio sekve strikte post mi ja kiel ŝildo.
Feniksoj avangardu por liberigu l' vojon,
sed Tondrodio petas pardonon pro tard-iro.

Ordonas al feniksoj flugilojn swingi mi ja
kaj flugi dum diurnoj senĉese kun leĝero.
Turnventoj alpremiĝas tujtuj al korpo mia,
gvidante buntajn nubojn en ĉielarka helo.

La nuboj jen kuniĝas jen disas en vario,
koloroj la diversaj nuancas en flosado.
Mi petas la pordiston malfermi l' ĉielpordon,
li tamen min rigardas ĉe l' pordo ja en gapo.

Taglumo jam vanuis kaj sekvas la vespero,
mi restas longe kun florbukedo en la mano.
Ĉi mondo miksas bonon kaj mavon sen distingo,
envio ĉiam belon mortigas en sangbano.

Riveron Blankan volas transpasi mi matene,
sur Langfeng-mont' restigas ĉevalon tie mi ja.
Rerigadante mi ĉirkaŭen eklarmas triste plene,
jen kial ne troviĝas la signoj Belodia.

Flosante mi vizitas Palacon la Printempan,
mi tie plukas jadajn branĉetojn por ornamo.
Mi volas ja donaci branĉojn kun freŝfloroj
al belulino de mi serĉata en songĉdramo.

Ordonas al Nubdio mi stiri l' nuban ĉaron,

por serĉi kie loĝas la belulino Nimfo.
Preparas mi jam bone leteron amdeklaran
kaj petas Muzikdion ĝin sendi por amparo.

Klopodas svati ŝin li disde mi dum kelktempo,
la fakto montras ke ŝi hezitas pri l' amparo.
Vespere ŝi reiris al sia rezidejo,
matene lavas harojn ŝi en l' rivera klaro.

Ŝi fieraĉas blinde pro sia belaspekto,
kaj ŝi tuttage vivas diboĉe kun frivolo.
Kvankam ŝi vere belas, ŝi tamen fikondutas,
plibone trovu mi alian kun firma volo.

Rigardas al diversaj direktoj mi zorgeme,
kaj poste mi descendas leĝere el ĉielo.
Sur Jada Turo alta impone staras ino
el Yousong (*joŭsong*)-regno kun senkompara belo.

Mi petas falkon svati ŝin por mi kun sincero,
ĝi tamen diras ke ŝi ne estas tiom bela.
Se turto svatus por mi krianta ĉiam brue,
mi timas ke ĝi ruzas tro kun frivolo vera.

Perpleksa mi hezitas kun duboj en la koro,
nedece ŝajnas al mi persone al ŝi sinsvati.
Fenikso jam akceptas donacojn de ampeto,
mi devas la rivalon antaŭi ŝin rilati.

Mi volus vagi foren sed mankas piedteno,
nur tien kaj ĉi tien mi trotras en libero.
Antaŭ ol princo Shaokang (*ŝaŭkang*) ankoraŭ ne edziĝos,
mi flirtus kun filinoj du reĝaj kun ĉarmbelo.

Svatantoj miaj vere malhavas lertan langon,
amparo mia ja evidentas sen espero.
Ĉi aĉa mond' maljuste envias talentulojn,
laŭdatas mavaj faroj dum svenas virta belo.

Neeble mi atingas belinojn en haremo,
la saĝa reĝo ŝajne ne sobras en la menso.
Ne povas mi elverŝi la koron al iu ajn,
ĉu povus daŭri firme mi kun lojala penso?

Kun magiherboj kaj bambusplintoj en la mano,
mi petas sorĉistinon diveni mian amon.
Ŝi diras ke du homoj en amo certe kunos,
kiu fraŭlin' ne vere adoras viran famon?

“Ja vastas la Naŭ Ŝtatoj en la teritorio,
ĉu nur ĉi tie trovas sin belulinoj vere?
Pli bonas iri foren tujtute sen hezito,
ne povas belulinoj ignori vin prefere.

“Troviĝas aromherboj enmonde la allogaj,
ne korinklinu al ĉi obstine kun amaro.
La mond' mallumas kaj dronas en kaoso,
neniu konus vin ja precize en detalo.

“Malsamajn proprajn ŝatojn, malŝatojn oni havas,
sed strangas la kvalitoj de aĉaj la sinjoroj.
Kun absintherboj ĉirkaŭ l' talio eĉ akuzas
ili, ke ja ne taŭgas orkidoj por dekoruoj.

“Ĉar ili ja ne povas distingi la herbaĉojn,
ĉu ili povus juĝi jadpecojn de valoro?
Kun vesto la malpura sur korpo ili tamen
akuzas, ke orkidoj odoras je fetoro.”

Mi sekvus la instruojn de l' sorĉistino bone,
sed mi hezitas plena je duboj en la koro.
Laŭdire avataros spiritoj sur la teron,
preparu mi manĝaĵojn al ilia honoro.

Spiritoj cent ekfalas amase el ĉielo,
renkontas ilin ĉiuj diaĵoj sur la monto.

Kun radianta brilo dieca ili diras
al mi tre multajn vortojn konsolajn per rakonto.

“Klopodu iri supren aŭ malsupren por serĉi
la homon samaniman kaj kun la sama volo.
Prareĝoj talentulojn jen serĉis kaj akorde
kunagis kun ministroj fidelaj kun bonkoro.

“Se nur vi vere amas belecon el la koro,
ĉu vi bezonus peti svatiston por amĉaso?
Krimulon, kiu ramis kotmuron kun ŝvitpeno,
la reĝo eĉ lin faris ministron sen forlaso.

“Buĉisto Lü Wang (*lju wang*) svingis buĉilon al dombestoj,
Reĝo Wen (*ven*) de Zhou (*ĝou*) ja lin nonumis Lordo Granda.
Paŝtisto blovis kornon kaj kantis jen plengorĝe,
ĉe tio Duk’ Huan (*huan*) faris lin vere Ĉefo Landa.

“Trovigās vi ankoraŭ en tempo de juneco,
vi avantaĝas vere per verva energio.
Se la kukolo krius pli frue en aŭtuno,
cent herboj triste velkus, ve, jam en agonio.”

Ho, kial oni nigre makulas tiujn gemojn
kaj penas ŝirmi l’ gloron ilian de radioj?
nepardoneblaj tiuj aĉuloj tre perfidaj
probable volas tion detru el envioj.

L’ epoko ŝanĝiĝemas kaj dronas en kaoso,
ne povas resti mi plu ĉi tie sen reago.
Orkidoj kaj dolĉeroj jam perdos la aromon,
putriĝos la freŝherboj sub drasta pruj-atako.

Ho, kial tiuj herboj antaŭaj kun aromo
nun jam fariĝas plantoj sovaĝaj sen verdhelo?
Ĉu estas ja alia kial’ kaŭzanta tion
krom la malzorgo kaj neatento al la belo?

Orkidoj servas kiel model' de mia digno,
sed ili vantas tiom malkiel en l' apero.
forĵetas ili noblon sed tenas sin banalaj,
apenaŭ vicas kiel floraĵoj kun fiero.

Piprarbo emas flati, tirani kun orgojlo,
eĉ kornusfloro nomas sin nobla kaj nobela.
Ĉar ili strebas alten en rangpromocio,
ĉu ili povus doni spiron de floro bela?

Nun homoj flosas flue de la soci' reala,
neniu povus teni sin firma en volforto.
Ĉar pipro kaj orkido kondukas tiom mave,
des malpli bonas palaj plantaĵoj en malordo.

Nur mia jadpendaĵo valoras senmezure,
ĝi tenas sian virton konstante ĝis la nuno.
perfumo densa ĝia apenaŭ ja vanuas,
ankoraŭ ĝi elspiras aromon kun plezuro.

Agordas mi la koron plezure por distriĝo,
vagadas mi ĉi tien kaj tien por belinoj.
Kun jadpendaĵo ĉarma ankoraŭ mi ja volas
iradi inter ter' kaj ĉiel' tra ĉiuj limoj.

Jam la sorĉisto diris favorajn vortojn al mi,
mi pretas ekvojaĝi en bonaŭgura tago.
Mi plukas branĉojn de jadarb' kiel viandon
kaj pistas jaspon kiel manĝaĵon dum la vago.

Flugantaj drakoj tiras kaleŝojn niajn kuri,
garnitajn per brilantaj jadpecoj kaj eburo.
Forlasos tiujn homojn mi kun malsama koro
kaj flugos tra la mondo ŝvebante kun plezuro.

Direktas la kaleŝojn ni al la monto Kunlun,
inspektas ni zorgeme survoje en libero.
Ĉirkaŭe buntaj nuboj jen ŝirmas la sunlumon,

tintiloj sur kaleŝoj sonoras en aero.

Matene ni ekiras de la pramej' ĉiela,
atingas la ekstreman ueston en vespero.
Feniksoj tenas flagojn flirtantajn perflugiloj,
jen supren jen sob ili flugadas kun leĝero.

Jen ni atingas sablon fluantan de l' rivero,
ni devas lante marŝi laŭflanke de akv-ŝvelo.
Ordonas mi al drakoj konstrui ponton tie
kaj helpi min transiri l' riveron sen danĝero.

La vojo malfacilas kaj longas kun obstakloj,
ordonas mi aliajn kaleŝojn stari voje.
Nin turnas liven al Buzhou (*bu ĝou*)-monto ni senhalte,
ĉe l' Okcidenta Maro renkontiĝos ni plenkatoje.

Kolektas mi mil ĉarojn jen kune en vicaro,
iliaj radoj kuras antaŭen flank' ĉe flanko.
Mi stiras la kaleŝon tiratan de ok drakoj,
la flagoj sur ĝi flirtas en ventpela falango.

Lantigas marŝon mi kun trankvilo en la koro,
sed nefacile regas mi pensojn jam en foro.
Mi kantas kantojn naŭ kaj ekdancas kun plenkatojo,
mi min amuzas gaje ĉe l' plezuriga horo.

La suno leviganta eoste lumas brile,
mi baldaŭ vidas mian homlokon sen vizito.
ĉevaloj kaj sekvantoj miaj sin montras tristaj,
rifuzas ili marŝi antaŭen kun hezito.

Epilogo:

“Ba, jam sufiĉe!”

Ve, min komprenas vere neniu en la regno,
kial mi devus mense sopiri al ĝi pene?
Ĉar povas mi ne gajni en rego de la ŝtato,
mi min dronigos akven prefere kunĉagrene.

Zhang Wei



Unuakta dramo

Revo ĉasata de esperantisto

Personoj:

Espero Li: esperantisto

Lia edzino

Sceno:

Malgranda, simple meblita ĉambreto de geedzoj Li. Staras skribotablo kun malnova komputilo, sur kiu kuŝas kelkaj Esperanto-libroj, kaj malgranda ŝparkasa ujo. En unu flanko de la ĉambreto troviĝas malnova sofo kaj malgranda televidilo. En alia flanko sin trovas malgranda kuirejo. La muroj estas ornamitaj per bildoj de diverslandaj pejzaĝoj kaj Esperanto-flago. Sur la scenejo regas atmosfero de simpla vivo, sed vidiĝas spuroj forlasitaj de kunvivado dum longaj jaroj.



(Kiam la kurteno leviĝas, Espero sidas ĉe la skribotablo, okulumante al malplena dokumento sur la ekrano. Lia edzino eniras, kun telereto de tre simpla manĝo kun iom da verdaj legomoj.)

Edzino: (metante la telereton sur la tablon) Jen, mia kara, la manĝo estas simpla, sed ĝi povas ŝtopi vian ventron. Se vi volas daŭre vivi sane kaj lerni vian damnitan lingvon, vi devas zorgi pri via malfortika korpo. Lastatempe mi trovas,

ke vi des pli malgrasiĝas. Sciu, ke homo estas fero kaj manĝoj ŝtalo. Mi sentas doloron en la koro, kiam vi laboradas tagnokte super la komputilo por tia Esperanto. Jes, pravas por vi ĉasi vian revon por Esperanto, sed pli gravas via sano. ĉu ne?

Espero: (*kun dankema rideto*) Jes, mia kara. Dankon pro via zorgo. Kompreneble la sano estas grava. Kaj baldaŭ Esperanta Kongreso okazos en Afriko. Mi devas min prepari fizike kaj mense. Se mi ne havas sanan korpon, ĉu mi havas energion por iri al tiel malproksima Afriko? (*Li ridetas, sed la rideto ne atingas liajn okulojn.*)

Edzino: (*sidiĝas kaj ekprenas lian manon.*) Mi vidis, kiel vi maldormas tra la noktoj kaj studas vortojn kaj frazojn de Esperanto. Via sindonemo estas nekredebla. Vi ofte diras, ke vi ne perdas tempon en lernado de Esperanto kaj dediĉas vian forton por ĉasi vian revon. Kia diligentulo vi estas! Sed nun vi jam ermetiĝis kelkajn jarojn kaj vi ne estas tiom vigla kiom vi estis laboranta en oficejo, kaj krome vi ricevis modestan pension, kiu apenaŭ sufiĉas por deca vivo. Kaj nun vi planas vojaĝi al la malproksima Afriko. Vi ŝparas monon por atingi vian celon. Ne turmentu vin per tia penado kaj ŝparema vivo! Ĉu vi volus, ke mi suferu kune kun vi?

Espero: (*kun iom da melankolio kaj hontemo*) Mi devas min pretigi. La kongreso estas ne nur vojaĝo, sed ankaŭ ŝanco renkonti samideanojn, kiujn mi nur konas tra leteroj kaj ekranoj.

Edzino: (*decide*) Pretigu vin bone. Via diligenteco estas laŭdinda. Eĉ la direktoro de la banko rimarkis vian streĉon. (*Ŝi ridetas kun zorgema sento.*) Li diris, ke via ŝparemo estas modelo por ĉiuj.

Espero: (*ĝentile*) Estas ja la plej bona maniero montri, ke revoj povas fariĝi realaĵoj, eĉ se oni devas sin oferi.

Edzino: (*subite*) Espero, mia kara, mi ricevis leteron hodiaŭ.

Espero: (*interesite*) Ho? Kion ĝi diras?

Edzino: (*elprenante la leteron kaj legante*) "Estimata Sinjoro kaj Sinjorino Li, estas granda ĝojo inviti vin al la Esperanto-Kongreso senpage, danke al anonima donaco farita en viaj nomoj..."

Espero: (*interrompante, nekredeme*) Kio?! Sed kiel... kiu?

Edzino: (*fiera*) Tio restas sekreto. Sed via revo, mia kara Espero, fariĝas pli atingeblaj ol iam ajn.

(*Lumo malheliĝas dum la paro ĉirkaŭbrakas unu la alian. La telero da manĝo restas netuŝita sur la tablo. La sceno finiĝas kun la sento, ke, malgraŭ ĉio, espero kaj revo ĉiam povas venki super malfacilaĵoj.*)

(*Kurtenfalo*)

Xin Yue

Novluna skolo en la ĉina moderna poezio

Ĉe la komenco de la dudekaj jaroj de la XX-a jarcento aperis en Ĉinio multaj literaturaj rondoj, societoj kaj skoloj, kiuj iniciateme oponis la malnovan kulturon kaj pledis por la nova kulturo. Inter ili troviĝis Novluna skolo, kiu karakteriĝis per sisteme teoriaj opinioj pri poemkreado kaj distingiĝaj trajtoj de poemoj, kaj pro tio donas relative profundan influon al la postaj aktivecoj de kreado de modernaj poemoj en Ĉinio ĝis nun. La skolo originis el la Novluna societo, organizita de Hu Shi, Wen Yiduo, Xu Zhimo kaj aliaj.

En 1922, post studado en Usono kaj Britio Xu Zhimo revenis al Pekino kaj iniciatis kunmanĝadojn kun eleganta gusto por komunikiĝi unu kun la alia inter poemamantoj. Pro tiaj kontaktoj la Novluna societo naskiĝis. La societo dum la komenca periodo havis tendencon de ĝenerala kulturo, sed ne celis beletrajn kreadon kaj verkadon. La societanoj inkludis mondumanojn en Pekino, kiaj verkistoj, profesoroj kaj personoj en politika, industria kaj financa rondoj. Ĉar ĝi havis la karakteron de klubo, la societo ne faris multe da aferoj rilataj al poezio dum la komencaj jaroj. Ĝis aprilo de 1926, kiam Wen Yiduo lanĉis la rubrikon *Konsiloj pri poemkreado* en la felietono en *Pekina Matenĵurnalo*, kaj en ĝi aperis teoriaj ideoj pri modernaj metrikaj poemoj en plena lumo. Per tio la societo kolektis aron da poetoj kaj ili aktive provis la kreadon de la novaj metrikaj poemoj. Pro kolektiĝo de poemamantoj, precipe la junaj, sub la standardo de novaj metrikaj poemoj, la Novluna skolo iom post iom formiĝis. Kvankam la felietono *Konsiloj pri poemkreado* aperis nur je 11 numeroj, la teorioj kaj praktikado pri nova metrika poezio, kiun ĝi diskonigis, jam fariĝis popularaj inter junaj poetoj kun antaŭenemaj pensoj. En marto de 1928 Xu Zhimo, Liang Shiqiu kaj aliaj fondis la gazeton *Nova Luno*, kaj en 1931 Xu Zhimo, Chen Mengjia starigis trimonatan gazeton *Poezio*. Kaj multaj poetoj kolektiĝis sub la standardo de *Nova Luno* kaj daŭre aktive entreprenis esplorojn pri kreado de novaj poemoj. Ĉe la fino de 1931 Xu Zhimo pereis en flugmaŝina kraŝo. Kaj la aktivecoj de la Novluna skolo laŭgrade dekadencis. Fakte la aktivecoj de la skolo dividiĝas en du etapojn: antaŭ la morto de Xu Zhimo estis

nur simpla kolektiĝo de poetoj, kiuj provis verki novajn poemojn kun novspeca metriko alia ol la klasika metriko, kaj la dua etapo troviĝas post lia morto la poetoj de la skolo daŭre produktis tiaspecajn poemojn strikte ligitajn kun la teorioj pri nova metriko de poezio. Kaj ĉe la fino de la dua etapo publikiĝis *Poemaron de novlunaj poetoj*, kiu prezentis la diversajn facetojn de tiuj poetoj.

Dekomence la poetoj de la skolo elkriis la sloganon “opono kontraŭ sentimentalismo kaj pseŭd-romantikismo”, ĉar tiam aperis la tendenco de prozigo de liberaj versoj en kreado de novstilaj poemoj. Tiurilate Wen Yiduo kaj Xu Zhimo elmetis teorion pri metrikigo de la novstilaj poemoj, emfazante, ke la forto de la literaturo ne kuŝas en senbrida liberigo, sed en koncentriĝo kaj abstinado. Ili postulis, ke la novstilaj poemoj devu prezenti modernan formon kaj klare distingiĝu disde la aliaj ĝenroj, kaj ke oni devu sekvi la metrikon de la poezio, dancante kun katenoj. Tiu teoriaj proponoj de la skolo iagrade konkeris kaj korektis la lozecon kaj laŭplaĉecon en la poemoj.

La Novluna skolo havis pli harmonian opinion pri artismo. Unue ili sistemigis la teoriojn pri metrikigo de la novstilaj poemoj, emfazante, ke la plej ĉefa estetika trajto devas esti harmonio kaj ordec, kiu esprimiĝas pere de tri belecoj elmetitaj de Wen Yiduo pri poemkreado: la beleco de arkitekturo, la beleco de muziko kaj la beleco de pikturo. La noveco de la metriko de la novstilaj poemoj rompis la diversajn malnovajn normojn kaj regulojn de la malnovaj rimoj kaj metriko de la antikva klasika lingvo, kaj donis atenton al internaj silaboj kaj ritmo de la poemoj. Unuflanke la teorio heredis la kremon de la antikvaj kaj klasikaj poemoj, kaj aliflanke ĝi prezentis novigon. Due la teorio donis apartan gravecon al la plivastago de la tereno en esprimado de sentoj kaj al riĉigo de teknikoj por esprimi emociojn, enkondukis la temojn pri la ideala amo en la novstilajn poemojn, ekpluatis kaj pliiĝis, per psikologiaj rimedoj, la enhavon de la emocioj de la poemoj, kaj donis respekton al natura esprimado kaj insprita spirito, tiel ke la novstilaj poemoj estis injektita per nova vogleco. Laste ili donis atenton al esploroj pri formoj de la poemoj. Ili tradukis kaj transponis multajn formojn de britaj kaj italaj poemoj. Kvankam tia faro ne tute akiris sukceson, tio tamen plivastigis la pensojn pri eksperimentoj en formoj de la novstilaj poemoj.

Ĉi-sube mi konciza prezentu la du ĉefajn poetojn de la Novluna skolo: Wen Yiduo kaj Xu Zhimo.

Wen Yiduo (1899-1946):



Wen Yidou naskiĝis en klerula familio. Dum knabeco li estis absorbita en la ĉinaj antikvaj klasikaj poemoj kaj tre ŝatis belarton. Kiam li studis en Qinghua-universitato, li estis profunde influita de novaj pensoj de la Kvara-Maja Movado*. En 1922, post diplomiĝo el la universitato, li veturis al Usono por studi pikturon kaj literaturon. Tri-jara studado pri arto en Usono jam inokulis en lin artajn pensojn de estekismo. Dum studado li ankaŭ kovis fortan senton de patriotismo. En 1925, kiam li revenis al Ĉinio, li aktive verkis novstilajn poemojn por la *Konsiloj por poemkreado* kaj trumpetis siajn opiniojn pri novstilaj poemoj, tiel ke li fariĝis la ĉefa iniciatinto de novstilaj poemoj.

Li donis grandan gravecon al la socia valoro de la novstilaj poemoj. Li realigis siajn proponojn de teorio pri la novstilaj poemoj pere de sia praktikado kaj kreado de la novstilaj poemoj. En septembro de 1923 li publikigis sian unuan poemaron *Ruĝa kandelo*, kiu entenis multajn belajn poemojn kun estetikisma tendenco. En la poemaro la peco *Farboj* esprimas lian adorembron al la koloroj super ĉio en la homa mondo:

Farboj

La vivo estas blanka senvalora la paperfoli?
 Verdo igas min plu disvolviĝi,
 ruĝo donas entuziasmon al mi
 flavo montras al mi fidelecon,
 bluo dotas min per pura digno,
 palruĝet' donacas al mi la esperon,
 griz' alportas al mi triston,
 nigro min vualas per morttuko.
 Ekde nuno
 volas mi dorloti mian vivon,
 ĉar mi amas ĉiujn ĝiajn farbojn.

Tra la tuta poemaro videblas ĉasado al la vero, arda amo al la patrujo kaj kritikoj pri la malluma mondo, de la poeto mem.

En januaro de 1928 lia dua poemaro *Stagna akvo* publikigis, en kiu esprimiĝis la tranĉa kontrasto inter la bildo de la patrujo mense skizita kaj la reala situacio de la patrujo, tiel ke li montris fortan malkontenton al la socia realo vortigitan en versoj. La jena poemo *Malkovro* malkaŝas lian fortan senton

de amo al la patrujo:

Malkovro

Mi venas, mi ekkrias, kun sanglarmo:
 “Ĝi ja ne ’stas Ĉinio mia, ne, ne!”
 Mi venas, ĉar mi aŭdas, ke ĝi min alvokas.
 Rajdante per forta vent’, kun torĉ’ enmane,
 mi venas, sen scii, ke mi vane ĝojas.
 Mi renkontiĝas kun koŝmaro, sed ne kun vi!
 Tio estas teruro kun koŝmaro pendanta sur klifo,
 tio ja estas ne vi, kiun mi kore amas!
 Mi preme ĉuas al la ĉiel’ kaj vento,
 mi ĉuas, manbatante l’ bruston de la tero,
 sed ne respondo sonas. Mi vin plore vokas,
 elverŝante mian koron—jen en mia koro!

Kiel la ĉefa poeto de la skolo, li multe influis aliajn skolanojn per sia teorio pri poemverkado. La kerna enhavo de lia teorio fokusiĝis sur tri belecoj: beleco de muziko postulas la harmonion inter silaboj kaj rimoj, t.e. kombino kaj ordo de silaboj en unu verso devas esti regula; beleco de pikturo substrekas, ke la vortoj en la poemo devas esti belaj kaj kolorriĉaj, kaj la poemo devas prezenti vidan efekton kaj intuecon; beleco de arkitekturo kuŝas en tio, ke la eksterajo devas esti regula inter strofoj kaj bonorda inter versoj, nenecese strikte insistante al la sama longeco el samaj mezuroj, tamen pli aŭ malpli egalnombraj. Lia teorio fakte servis kiel bazo de la teorio pri novstilaj kaj metrikaj poemoj, kaj ludis gravan rolon en lia skolo.

Xu Zhimo (1897-1931):



Xu estis bone edukita en tiaj universitatoj, kiaj Hujiang-Universitato en Ŝanhajo, Nordoceana Universitato en Tianjin kaj Pekin-Universitato. En 1918 li veturis al Usono kaj en 1920 li studis en Kembriĝ-Universitato de Britujo. Tie li studis politikan ekonomion, sed li multe interesiĝis pri poemoj de brita estetikisma skolo, kaj samtempe li komencis verki poemojn. Post kiam li revenis al Ĉinio en 1922 li instruis kiel profesoro en Pekin-Universitato, Qinhua-Universitato ktp. En 1923 li iniciatis fondi la Novlunan societeton en Pekino. En aprilo de 1926 li oficis kiel ĉefredaktoro de *Konsiloj pri poemkreado*

de *Pekina Matenĵurnalo*. En 1927 li veturis suden al Ŝanhajo kaj aliaj lokoj kaj instruis en Guanghua-Universitato en Ŝanhajo, la Centra Universitato de Nankino ktp. Samtempe li daŭre kreis poemojn. En 1928 li faris preparojn kune kun Hu Shi kaj aliaj por establi *Novlunan librovendejon* kaj ĉefredaktis la monat-gazeton *Nova Luno*. En novembro de 1931 li malfeliĉe forpasis pro flugmaŝina kraŝo.

Li provis verki en diversaj ĝenroj, sed lia famo de poeto superis al tiu de prozisto, romanisto kaj literaturkritikisto. Dum lia dekjara tempdaŭro de literaturkreado li publikigis kvar poemaron *Poemoj de Zhimo* (1925), *Florenca nokto* (1927), *Furiozaj tigroj* (1931) kaj *Vojaĝo en nuboj* (1932). En tiuj poemlibroj plenas liaj kontraŭdiraj pensoj: unflanke lia revo pri la okcidenta burĝara politika demokratio kaj aliflanke seniluziigo de lia revo; unuflanke lia kredo de absolute libera realismo kaj aliflanke malfacila realigo de tia realismo.

En poemkreado li prezentis alian stilon ol tiu de Wen Yiduo. Li inokulis siajn poemojn per delikata sento kaj emocioj el la vivo. Ankaŭ li, kiel Wen Yiduo, verkis estetikajn poemojn kun pozitivaj kaj strebantaj pensoj, kiuj rivelis la filozofiecon de la homa vivo. La plej elstaraj kaj tre rafinitaj poemoj apartenis al tiuj kun personaj travivaĵoj, mildsentaj kaj amemaj. La jena poemo *Re-aŭdiaŭado al Kembriĝo* plene manifestas liajn trajtojn en versverkado:

Re-adiaŭado al Kembriĝo

Foriras mi malpeze
samkiel venis mi leĝere;
svingetas mi la manon
por diri ĝis al nuboj sincere.

La orumita salikarbo ĉe la bordo
Jen estas novedzin' en sunsubira gloro;
la bela ombro en ondanta akvo
dancadas, vagas jen en mia koro.

La verdaj plantoj sur rivera ŝlimo
enakve skuas sin ja kun fiero;
volonte mi fariĝus akva herbo
en mildaj ondoj de Kembriĝ-rivero!

Lageto sub arbega ombro
ne estas font', sed ĉielarko bela
dispecigita inter algoj flosaj,

kun ĉielarka songĝ' fabela.

Priserĉi songĝon? Tenu boat-stangon,
kaj remu ĝis pliverda herbprofundo,
ŝarĝite per stelbril' je boat-pleno,
kaj kantu en stelbrila pomp-abundo.

Sed mi ne povas kanti laŭtevoĉe,
ĉar senbrueco ludas fluton de disiĝo;
insektoj en somero ankaŭ mutas por mi,
ĉinokte dronas en silent' Kembriĝo.

Foriras mi malpeze
samkiel venis mi leĝere;
eksvingas mi manikojn kaj foriras
ne kunportante eĉ nubpecon vere.

La poemo estas lia reprezentanta peco. En ĝi riveliĝas kombino de tri belecoj de animstato, muzika ritmo kaj strukturo. Li prenis Kembriĝon kiel objekton de sia pejzaĝo-priskribado, tamen en lia koro Kembriĝo jam fariĝis simbolo de lia pasinta patoso.

Ĉe la inaŭgura numeo de *Konsiloj pri poemkreado* li diris, ke li volas preni la kreadon de novstilaj poemoj kiel seriozan aferon. Lia senlaca strebado en kreado de novstilaj poemoj formis lian propran stilon. Ne nur multaj poetoj de la skolo estis influitaj de li, sed ankaŭ en la tuta poemverka rondo lia influo estis profunda.

Krom Wen Yiduo kaj Xu Zhimo troviĝas ankoraŭ pli ol dudek poetoj, kiuj prezentis siajn proprajn trajtojn en poemverkado kaj lasis sian spuron sur la trakoj de disvolviĝo de la Novluna skolo.

**Kvara-Maja Movado estis lanĉita je la kvara de majo de 1919, en Pekino, de patriotaj studentoj, kiuj oponis imperiismon kaj feŭdismon pere de manifestacio, peticiado, senmova sidado kaj strikado. La movado akiris la subtenon de diversaj rondoj, inkluzive de civitanoj, laboristoj, komercistoj ks.*

***Supre cititaj poemoj estas elĉinigitaj de Vejdo.*

Wei Da

Variantoj en tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj

Ĉinio estas lando riĉa je poemoj. Jam pasis ĉirkaŭ tri mil jaroj kiam la unua poemaro *Libro de Poezio* aperis en Ĉinio. Laŭ malpreciza kalkulo la ĉinaj antikvaj poemoj nombriĝas je ĉirkaŭ tri cent mil. Pro interŝanĝo de kulturaj heredaĵoj inter diversaj landoj multaj ĉinoj tradukis la ĉinajn poemojn en alilandajn lingvojn, inkluzive Esperanton. Precipe dum la lastaj tridek jaroj pli ol du mil ĉinaj antikvaj poemoj estas esperantigitaj. Kompreneble la tradukintoj zorgeme elektis popularajn kaj multelegatajn poemojn por esperantigo. La tradukitaj poemoj kovras la tempdaŭron de pli ol tri mil jaroj. Kiam ni ĝuas kaj aprezas tiujn poem-tradukojn, ni trovas, ke ekzistas multaj traduk-variantoj de la sama poemo. Tio estas interesa fenomeno, ĉar ni povas studi la stilon kaj traduk-teknikojn de tradukintoj. Traduki la ĉinajn poemojn en Esperanton ne estas facila afero. Pro tio, ke la ĉina kaj Esperanto multe diferencas en vortigo, esprimo, gramatiko kaj aliaj flankoj, la ĉinaj kaj eĉ neĉinaj esperantistoj strebas fari la tradukojn pli perfekte. Fakte antaŭ ili staras du obstakloj: komprenado de la originalaj poemoj kaj esprimado per Esperanto. Por kompreni la senco de la ĉina antikva poemo la ordinaraj ĉinoj devas posedi solidajn sciojn de la ĉina antikva lingvo, ĉar la antikva ĉina lingvo kaj la moderna malsamas en vortsenco kaj gramatik-konstruo. Kaj eĉ se oni povscias la ĉinan antikvan lingvon, li devas konatiĝi kun la skribaj teknikoj, metaforaj figuroj, imagoj kaj etosoj prezentitaj de poetoj en la ĉinaj antikvaj poemoj, tiel ke oni povu pli bone kompreni la poemojn mem. Por esprimi ĝin en Esperanto oni devas skribi simplajn kaj facile kompreneblajn versojn en Esperanto kaj poste laŭ la Esperanta metriko kompletigi la tradukitan poemon. La plej malfacila laboro kuŝas en tio, ke en la ĉinaj antikvaj poemoj oni uzis tonadon (en la ĉina ekzistas kvar tonoj por unu ideogramo) por sona harmonio, dum al Esperanto mankas tia rimedo, kaj en Esperanto oni uzas ritmon kaj rimadon malsamajn ol en la ĉina. Se oni volas sukcesi traduki unu ĉinan antikvan poemon en Esperanton, li devas konsideri tiujn faktorojn kaj pleniĝi la mankojn inter la du lingvoj. Laŭ la tradicia tradukproceso, ĉinaj esperantistoj kutimas konsideri la nombron de uzitaj silaboj kompare kun la nombro de ideogramoj de ĉina antikva poemo. Ĝenerale oni uzas du silabojn por traduki unu ĉinan ideogramon, ĉar unu ĉina ideogramo povas esprimi pli da senco ol proksimume du silaboj aŭ unu vorto, ekzemple, por traduki unu poemon kun po kvin ideogramoj en ĉiu verslinio, oni uzas dek-

silaban versliniojn en Esperanto (kompreneble kun konvenaj ritmo kaj rimado). En tiel kompleksa proceso la tradukintoj penis kaj penas produkti diversajn tradukojn laŭ sia kapablo ne nur en la ĉina lingvo, sed ankaŭ en Esperanto. Kaj tiele multaj poem-tradukoj naskiĝis amase el la manoj de tradukintoj. Variantoj de tradukoj el la sama poemo nature aperadis en diversaj libroj, revuoj, retejoj kaj aliaj lokoj. Ĝis nun, laŭ mia rimarko, la poemo verkita de Li Bai (701-762) *Nokta penso* havas plej multajn traduk-variantoj, sume je pli ol du dek. Antaŭ kvar dek jaroj aperis la libro *Tutmonda sonoro* farita de nia karmemora K. Kalocsay, en kiu troviĝas la traduko de *Nokta penso*. Laŭ mia supozo, la traduko de la poemo jam aperis almenaŭ kelkdekaj jarojn pli frue ol la libro mem. Laŭdire Kalocsay ne konis la ĉinan lingvon kaj pere de la helpo de ĉino li sukcesis esperantigi la poemon laŭ lia parafrazo aŭ laŭvorta traduko de la poemo. Mi permesas al mi aserti, ke lia traduko estas la unua tradukversio de la poemo. Depende de lia poezia talento, Kalocsay faris ĝin bela Esperanta poemeto, se ni legas ĝin senkonsidere la originalan poemon. Nun ni unue ekzameni la originalan poemon verkitan de Li Bai antaŭ pli ol mil kaj du cent jaroj:

李白(701-762)

静夜思

床前明月光，疑是地上霜。举头望明月，低头思故乡。

Laŭlitera traduko:

Kvieta nokto penso

Ĉe putrando (verŝiĝas) brila luna lumo, / ŝajnas prujno sur la tero. / (Mi) levas la kapon (kaj) rigardas la brilan lunon, / (kaj) klinas la kapon (kaj) pensas (pri mia) hejmloko.

Lia traduko legiĝas:

NOKTA PENSO

Antaŭ lito blanke brila luno floras,

Super tero kvazaŭ prujno blankkoloras.

Kapolevo: brilan lunon mi rigardas,

Kapoklino: naskvilaĝon mi memoras.

trad. K. Kalocsay

La originala poemo konsistas el kvar kvin-ideogramaj versioj kun rimado de la unua, dua kaj la lasta verslinioj, simile al robaia konstruo. Kalocsay uzis kvar ses-trokeojn kun rimado de la unua, dua kaj la lasta verslinioj. En konstruo la traduko estas fidela al la originala, sed en senco la traduko ne estas tiom fidela. “Antaŭ lito” devus esti “ĉe putro” aŭ “putrande”. Kompreneble tiu kulpo ne devus iri al Kalocsay, sed al lia ĉina klariginto. Tamen en esprimado Kalocsay

faris kelkajn misojn. “(prujno) super tero” ŝajnus, ke prujno flosus en aero, sed ne kuŝas SUR LA TERO”; “Kapolevo” kaj “Kapoklino” sonas kiel ordonvortoj, sed ne tiel nature nek poezie. Fakte “rigardas brilan lunon” postulas kapolevon, ĉu necesas aldoni redundadon?

Japano Kenji Ossaka ankaŭ esperantigis tiun ĉi poemon de Li Bai:

PENSO EN NOKTO

Antaŭ lito estas planko,
Kvazaŭ kuŝas prujno blanka.
Levas kapon mi al lun' admire,
Kaj... ĝin tuj mallevas hejmsopire.

trad. Kenji Ossaka

La traduk-poemo konsistas el du kvar-trokeoj kaj du kvin-trokeoj kun para rimado. En ĝi troviĝas la sama miskompreno pri “antaŭ lito”. La pli bona esprimo ol tiu de Kalocsay estas “(mi) levas la kapon” kaj “ĝin mallevas”, tiel ke la japana tradukinto evitis la ordoneskajn esprimojn.

Jena estas la traduko de Claude Piron:

NOKTOPENSOJ

Al lit' estas lun',
Sur ter' lumas prujn'.
Kaplev': jen lunbrilo,
Kapklin': hejma jun'.

trad. Claude PIRON

La traduk-poemo konsistas el tri kvin-silabaj versoj kaj unu ses-silaba verso (la tria verslinio) kun rimado de la unua, dua kaj la lasta verslinioj. Persone mi ne konsideras, ke ĝi tenas ĝustan ritmon de Esperanta metriko, precipe tiuj karamboloj (lit' estas, ter' lumas, kapklin' hejma) konfuzas mian menson. En senco ĝi iom distancas de la originala poemo. Ekzemple la originala poemo diras, ke la lunlumo ŝajnas prujno sur la tero, sed la traduko diras, ke “Sur ter' lumas prujn'” ne estas vera, ĉar tute ne ekzistas prujno sur la tero en tiu sceno. La tradukinto ĉasis rimadon per –un-, sed “hejma jun'” prezentas al la leganto malklaran bildon: ĉu juna hejmo? Fakte la traduko jam detruis la sopireman etoson de la originala poemo, kvankam laŭdire ĝi akiris premion de la belarta konkurso.

William Auld ankaŭ partoprenis en tradukado de tiu ĉi poemo:

DUM NOKTO KVIETA

Mi vidis lunlumon
Antaŭ kanapo mia:
Ĉu frostoj kovras la teron?

Mi levis la kapon,
 Rigardis sur monto la lunon,
 Mi klinis la kapon,
 Kaj pensis pri hejmo lontana.

trad. William Auld

Mi aŭdace asertas, ke la traduk-poemo esprimiĝas ĉefe per amfibrakoj en libera maniero. “Antaŭ kanapo” egalas al “antaŭ lito”, same miskompreno de la originala poemo. Ĝia konstruo nature ne kongruas kun tiu de la originala poemo.

Rilate la tradukojn far de ĉinoj, mi citu nur ses el ili:

1. Antaŭ l’ lit’ la luno blanke floras,
 Sur la planko kvazaŭ prujn’ koloras.
 Kapolev’: la lunon mi rigardas,
 Kapoklin’: hejmlokon mi memoras.

trad. Laülum

2. Antaŭ la lit’ scintilas pompa bel’,
 Ĉu prujno sin disŝutas al la ter’?
 Ha, l’ lun’ al mi obstine okulumas;
 Ve, nostalgio en la kapo zumas!

trad. Xie Yuming

3. Antaŭ lito luma spir’
 Ĉu surtere frosta ir’?
 Kapoleve: luna bril’;
 Kapokline: hejmsopir’.

trad. Vadant

4. Antaŭ lit’ lum-spir’
 Teren prujnoŝmir’?
 Kaplev’: lun-rigard’;
 Kapklin’: hejm-sopir’.

trad. Lu Jixin

5. Put-rande lunlum’
 kvazaŭ prujn’. Kaj dum
 al lun’ kap’ supren,
 klinas ĝin hejmun’.

trad. Zhou Liuxi

6. Ĉe puto ludas la lunbrilo
 kiel surtera prujn-kovrilo.
 La lunon helan rigardante,

mi hejmsopiras sen trankvilo.

trad. Vejdo

La unua traduko pli aŭ malpli samas kiel tiu de Kalocasay, eble modifita versio de Kalocsay.

La dua estis esperantigita de Xie Yuming, la tradukinto de *Ruĝdoma Songô* (Ĉina Esperanto-eldonejo, Beijing, 1996). Sendube li estas lerta tradukinto de la ĉina antikva poezio, ĉar en *Ruĝdoma Songô* troviĝas multaj poemoj, versparoj kaj alistilaj poemoj, kiujn li esperantigis zorgeme kaj en serioza maniero. Laŭ lia stilo en tradukado li donis atenton al la senco, etoso kaj artismo de tiuj poemoj, sed ne nur al iliaj konstruo kaj formo. Vere en tradukado de ĉi tiu poemeto li ne strebis reaperigi la formon kaj konstruon de la originala poemo. Lia traduko konsistas el kvar kvin-jambaj verslinioj kun para rimado. En la okuloj de aliaj tradukintoj lia traduk-poemo iome malproksimiĝas de la originala, sed fakte ĝi estas fajne elfarita kun kelkaj luksaj vortoj (ekz. scintili).

La tradukintoj de la tria kaj la kvara tradukoj donis grandan atenton nur al la ekstera konstruo de la traduko, preskaŭ ignorante la esprimatan sencon. Ili volis, ke la nombro de silaboj de tradukitaj verslinioj egalu al tiu de ideogramoj de la originalo por akiri la absolutan egalvaloron almenaŭ en kvanto de silaboj aŭ longeco de la verslinioj, sed fakte tio ne eblas, ĉar la senco esprimita per unu ideogramo estas pli ol tiu de unu Esperanta silabo. Pro tio ili vole nevole forĵetis kelkajn necesajn ligantajn vortojn por teni la liniojn en sama kvanto de silaboj, tiel ke naskiĝis nekompreneblaĵoj. Mi ne scias, kiom da senco neĉinaj legantoj povus kompreni el tiuj verslinioj. Kaj la kvina traduko similas al la tria kaj la kvara. Kvankam ĝi entenas verbon por ligi aliajn frazelementojn en verslinioj, bedaŭrinde pro manko de sufiĉaj silaboj, ĝi ne plene esprimas la sencon de la originalo. En la ĉinaj antikvaj poemoj oni ofte ellasis la subjekton “mi”, dum en Esperanto oni ne devas ellasi la subjekton “mi” ĝenerale, alie la plenumanto de la ago ne estas klara. Tiaj tradukoj plejofte forĵetas la plej graven personon (mi) en la bildo de la poemo.

La sesan tradukon mi faris surbaze de tiuj pli aŭ malpli sukcesaj tradukoj. Mi scias, ke nur tra komparado oni povas juĝi, kiuj tradukoj estas bonaj kaj kiuj malpli bonaj, tiel ke oni produktas relative perfektan tradukon.

En tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj ofte aperas tiaj variantoj de la sama poemo. Ili rajtas ekzisti samtempe, ĉar ili reprezentas diversajn stilojn kaj karakterojn de diversaj tradukintoj. Pere de tiuj variantoj oni povas kompari kaj analizi ilin de multaj anguloj— komprenado, esprimado, metriko kaj eĉ elektado de vortoj—, tiel ke oni iom post iom perfektigas la tradukadon.

Jene mi citu alian grupon da variantoj por ĝuado kaj aprezado de la legantoj:

孟浩然 (689 – 740)

春晓

春眠不觉晓，

处处闻啼鸟。

夜来风雨声，

花落知多少。

Laŭlitera tradukado:

printema mateno

printema dormo ne scias vekigon, / ĉie aŭdiĝas birdaj pepoj. / noktaj venta kaj pluva sonoj, / floroj falis oni ne scias kiom.

Meng Haoran (689 – 740)

1. Printempa mateno

La dormo printempa vekigon ne konas,

Matene, sed ĉie, birdpepo resonas.

Hieraŭ en nokto de pluvo kaj vento,

Ve, kiom da floroj falis en lamento?

trad. Minosun

2. Printempa mateno

Dormanton eksurprizas matenhelo

Birdkantoj ĉie eĥas ĉe l' orelo.

Sed dum la noktaj vent' kaj pluvo,

Kiom da floroj ja ekkuŝis sur la tero?

trad. S.J.Zee

3. Printempa mateno

Dormado printempa,

Tagigon ĝi spitas:

Birdeta pepado de tempo

Al temp' ĝin nur songe vizitas.

Dum nokt' mi aŭskultis,

Ke pluvas kaj ventas:

De tio, ho ve, evidentas,

Ke floroj falintaj tre multis!

trad. Kenji Ossaka

4. Printempa mateno

Printempa dormo dolĉis ĝis taghelo,

Birdkantoj ĉie tiklas al l' orelo.

Bruadis nokte pluvo kaj ventblovo,

Kiom da floroj falis al la tero?

trad. Laŭlum

Post komparado kaj analizado, mi povas konstati, ke al ĉiuj suprecititaj tradukoj ne ekzistas problemoj pri komprenado de la originalo kaj Esperanta metriko. Do, kio estas la kriterio por juĝi, kiu el ili estas pli bona traduko? Estas vere malfacile fari tion, ĉar ĉe altnivela tradukantoj la traduk-poemoj aspektas tre simile en esprimado. Laŭ la opinio de la ĉina fama tradukisto Xu Yuanchong, kiu tre lertas en poezia tradukado en la angla kaj franca lingvoj el la ĉina antikva poezio, elmetis tri kriteriojn por la tradukado de la ĉinaj antikvaj poemoj al aliaj lingvoj. La unua kriterio estas beleco de senco, laŭ kiu la traduko devas esti fidela al la originalo ne nur en senco, sed ankaŭ en ekzakta kaj artisma vortelektado. La dua emfazas la belecon de muziko, ĉar kiel poemo la traduko devas prezenti poezian etoson en diversaj flankoj de metriko. Kaj la lasta parolas pri la beleco de formo, t.e. la traduko devas esti bela en formo aŭ konstruo fidela al tiu de la originalo.

Pri la beleco de senco:

La unua traduko prezentas pli aŭ malpli belan scenon de la originalo. En la dua traduko “Dormanton eksurprizas matenhelo” ne povas transdoni la ĝustan sencan de la originalo, kiu diras, ke eĉ kiam tagiĝas, la dormanto ankoraŭ dormas, ne volante ellitiĝi. En la tria traduko “spitas” uziĝas nur por rimado, sed ne estas konvena vorto en la senco, kaj “ĝin nur sonĝe vizitas” aldonas la sencan, kiun la originalo ne havas. En la kvara traduko “tiklas” estas erare uzita, ĉar oni ĝenerale uzas ĝin kiel transitiva verbo.

Pri la beleco de muziko kaj beleco de la formo:

La unua traduko konsistas el kvar versoj de kvar amfibrakoj kun para rimado (la rimaranĝo de la originala poemo estas aaxa (x=senrima)) kaj ĝia konstruo proksimiĝas al tiu de la originala. La dua traduko konsistas el du kvin-jamboj, unu kvar-jambo kaj unu ses-jambo kun para rimado kaj ĝia konstruo iom distancas de tiu de la originalo. La tria traduko entenas ok versliniojn laŭ la skemo: du du-amfibrakoj + du tri-amfibrakoj +du du-amfibrakoj+du tri-amfibrakoj kun rimaranĝo ababcdcd, kaj ĝia konstruo iom multe diferencas de tiu de la originalo. La kvara traduko havas netajn versliniojn de kvin jamboj laŭ la rimado de la originalo aaxa.

Laŭ la supra analizado tiuj kvar poem-tradukaj variantoj havas sian proprajn avantaĝon kaj malavantaĝon. Se oni volas juĝi, kiu varianto estas pli bona, tio eble dependas de aprezo kaj nivelo de Esperanto de la leganto. Fine mi volas diri, ke la poem-tradukaj variantoj de la ĉinaj antikvaj poemoj povas helpi fari poem-tradukadon pli perfekta, se vere ekzistas tiaj perfektajtoj.

Pearl S. Buck:



Usona verkistino inklinema al ĉinoj

de Guo Ji

En 1938 kiam la komitato de Nobel-premio pri literaturo donis premion al Pearl S. Buck, la premidonanto diris: “Ĉijara premio estas aljuĝita al Pearl S. Buck pro ŝiaj eminentaj verkoj, kiuj elhakas la vojon al la humana simpatio transpasanta la large dividitajn limojn de la racia diskriminacio kaj por la studoj de homaj idealoj, kiuj estas granda kaj vivanta arto de portretado. La Sveda Akademio konsideras, ke tio agas en harmonio kaj kongruas kun la celo de la revoj por la estonteco de Alfred Nobel.” En sia parolado al la Akademio, Pearl prenis “la ĉinajn romanojn” kiel sian temon. Ŝi klarigis: “Mi estas usonanino kaj laŭ naskiĝo kaj laŭ la linio de mia familio, sed miaj plej fruaj scioj pri rakontoj kaj pri kiel rakonti kaj verki rakontojn, venis al mi en Ĉinio.”

Vere la pliparto de ŝiaj rakontoj (romanoj kaj noveloj) strikte rilatas al personoj kaj aferoj de Ĉinio. Ŝi ricevis la premion ĝuste pro sia romano *La bona tero*, unu peco el la triologio *La domo de la tero*, kiu priskribas la banalan vivon de la ĉinaj kampuloj. Ŝi vivis kaj verkis en Ĉinio dum tutaj kvardek jaroj. Ŝi ne povis forgesi, kion ŝi aŭdis, vidis kaj renkontis en tiama Ĉinio. Kaj tiuj travivaĵoj nature fariĝis nutraĵoj por ŝiaj verkoj.

Pearl naskiĝis en Hillsboro de Okcidenta Virginio, Usono, en 1892. Ŝiaj gepatroj, kiel misiistoj, veturis al Ĉinio por prediki tuj post ilia geedziĝo en junio de 1880, sed post nelonge ili reiris al Usono pro venonta naskiĝo de Pearl. Kiam ŝi estis tri-monat-aĝa, ŝiaj gepatroj, kunportante ŝin, duafoje venis al Ĉinio kaj unue ekloĝis en Huai’an. Poste ili translokiĝis al Zhengjiang, Shuzhou (Anhui-provinco), Nanjing, Lushan k.a. lokoj kaj vivadis dum kvardek jaroj. Inter tiuj lokoj Zhengjiang estis la plej longa rezidejo por ili, kie ili vivadis dek ok jarojn. Pro tio Pearl nomis Zhengjiang-on sia hejmloko en Ĉinio. La plejparto de ŝia infaneco estis pasigita en Zhengjiang. Tie ŝi ellernis la ĉinan

lingvon kaj kutimis al la lokaj moroj. Post tio ŝia patrino eklernigis al ŝi la anglan lingvon. Samtempe ŝi lernis en Lernejo de Miss Jewell kune kun lokaj ĉinaj infanoj, kun kiuj ŝi interparolis en loka dialekto. Ŝi kreskis en dulingva medio efektive. Post lernejoj horoj ŝi ankaŭ ricevis la lecionojn pri la ĉina klasika kulturo donitajn de ĉina klerulo. En 1900-a jaro, pro la Insurekcio de Boksisoj (ĉine: Yihetuan)¹, kiu celis “subteni Qing-dinastion kaj ekstermi fremdladanojn el la Okcidento, por eviti la mortigon de la ribelantoj Pearl kaj ŝiaj gepatroj prenis vaporŝipon al Ŝanhajo kaj loĝis en la koncesia kvartalo por blankuloj.

Post kelkaj monatoj ŝi unuafoje reiris al la hejmo de sia patrinflanka avo en Usono. En siaj memoraĵoj ŝi skribis: “Kial oni insistis rilatigi nin, konstante senŝanĝajn, kun tiuj blankhaŭtaj rabistoj kaj bandistoj de kie oni ne scias. La unuan fojon mi suferis ofendiĝon dum mia vivo! Ĉu mi estas malamita ĝuste pro tio, ke mi havas blankan haŭton kun bluaj okuloj kaj blondaj haroj?” Kiam ŝi revenis al Ĉinio, ŝi daŭre sekvi la kurson de tiu ĉina klerulo nomata Kong, kaj tiu klarigis kial ĉio malfeliĉa okazis. Li nereteneble ploris. Ŝi eksplikis en sia aŭtobiografio: “Mi ploras, ĉar mi scias, ke se s-ro Kong kaj mia patrinflanka avo povus renkontiĝi vidalvide kaj elkore babilis, ili povus kompreni unu la alian kaj veni al la akordo pri la okazintaĵo. Sed unu el ili vivis en Ĉinio kaj la alia en Usono. Kiel ili povus renkontiĝi? Eĉ se ili povus renkontiĝi, en kia lingvo ili komunikiĝus, kiun ili ambaŭ konas? Tamen mi ĉiam kredas, ke ili povus eltrovi komunan lingvon, ne grave ĉu la anglan aŭ la ĉinan.” Post fiasko de la Insurekcio de Bokistoj ŝi jam ne plu hezitis inter la du malsamaj mondoj. Ŝi eksciis, ke ŝi estas usonano, sed ne ĉino. Kvankam Ĉinio tiel intimis al ŝi kiel ŝia patrujo, Ĉinio tamen ne estis ŝia patrujo kaj ŝia patrujo situis trans la Pacifiko. De tiam en ŝia naiva koro konfliktiĝis du malsamaj mondoj. Unu flanko estis ŝia patrujo Usono kaj la alia la lando, al kiu ŝi inklinemis pro ĝiaj konataj vivo kaj popolo. Ŝi esperis, ke pere de sia plumo ŝi pene komunikigu du landojn kaj eliminu la kontraŭdirojn inter ili, por ke ili fariĝu fratoj.

En 1902 ŝi revenis al Zhengjiang kaj en majo de 1917 ŝi edziniĝis al John Lossing Buck, agrikultura ekonomisto. Kaj ili fine setlis en Suzhou, Anhui-provinco, malgranda urbeto ĉe la Huai-rivero. Tiun regionon ŝi priskribis en siaj libroj *La bona tero* kaj *Filoj*.

En la lasta duono de 1921 Pearl kaj ŝia edzo veturis al la urbo Nanjing kaj ŝi engaĝiĝis kiel instruistino pri la angla literaturo en Jinling-Universitato

funkciigita de usona eklezio. Kaj samtempe ŝia edzo, kiel agronomo, establis kaj estris la fakultaton pri agrikultura ekonomio en la sama universitato. Krom instrulaboro en Jinling-Universitato, ŝi ankaŭ kumule instruis la kursojn pri edukado kaj angla lingvo en la Nacia Centra Universitato. Dume ŝi konatiĝis kun multaj ĉinaj famuloj, kiaj Xu Zhimo, Mei Lanfang, Hu Shi, Lin Yutang kaj Lao She.

En 1922 Pearl provis verki kaj en sekva jaro ŝi sukcesis elbaki sian unuan verkon *Ankaŭ en Ĉinio*. Ekde tiam ŝi publikigis siajn verkojn de tempo al tempo. En 1925 ŝi produktis la novelon *Vortoj de virino*, en kiu ŝi priskribis la romantikan amon inter diversnaciaj viro kaj virino, aludante, ke ŝi kaj ĉina poeto Xu Zhimo enamiĝis unu al la alia, kaj esprimante sian alkroĉiĝemon al Xu en la animo.

En 1927 kiam la Norden-Ekspedicia Armeo² prenis Nanjing-on, regis malordo en la socio. La soldatoj de la Armeo detruadis la lokojn de predikado kaj lanĉis sangverŝan batalojn kontraŭ feŭdaj militlordoj. Dum la periodo de tiel nomata “Nanjing-Incidento” ses fremdlandanoj estis mortigitaj. Pearl kaj ŝia familio, kiel multaj aliaj fremdlandanoj, dronis en paniko kaj sentis grandan danĝeron. Kun helpo de malriĉa ĉina familio, ŝia familio kaŝis sin en ilia ĥato kaj tiele ŝi kun sia familio pasigis unu tagon en timego. Ŝiaj familianoj senhelve atendis eventualan atakon ĉiumomente okazontan. Ŝi neniel pensis, ke la katastrofo falas sur ŝin, ordinaran fremdlandanon, kiu vivis sur la lando de Ĉinio. Post tio ŝia familio estis savita de usona militŝipo. Poste ŝia familio veturis al Ŝanhajo kaj plue vojaĝis al Japanio, kie la familio restis unu jaron. Kiam ŝi revenis al sia antaŭa domo en Nanjing en 1928, la korto jam fariĝis ĉevalstalo kaj latrino, kaj la domo estis prirabita de soldatoj kaj rabistoj. Feliĉe ŝi eltrovis en murŝranko lignan keston, en kiu konserviĝis sendifekte la malneta manuskriptoj de la libro *Biografio de Kelly* skribita de ŝi por ŝia mortinta patrino. Kiam la libro publikigiĝis, ĝi portis alian titolon *Gasto el fremda lando*. Pearl daŭrigis verkadon kaj post nelonge ŝi poŝtsendis al sia amiko en Usono la novelon *Kion ĉina virino diris*, kiu jam aperis en ĉina gazeto, kaj ties sekvantan novelon, proponante, ke estas bone kombini ilin en unu romanon kun titolo *La vento de la ĉiela regno*. En 1929 Richard J. Walsh, redaktoro de la eldonejo John Day en Nov-Jorko akceptis ŝian debutan romanon *Orienta vento: Okcidenta vento*, kiu eble estis la alia titolo de *La vento de la ĉiela vento*. De tiam Pearl kaj Walsh komencis rilaton de kunlaboro kaj finfine tia rilato rezultis al ilia geedziĝo (la saman tagon, kiam ŝi divorcis disde sia edzo Buck, en 1935).

Post kiam Pearl revenis al Nanjing, ŝi ĉiutage enfermis sin en mansardo de sia etaĝdomo en la universitato por skribi la romanon *Wang Lung*, kaj post unu jaro ŝi finis ĝian malnetan manuskripton. Ŝi poŝtendis ĝin al la eldonejo John Day kaj Walsh entuziasme promesis ĝian eldonadon, nur proponante, ke la titolo *Wang Lung* malfacile akcepteblas al la publiko kaj pli bone estas ŝanĝi la titolon al “Tero” aŭ simila. Fine, en 1931, la bele bindita libro *La bona tero* eldoniĝis. Kaj ĝi tuj fariĝis unu el la plej popularaj romanoj en la 20-a jarcento en la Okcidento kaj rangis en la unua loko de la plej bone vendataj libroj dum 1932-1933 jaroj en Usono. Laŭ koncerna statistiko jam vendiĝis kelkaj milionoj da ĝiaj ekzempleroj en pli ol sesdek landoj, inkluzive de Usono. Post nelonge la libro gajnis Pulitzer-premion kaj Medalon de William Dean Howells pri romanoj. Metro-Goldwyn-Mayer aĉetis ĝian film-rajton per tiama rekorda sumo. Kiam la filmo estis prezentata, ĝin spektis pli ol dudek milionoj da homfojoj tra la mondo. Eĉ Luise Rainer, unu el la stelulinoj, kiu rolis en la filma versio de *La bona tero* akiris Akademian Premion (Academy Award). La eldonejo John Day, kiu antaŭe estis plensarĝitaj per ŝuldoj, pro la sukceso de Pearl, tuj famiĝis kiel plej granda eldonejo en Nov-Jorko.

Dum tempdaŭro de kvar jaroj (1927-1932) Pearl faris grandan entreprenon. Ŝi fintradukis unu el la ĉinaj kvar klasikaj literaturajoj, kiun ŝi plej ŝatis, en la anglan lingvon. Ŝi donis al la traduko la titolon *Ĉiuj homoj estas fratoj*⁴, kiu entenas 71 ĉapitrojn. La traduko estas la plej frua versio en la angla lingvo. En 1933 ĝi estis eldonita samtempe en Nov-Jorko kaj Londono. Laŭ takso de ĉinaj fakuloj, la traduko estas relative fidela al la originalo. En antaŭvorto de tradukita libro Pearl esprimis sian deziron: “Mi tradukas ĝin kiel eble plej laŭvorte, ĉar la stilo kaj temo de la ĉina originalo estas tre konformaj. Mia laboro estas similigi la tradukaĵon al la originalo kaj ebligi la leganton, kiu ne konas la originalon, legi kvazaŭ la originalon. Eĉ se troviĝas nebrilaj enhavoĵoj en la originalo, mi ne beligas ilin en la traduko.” Vere ŝia anglalingva traduko *Ĉiuj homoj estas fratoj* estas altkvalita. Poste en 1937, 1948, 1957 la libro estis reeldonita en Usono kaj Britujo pro sia populareco al la legantoj. Kaj aliaj landoj tradukis ĝin en siajn proprajn lingvojn laŭ la anglalingva versio de Pearl. Dum tradukado de *Ĉiu homoj estas fratoj*, Pearl ricevis senegoisman helpon de ĉinaj kleruloj, inter kiuj Long Moxiang (Mo Hsiang Lung) fakte estis ŝia kunlaboranto en tradukado. Laŭ interretaj materialoj Long buŝe interprete la originalon en la ĉina antikva lingvo per moderna ĉina lingvo, kaj Pearl tradukis laŭ liaj facile kompreneblaj lingvaĵoj. Post tio alia ĉina klerulo Shao Dexiang

kune kun ŝi kontrolis la malnetan manuskripton.

En 1938 la Nobel-premio pri literaturo estis aljuĝita al Pearl S. Buck “pro ŝia riĉa kaj epopea priskribado pri la vivo de kampulj en Ĉinio kaj pro ŝia biografia majstroverkoj”³. Ŝia sukceso kuŝis en tio, ke pere de ŝia priskribado pri la reala vivo de la ĉinaj popoloj, precipe de ĉinaj kampulj ŝi ŝanĝis la tiaman rigidan vidkampon de ordinaraĵoj okcidentanoj, kiuj konsideris, ke ĉinoj estas malhonestaj, kruelaj, enigmaj kaj opi-fumemaj, kaj ilia socio postgiganta kaj dekadeca. Sub ŝia plumo la vera mondo de la ĉinoj prezentiĝis vivece kaj reale. Ŝi rajtis malfaldi la realajn vivajn facetojn, ĉar ŝi persone travivis la ordinaran vivon de ĉinoj en urbetoj kaj la kamparo dum la longa tempo kaj kolektis multe da unua-manaj materialoj. En la romano *La bona tero* ŝi objektive modlis per senornama stilo la honestan kaj simplan figuron de ordinara kampulo kaj ties familian vivon. La protagonisto Wang Lung vivis mizere denaske. Kiam li penkreskis, lia patro admonis lin aĉeti servknabinon en riĉa familio kiel sian edzinon. Lia edzino O-Lan estis silentema, sed eltenema kaj laborema. Eĉ kiam ŝi ĵus akuŝiĝis, ŝi trenis sin kune kun sia edzo kaj laboris en kampoj sub la ardanta suno. Tamen Wang Lung traktis ŝin malvarme pro ties nebela aspekto. Neatendite malsatego okazis. La familio de Wang Lung venis al la rando de morto pro manko de nutraĵoj. Devigite la tuta familio moviĝis suden por sin vivteni. Pro hazarda okazo Wang kaj lia edzino aliĝis al rabistoj kaj prirabis riĉulon. En prirabado O-Lan, kiu iam laboris en domo de riĉulo kaj konis sekretojn de riĉulo, helpis al sia edzo elfosi keston da trezoroj. Kaj ili tuj riĉiĝis. Kun riĉaĵo ili revenis al sia hejmloko kaj aĉetis multe da kampoj. Post riĉiĝo Wang des pli malŝatis sian nebelan edzinon, kaj li prenis putinon kiel sian kromedzinon. Sed tempo estis senkompata. Kiam li malrapide oldiĝis, li jam perdis siajn frivolecon kaj ambicion de juneco. Lia nura deziro estis gardi siajn kampojn. Li admomis al siaj filoj, ke ili neniel elvendu siajn kampojn, ĉar la tero estas la fundamento por nutri ĉiujn vivojn. En la romano ĉiuj epizodoj fontis el la reala vivo de ordinaraĵoj kampuloj, kiun Pearl propraokule vidis, kiam ŝi vivis en Anhui de Ĉinio.

Krom la libron *La bona tero*, Pearl verkis multajn aliajn librojn rilatajn al Ĉinio. De la titoloj de tiuj libroj, kiaj *Ĉina ĉielo* (China Sky), *Draka semo* (Dragon Seed), *Ĉina flugo* (China Flight), *Letero el Pekino* (Letter from Pekin) k. m. a., oni povas certi, ke ilia enhavo estas sendube rilata al Ĉinio. Vere Pearl, kiel fekunda verkistino, produktis pli ol sepdek librojn, inkluzive de romanoj, biografioj, teatraĵoj, porinfanaj verkoj, tradukaĵoj kaj ĵurnalismaĵoj. Filmado de

ŝiaj verkoj des pli disvastigis ŝian famon en la okcidenta mondo. Interalie *La bona tero* (Metro-Goldwyn-Mayer,1937), *Draka semo* (Metro-Goldwyn-Mayer,1944), *Ĉina ĉielo* (RKO Radio Pictures Inc. 1945), *Satano neniam dormas* (20th Century Fox Film Corporation, 1962), *Virino en la korto* (Universal Picture Co. 2001), kiuj prenas Ĉinion kiel temon, ludis rolon en disvastigado de la ĉina kulturo.

En 1934 Pearl foriris de Ĉinio kaj reveturis al Usono. Ekde tiam ŝi produktis preskaŭ po unu romano ĝis 1974 ĉiujare. La nombro de libroj verkitaj de ŝi atingas ĉirkaŭ sepdek. Oni povas imagi, ke ŝi neniam ĉesigis verkadon spite al malfacilaĵoj en la vivo. En ŝiaj plej multaj romanoj la protagonistoj estas preskaŭ ĉinoj, precipe ĉinaj kampuloj kaj la okcidentanoj nur servas kiel misiistoj, kio tute renversas la okcidentan verkmanieron en priskribado ĉefe pri blankuloj. Pli frue ol ŝi neniu okcidenta verkisto priatentis ĉinajn kampulojn en verkado. Eĉ ĉinaj verkistoj donis nur etan atenton al la ĉinaj kampuloj. Pli ol tio Pearl prezentis multajn inajn figurojn reale kaj versimile en siaj romanoj kaj noveloj.

Preter verkado Pearl ankaŭ aktive partoprenis en movadoj pri homaj rajtoj kaj filantropiaj aferoj. En siaj libroj ŝi skribis pri diversaj temoj, inkluzive de virinaj rajtoj, azia kulturo, enmigrantoj, adoptado, misiista laboro, milito, atombombo kaj perforto. En 1931 okazis inundo en Ĉinio kaj ŝi verkis serion da noveloj priskribantaj suferojn de rifuĝintoj, la noveloj, kiuj elsendiĝis per radio en Usono kaj poste ŝi publikigis en la libro *La unua edzino kaj aliaj rakontoj* (1949). Kaj pro tio, ke ŝi malkontentiĝis pri la ekzistanta servo de adoptado, kiu rifuzis akcepti aziajn kaj miksrasajn infanojn, ŝi kunestablis kun aliaj la korporacion *Bonvena Domo* (Welcome House), la unua internacia agentejo de adoptado. Dum ĉirkaŭ kvindek jaroj *Bonvena Domo* donis helpon al pli ol kvin mil infanoj. Por helpi tiujn infanojn, kiuj ne estis kvalifikitaj por adoptado, ŝi lanĉis *Fonduson de Pearl S. Buck* (en 1964) por “solvi malriĉecon kaj diskriminacion alfrontatan de la infanoj en aziaj landoj.” En 1964 ŝi malfermis la *Ŝancan Centron kaj Orfejon en Suda Koreio*, kaj poste ĝiajn filiojn en Tajlando, Filipinoj kaj Vjetnamio. Ĉe inaŭguro de la centro, ŝi diris: “La celo... estas malkaŝi kaj elimini maljustaĵojn kaj antaŭjuĝojn suferatajn de infanoj, kiuj, pro sia naskiĝo, estas malpermesitaj ĝui privilegiojn edukon, socian, ekonomian kaj civilan, kiuj estas normale donitaj al infanoj.”

Dum la tuta vivo Pearl neniam partoprenis en aktivecoj de feminismo. Tamen

oni ĉiam nomis ŝin feministo kaj ŝi rifuzis akcepti la titolon. Fakte jam pli frue ol la usona feminismo ekis (1940), ŝi faris multe da paroladoj pri virinaj rajtoj kaj ankaŭ verkis rilatajn eseojn. En ŝiaj literaturaĵoj oni povas vidi la brilantajn inajn figurojn, kiuj komence estas katenitaj de feŭda etiko kaj poste laŭgrade konsciiĝas pri siaj rajtoj, kaj kiuj ĉasas emancipiĝon kaj gardas siajn proprajn rajtojn. Tio evidente indikas, ke Pearl jam dumlonge kovis feminismajn konceptojn kaj volis preparoli la virinojn. En Ĉinio multaj kleruloj pritraktas ŝiajn vortojn kaj agojn pri virinaj rajtoj. En 2012 la julia numero de la gazeto de Nankai-Universitato aperigis disertaĵon kun la titolo “Pearl: la pioniro de la moderna usona feminismo”, en kiu la aŭtoro citas multajn ekzemplojn por ilustrati la avangardajn parolojn kaj agojn de Pearl en defendo de la virinaj rajtoj. En la libro *Of men and women* (1941) verkita de Pearl, kiu konsistas el sep eseoj, ŝi interalie diris, post kiam ŝi ricevis Nobel-premion, ke “pri literatura kreado, mi scias, ke la situacio estas tre malfavora al virinoj; se la verkoj estas same bonkvalitaj, la viraj verkistoj ĉiam staras unue sub la favoro; kial ajn diligente laboras la inaj artistoj en diversaj kampoj, ili ne povas ricevi egalan traktadon kun la viraj.”⁵ Tio almenaŭ manifestas, ke Pearl konsciis pri la neegala pozicio inter viroj kaj virinoj, inkluzive de premi-donado. De 1938 ŝi senĉese publikigis artikolojn kaj faris paroladojn en diversaj okazoj por subteni egaligon inter viroj kaj virinoj, por voĉdoni emancipiĝon de virinoj kaj por elimini la diskriminacion inter viroj kaj virinoj. Ŝi ne kredis, ke ekzistas granda diferenco inter viroj kaj virinoj, kaj brave deklaris, ke la kapablo kaj intelekto de viroj kaj viroj estas denaske liberaj kaj egalaj, kaj la diferenco komenciĝas nur post naskiĝo.

En 1949, kiam la Popola Respubliko de Ĉinio fondiĝis, la rilato de Pearl kun Ĉinio disrompiĝis, pro tio, ke la usona registaro ne agnoskis la novan respublikon. Ekde tiam ŝi ne plu povis iri al Ĉinio. Post kiam Nixon, la usona prezidento, vizitis Ĉinion por starigi diplomatian rilaton inter du landoj, ŝi aktive subtenis la programon “Vidu Ĉinion Denove” de Nacia Brodkasta Korporcio (NBC) kaj multfoje petis permeson viziti Ĉinion, sed ŝi malsukcesis pro tiama politika kaŭzo.

La sesan de majo, 1973 Pearl forpasis en Usono. Laŭ ŝia testamento, oni ĉizis tri ĉinajn ideogramojn “Sai Zhen Zhu” (赛珍珠= pli bona ol perlo) sur ŝia tombŝtono. En 2012, por memoro al ŝi, Nanjing-Universitato riparis la domon, kie ŝi vivis kaj verkis, kaj lokis ŝian statuon antaŭ ĝi. De tiam la memordomo pri Pearl estis malfermita al la publiko kiel eterna memoro al ŝi.

1. *Insurekcio de Boksistoj el kamparanoj okazis je la fino de la deknaŭa jarcento, kun la slogano “subteni Qing-dinastio (1636-1912) kaj ekstermi fremdlandanojn el la Okcidento. La insurekcio disrompis la avideman planon de la imperistaj potencoj por dividi Ĉinion, kaj samtempe akcelis la forfalon de Qing-dinastio.*
2. *En 1927 Sun Jatsun formis la nordenekspeician armeon por militi kontraŭ militlordoj kaj unuigi la landon.*
3. <https://www.nobelprize.org/search/?s=Pearl+S.+Buck>
4. *Laŭlum ĉina esperantisto-tradukisto ankaŭ tradukis esperantlingven la saman romanon kun la titolo Ĉe akvorando kun cent ĉapitroj (Femdlingva Eldonejo, 2004, Pekino, Ĉinio)*
5. *Tiuj vortoj estas tradukitaj laŭ la ĉinlingva disertajo.*



Mao Zifu



Koloraj humuroj kaj kaŭstikaj satiroj

Finfine, *Sieĝata Fortikaĵo* aperis kiel N-ro 54 de la eldonserio "Oriento-Okcidento" sub aŭspicio de UEA! La prezentanto Mark Fettes rimarkigas en la antaŭparolo:

Tiu tradicia divido de la mondo inter "oriento" kaj "okcidento" nun ŝajnas iom eksmoda, sed ĝi rolas ĉi tie kiel simbolo de ĉiuj kulturaj kaj geografiaj diferencoj, kiuj malhelpas homojn kompreni unu la alian. Per la esperantigo de klasikaj kaj modernaj literaturaj verkoj el multaj landoj, ni esperas helpi venki tiujn spiritajn barojn.

Sieĝata Fortikaĵo ĝuste temas pri konfliktoj inter ĉina kaj okcidenta kulturoj, kiuj baris la spiritojn de studentoj revenintaj el eksterlando.

La aŭtoro de ĉi tiu verko, Qian Zhongshu (1910 - 1998), estas originala ĉina verkisto, beletristo kaj tradukisto. Li publikigis esearojn, novelarojn, kaj beletristikajn verkojn, inter ili la libro *Sieĝata Fortikaĵo*, verkita en humura kaj satira stilo, estas lia nura romano. Ĝi priskribas amon, karierojn kaj la vivan situacion de tiama ĉina intelektularo en la komencaj jaroj de la kontraŭjapana rezistmilito de ĉina popolo (1931-1945).

La romano aperis en 1947, kaj estis jam tradukita en plurajn lingvojn, inter ili la angla, la franca kaj la germana.

Por trafe esprimi embarasojn kaŭzitaĵojn de miksado de okcidenta kulturo kaj la lokaj tradicioj, la aŭtoro mem devas havi la sciojn kaj spertojn kiuj transpasas epokojn kaj landlimojn. Kiel brila studento de la ĉina kaj angla lingvoj, Qian ekstudis en Tsinghua-Universitato en 1929, poste vizitis la universitatojn Oksfordo kaj Parizo. La verko montras la vastan konon de la verkisto pri historioj kaj literaturoj — ĉinaj kaj eksterlandaj, nuntempaj kaj antikvaj. Pro la vasteco, *Sieĝata Fortikaĵo* plenas de koloraj humuroj kaj kaŭstikaj satiroj pri divershomaj malfortoj kaj malvirtoj, rekoneblaj ĉie ĉiam por legantoj el ĉiuj landoj.

Tra la libro troviĝas humuroj grizaj kaj nigraj inter vortoj kaj linioj. La aŭtoro vivis en la ombro de la milito kaj ĉirkaŭ li videblis nur morozaj homoj sub la morna ĉielo. Ĉio tiam estis absurda, malvarma kaj distordita. Kial fari? Ne ĉiuj volis batali kunportante armilojn sed iuj eĉ profitis de tiu krizo de la lando. La ĉefroluloj en la romano estas malgranduloj. Ankaŭ la aŭtoro mem estas malgrava persono. Ili ne povis regi siajn sortojn kaj al ili mankis la respondeco pri la socio. Ili sin intermokis, kaj ricevis kaj fabrikis samtempe mokadon de la historio. Por ili estis konvene vivi siajn vivojn komferte. Sufiĉis propraj amo, mono, laboro kaj familio. Ĉe homoj ĉasi realecon en nenieco fariĝis modo kaj idealo. Sekve la finiĝo estis timo, soleco kaj despero.

Precipe menciinde, ke ĉiuj intrigo kaj cirkonstancoj baziĝas sur la milita fono. Sed ĉi tie la milito mem ludas la rolon de "spicaĵo". Iam japanoj kredis, ke blankaj litkovriloj kapablas protekti kontraŭ efiko de radiado far atombombo. Tion mi legis en libro verkita de japano. Kiu? Mi forgesis. Tiutempe (eĉ nun!) nemalmultaj ĉinoj sin konvinkis/as, ke recitante ĉanton oni povas venki naturajn kaj homfaritajn katastrofojn.

Sinjorino Zhang estis budhano, kaj ŝi diris, ke ŝi recitas dekfoje "Ĉanton de Blanke Vestita Avalokiteŝvaro", petante la bodisatvon beni la ĉinajn trupojn per venkoj, kaj ŝi aldonis, ke recitado de tiu ĉanto estas tre efika: dum la lastfoja batalo de Ŝanhajo en plej intensa situacio, kiam sinjoro Zhang iris al la kompanio ofici, ŝi recitis la ĉanton hejme kaj pro tio ŝia edzo neniam trafis vagantajn kuglojn.

Ĉu estus nur iuj ĉinoj kiuj ne agis kontraŭ la milito?

Li estis diranta, kiel li propagandis al francoj pri la militaj aferoj kaj kiom da simpatio li gajnis por Ĉinio. "Post retiriĝo de la ĉina registaro el Nankino, ili ĉiuj asertis, ke Ĉinio ruiniĝos. Mi diris al ili: 'Dum la milito en Eŭropo, ĉu via registaro ne formoviĝis el Parizo? Sed vi estis la finfinaj venkintoj.' Ili diris nenion pri tio, ve, nenion."

La plumo de Qian ne rekte direktiĝas al bataloj, ni tamen legas ofte en la libro pri la korstato kaj konduto de homoj, registaroj. Ne raras skurgado kun tragika ironio.

Kaj pri la satiroj mordantaj, multaj legintoj kaj esploristoj faris profundajn studadojn. Kaj faras, faros. Neniam ĉesas la temo. Pere de mikromienioj kaj mikroreakcioj, Qian priskribas psikologiojn de la roloj lerte kaj delikate.

Ŝajnigo de la diro kaj la fardo malkaŝas la perverson de la menso kaj spirito. Kun la aglaj okuloj la aŭtoro spionas post ia senforma kurteno. Nenio kaj neniu povas eskapi el la observado. Travideblas maskoj, vestoj, langoj, koroj, paŝoj, gestoj, planoj, aranĝoj... Ĉiuj aktoroj agas kiel travideblaj korpoj en karikaturnaj filmoj. Sub la skizado de la verkisto ĉiu persono montras sian karakteron kaj temperamenton ekde la sursceniĝo. Ne necesas tro da inko. La fulma desegno de la konturo lasas la gevirojn diversaĝajn salti sur la papero. En vogleco for de rigida rakonto pulsas etoso ridinda de tempo al tempo, de loko al loko. Kompreneble, tiuj ridindaĵoj aperadas ne (nur) por amuzo kaj ŝerco sed post ili troviĝas ĝisostaj pikado kaj vipado. Ni vidu, kiel la protagonisto Fang Hongjian elpensis pretekston kiam li aĉetis falsan atestilon de doktoreco:

Fang pensis, ke la irlandano sendube faras artifikon, kaj ke se li aĉetos falsan diplomon por trompi, ĉu li ne fariĝos trompisto? Sed li estis studento en la fako de filozofio, kaj al flozofi-studento kelktempe mensogo kaj trompo ne estis malmoralaj. En Ideala Lando de Platono tio estas senkulpigita, ke soldato trompas la malamikon, kuracisto la malsanulon, kaj oficialulo la popolanojn. La sanktulo kia Konfuceo afektis malsaniĝi por trompe foririgi Ru Bei, kaj ankaŭ Mengzio simuliĝis por trompi reĝon Xuan de Qi-regno. La patro kaj bopatro esperas, ke li estos doktoro, kaj kiel filo aŭ bofilo, ĉu li eĉ aŭdacas desaporiti ilin? Li supozis, ke aĉeti diplomon por trompi ilin estas kiel oni aĉetis rangon dum Qing-dinastio aŭ kiel komercisto de brita kolonio tributis kelkdek mil pundojn al la reĝa trezorejo por akiri titolon de aristokrato.

Tiaj frazoj estus nur spritaĵoj, ĉu? En ili legiĝas sarkasmoj tuŝantaj pri individuoj nunaj kaj antikvaj, ŝtatoj ĉinaj kaj okcidentaj. Kia salato akragusta! Ĉe tio la ĉefa rolo sentis nenion alian ol tepidon kontentigan, kio vekas tamen pensadon de la verkinto kaj legantoj. Kiu homo aŭ kia persono aŭdacus deklari ke li neniam trompas?

Por realigi humurojn kaj satirojn, la verkisto uzas riĉajn retorikajn figurojn kiaj estas komparo, metaforo, parabolo, alegorio, asociado... La artaj trajtoj jam evidentiĝas por ĉiuj legintoj. Sed ili restas remaĉindaj por legintoj, legantoj kaj legontoj. Tuj kiam tiu ĉi traduko aperis, amiko, jes, sendube ankaŭ esperantisto, sendis al mi la jenan materialon, verŝajne de li trovitan en interreto:

En *Sieĝata Fortikaĵo* distingiĝas tri specoj de rafinitaj komparoj. La unua estas vera adekvata prezento de pejzaĝo kaj afero; la dua, freŝa mistera komparo de abstrakta menso aŭ sento kun konkreta objekto, aŭ inverse; la tria, komika

humura satiro danke al la intensa kontrasto je valorgrado inter komparitaĵo kaj implico. Jen la tri ekzemploj respektive:

1. *Kvazaŭ trempite en oleo, la nokto fariĝis diafanaĵo. En brakumo de la suno, la nokto ne povis montri sian originan formon, kaj eble ebriiĝite de la suno, ĝi ankoraŭ aspektis ruĝeta post retiriĝo de vesperkrepusko.*
2. *la lernantino, kiu faris notojn pri la prelego, ĉesis skribi kun ruĝiĝinta vizaĝo, kvazaŭ, je lia lasta frazo, ŝiaj virgulinaj oreloj jam perdis ĉastecon antaŭ la publiko;*
3. *Sur la vizaĝo de sinjoro Li mankis la paro da nigraj okulvitroj kaj liaj grandaj blankaj okuloj ŝajnis senŝeligitaj kuiritaj ovoĵoj.*

Fakte, legante la libron ni povas renkonti fekundajn metaforojn kiuj ne enhavas vortojn "kiel", "kvazaŭ", "ŝajnis" ktp. Kaj krome, asociadoj transkultura, transpaca kaj transtempa gvidas nin legantojn droni en la fluo de konscio. La ekzemplo doniĝis supre per la cito pri la falsa diplomo.



Aprezante tradukon, oni ne povas ne babilu pri la lingvaĵo. Kia estas tiu ĉi traduko de Wei Yida?

Imagu, kia defio ekzistas dum la traduko! Se la tradukinto ne posedus larĝajn sciojn kiel pri la antikveco, tiel ankaŭ pri la nuntempo, kiel pri la okcidento, tiel ankaŭ pri la oriento, li tute ne povus solvi la kompleksan priskribadon de personoj, eventoj kaj objektoj nur uzante ordinaran lingvon

de Zamenhof. Aparte malfacile estas trakti mokŝercojn el personaj nomoj, drolaj poeziaĵoj, antikvastilaj tekstoj, se ne paroli pri pluraj fremdlingvoj. Felice en la libron la tradukisto ne enkondukis grandan amason da neologismoj. Li evitis ĉinajn specialaĵojn aŭ per kunmetado de vortoj ĉiutage uzataj aŭ per esprimoj klarigaj aŭ per proksimaj sinonimoj aŭ per litoto, eŭfemismo...